

92 V-18079/5
-10
(1913)

5a JARO



5a JARO

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA
JARLIBRO

1913

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

10, Rue de la Bourse, GENÈVE

POR RECENZO! (PREZO: SM. 1.-)

x 2.05

OFICIALAJ ELDONAĴOJ DE U. E. A.

Oficiala Jarlibro, aperas dum januaro. Senpaga por Esperantianoj. Prezo (afranke) : 1 Sm. por nemembroj.

Aldono al Oficiala Jarlibro, aperas dum junio-julio, kun ĉiuj korektoj en la Adresaro de la Delegitoj. Prezo (afranke) : 10 Sd.

Esperanto, 16-paĝa, duonmonata gazeto, oficiala organo de U. E. A. Senpaga por garantiantoj kaj esperantaj entreprenoj (esperantistaj organizaĵoj). Abono : 2 Sm. Luksa eldono : 2,50 Sm.

Kongresa Dokumentaro, aperas ĉiujare dum oktobro aŭ novembro, kun ĉiuj raportoĵoj, decidoĵoj kaj protokoloĵoj de la kongreso de U. E. A. Senpaga por kongresanoĵoj kaj helpkongresanoĵoj. Prezo (afranke) : 1 Sm.

Oficiala Bulteno, aperas laŭ la bezonoĵoj, por administraj informoĵoj. Senpaga por Delegitoĵoj, Subdelegitoĵoj kaj Konsuloĵoj.

Financa kaj statistika Informilo, aperas kvaronjare, entenas la kvaronjarajn bilancoĵojn, statistikoĵojn, k. t. p. Senpaga por komitatanoĵoj kaj fakestroĵoj.

Interŝanĝa Bulteno, aperas dumonate. Oficiala organo de la Universala Interŝanĝa Asocio. Senpaga por ĝiaj membroĵoj.

Studenta Bulteno, aperas plurfoje en la jaro. Oficiala organo de la Universala Studenta Asocio. Senpaga por ĝiaj membroĵoj.

Propagandaj broŝuroĵoj kaj folioĵoj.

Oficiala skribmaterialo.

Oficialaj insignoĵoj.

Vidu en la anoncoĵoj
la specialan katalogon de la
Universala Esperantia
Libreĵo.



1-18678

GRAVA!

ESTIMATA ESPERANTIANO,

I. — Dankante vin pro via kotizaĵo, ni havas la honoron sendi al vi vian membrokarton kaj jarlibron por 1913.

II — **KOTIZAĴO POR 1914.** — Por ke ne okazu interrompoĵoj en viaj membrorajtoĵoj kaj por ebligi regulan financon administradon de nia Asocio, vi bonvolu afable repagi vian kotizaĵon por 1914 antaŭ la 1 marto 1914. Se, je tiu dato, vi ne pagis ĝin, nek sendis vian formalan ekŝigoĵojn, ni prezentigos al vi per la poŝto aŭ alimaniere kvitancon da 1 Sm. por la kotizaĵo kun la specialaj elspezoĵoj por ĝia enkasigo.

III. — **VARBADO.** — Por ke nia Asocio fariĝu pli kaj pli grava kaj potenca, estas necese, ke konstante ĝi pligrandigu la nombron de siaj membroĵoj. Ni do insiste petas vin, ke vi konsideru kiel devon, varbi dum la venonta jaro almenaŭ du membroĵojn, aŭ revarbi du malnovajn, inter la personoĵoj kiuj iel ajn bezonas la servoĵojn de U. E. A. aŭ sin interesas pri Esperantismo. Vi uzu por tio la du aldonitajn varbiloĵojn. Membroĵoj kiuj varbos 20 ricevos dankopremion. Kajeroĵojn da 20 varbiloĵoj ni sendos laŭ peto. Vi varbu nur honeste konatajn personoĵojn.

IV. — **BONVOLA KUNLABORADO.** — Se vi rimarkis eraron en la jarlibro; se vi konas iun kiu povus fariĝi Del. en loko kie ne estas; se vi konas firmon, asocion, k. c., kiu povas nin helpi; se vi deziras fari al ni proponon, k. c., sendu la aldonitan respondilon.

Kun samideana saluto kaj antaŭa danko.

U. E. A.

POR PROPAGANDI

La plej bona maniero propagandi por U. E. A. estas citi ciferojn :

La 1^{an} novembro 1912, U. E. A. kalkulis 9.096 membrojn kaj 300 Esperantajn Entreprenojn (firmoj, societoj, k. c.). Nia Asocio estas plene internacia, ĉar ĝi enhavas 1.617 membrojn en Germanujo, 1.215 en Francujo, 1.032 en Rusujo, 936 en Granda Britujo, 494 en Aŭstrio-Hungarujo, k. c. kaj 935 ekster Eŭropo. Ĝiaj 1.161 Del. estas dissemitaj en ĉiuj partoj de la terglobo.

Dum 1911, U. E. A. faris al siaj membroj 10.475 servojn en la plej diversaj fakoj de la tutmonda vivo : komerco 2.698, junuloj kaj studentoj 588, turismo 1.252, servoj al vojaĝantoj 1.704, diversaj 4.293.

La plej bona maniero por propagandi la lingvon Esperanto estas montri ke ĝi estas vivanta kaj utila.

Sufiĉas por tio rimarkigi, ke la tuta administrado de U. E. A. estas farata ekskluzive en Esperanto. Por tiu administrado la Centra Oficejo de U. E. A. skribis aŭ ricevis dum 1911 34.355 korespondaĵojn kaj 41.067 en 1912, ĉiuj en Esperanto. Do, Esperanto plene taŭgas por korespondado.

Per Esperanto estis plenumitaj 1.704 servoj al vojaĝantoj : sekve Esperanto taŭgas por parolata lingvo. Oni aldonu ke, en niaj kongresoj, ĉiuj diskutoj okazas per Esperanto.

Por pliaj informoj pri la utilo de U. E. A. en la internaciaj rilatoj kaj pri la Esperanto-movado, oni legu la oficialan journalon de U. E. A. : ESPERANTO.

Varbinto : Esperantiano N^o

Strato : Loko :

VARBILO

Bonvolu enskribi { Sinjoron (1). Firmon (1).
 Sinjorinon. Societon.
 Fraŭlinon.

Nomo

Antaŭnomo

Profesio

Adreso { Strato N^o
 { Loko Lando

Kiel (1) :

1^e **Membro** : ordinara (1 Sm.), subtenanta (2 Sm.), dumviva (50 Sm.).

2^e **Esperantia Entrepreno** : unujara (5 Sm.), esperantista organizaĵo (3 Sm.).

3^e **Membro de fako** : interŝanĝa, laborista, studenta, virina (50 Sd. + la membra kotizaĵo).

4^e **Abonanto de « Esperanto »** : ordinara eldono (2 Sm.), luksa (2,50 Sm.).

Mi ĉi-kune sendas la monsumon da Sm. (2)

por la { kotizaĵo (1).
 { abono.

LA VARBINTO,

(1) Trastreku tion, kio ne taŭgas.

(2) 1 Sm. = 2,50 frankoj.

N. B. — Vi detranĉu tiun ĉi varbilon kaj sendu ĝin kun la mono al la Del. de via loko aŭ al U. E. A., 10, rue de la Bourse, Genève.

La Del. zorge konservu tiun ĉi varbilon kaj sendu al la Centra Oficejo de U. E. A. laŭ peto.

Varbinto : Esperantiano N^o

Strato : Loko :

VARBILO

Bonvolu enskribi } Sinjoron (1). Firmao (1).
 } Sinjorinon. Societon.
 } Fraŭlinon.

Nomo

Antaŭnomo

Profesio

Adreso { Strato N^o
 { Loko Lando

Kiel (1) :

1^e **Membro** : ordinara (1 Sm.), subtenanta (2 Sm.), dumviva (50 Sm.).

2^e **Esperantia Entrepreno** : unujara (5 Sm.), esperantista organizaĵo (3 Sm.).

3^e **Membro de fako** : interŝanĝa, laborista, studenta, virina (50 Sd. + la membra kotizaĵo).

4^e **Abonanto de « Esperanto »** : ordinara eldono (2 Sm.), luksa (2,50 Sm.).

Mi ĉi-kune sendas la monsumon da Sm. (2)
por la { kotizaĵo (1).
 { abono.

LA VARBINTO.

(1) Trastreku tion, kio ne taŭgas.

(2) 1 Sm. = 2,50 frankoj.

N. B. — Vi detranĉu tiun ĉi varbilon kaj sendu ĝin kun la mono al la Del. de via loko aŭ al U. E. A., 10, rue de la Bourse, Genève.

La Del. zorge konservu tiun ĉi varbilon kaj sendu al la Centra Oficejo de U. E. A. laŭ peto.

RESPONDILO

por niaj bonvolaj kunlaborantoj

Bonvolu afable skribi ĉi tie viajn rimarkojn, korektojn, aldonojn por la jarlibro, adresojn de varbotaj membroj, firmaoj, societoj, delegitoj, k. c., kaj viajn diversajn proponojn pri la jarlibro, pri U. E. A., pri la Esperantisma movado, k. c.

Detranĉu tiun ĉi paperon kaj sendu ĝin al U. E. A., 10, rue de la Bourse, Genève (Svisujo).

RESPONSES

For the purpose of this study, the following questions were asked:

1. How do you feel about the current situation?
2. What are the main reasons for the current situation?
3. How do you think the situation will change in the future?
4. What do you think should be done to improve the situation?

Esperantia Biblioteko

Oficiala Serio

N° 9

**UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO**

**OFICIALA
JARLIBRO**

5a Jaro.

1913

5a Jaro.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Rue de la Bourse, 10, GENÈVE

ENHAVO

Antaŭparolo	7
Kalendaro 1913.	10

1^a PARTO

Utilaj informoj	11
Kronologio	11
Luno	11
Eklipsoj	11
Festoj	12
Horo	13
Tajdo.	14
Mezuroj kaj Pezoj	15
Diversaj unuoj	16
Mondformato.	16
Mono.	18
Kompara tabelo de la ĉefaj monunuoj.	19
Universala Poŝta Unio	20
Internacia Telegrafa Unio	21
Ĉefaj internaciaj institucioj	21
Internaciaj kongresoj	23
Esperantistaj kongresoj	26
Internaciaj ekspozicioj, foiroj kaj festoj	26
Notindaj datoj el la historio de Esperanto	27

2^a PARTO

Informoj pri U. E. A.	29
Historio	29
Celo	30
Organizo	31
Statistikaj informoj pri U. E. A.	32
Servoj de U. E. A.	34
Informpetoj	35
Dum vojaĝo	36
Komerco	36

Ĉiuj rajtoj rezervitaj.
Enregistrata ĉe la Federala Oficejo
por la Intelektala Propraĵo.



Grava rimarko. — La enhavo de tiu Jariibro ne povas esti repre-
sata, ĉu tute, ĉu parte, sen la permeso de U. E. A.

Gvidfolioj kaj gvidlibroj	37
Studentoj	39
Virinoj	39
Interŝanĝistoj	40
Laboristoj	40
Esperanto-Oficejoj	41

ANONCOJ.

3^a PARTO

Statuto kaj regularoj	51
Statuto de U. E. A.	51
Tabelo de la kotizajoj	62
Financa regularo	63
Regularo pri la kolektado kaj administrado de la garantia kapitalo	65
Regularo pri la servoj de U. E. A.	67
Regularo pri konsuloj	72
Regularo de la kongresoj	73
Regularo de la Universala Interŝanĝa Asocio	76
Regularo de la Universala Laborista Asocio	77
Regularo de la Universala Virina Asocio	78
Regularo de la Universala Studenta Asocio	79

4^a PARTO

Centra Organizo de U. E. A.	81
Honora membraro	81
Komitato	81
Centra Oficejo de U. E. A.	82
Fakaj asocioj	83
Jura konsilantaro	84
Dumvivaj membroj	85
Subtenantaj membroj	85
Distrikta organizo	87
Listo de distriktaj Delegitoj	87
Regiona organizo	91
Listo de la Delegitoj, Vicdelegitoj, Esperanto-Oficejoj, k. t. p.	92
Listo de la Esperantiaj regionoj	171

Esperantiaj Entrepreneoj	181
Fakaj Societoj	181
Esperantistaj organizaĵoj	183
Gazetoj	201
Neesperantistaj organizaĵoj	202
Komercaj firmoj	205
Hoteloj	214

ANONCOJ

5^a PARTO

Turismaj informoj (hotela servo)	225
Ĝeneralaj rimarkoj	225
Aŭstrio-Hungario	229
Belujo	233
Britujo	235
Bulgarujo	241
Danujo	241
Francujo	243
Germanujo	248
Grekujo	256
Hispanujo	256
Italujo	259
Nederlando	263
Norvegujo	265
Portugalujo	267
Rumanujo	269
Rusujo	271
Serbujo	275
Svedujo	275
Svisujo	278
Ekster Eŭropo	282

ANONCOJ.

ANTAŬPAROLO

Tiu nova eldono de nia Jarlibro ricevis, krom la kutimaj korektoj, diversajn aldonojn. kiuj estos espereble favore akceptataj de niaj membroj.

1^e La rubriko de la *utilaj informoj* estis pligrandigata per novaj artikoloj pri kalendaro festoj, horo, tajdo, mondformato, ĉefaj internaciaj institucioj kaj internaciaj kongresoj okazontaj dum 1913. Tiuj diversaj informoj estis redaktitaj precipe el praktika kaj utiliga vidpunkto.

2^e La informoj rilataj al la servoj de U. E. A. kaj la maniero ilin uzi estis verkitaj en pli konciza kaj pli frapanta formo, tiel ke en malmultaj paĝoj ĉiu Esperantiano povu esti klare informata pri siaj rajtoj kaj pri la funkciado de nia Asocio.

3^e Tute nova parto, sub la titolo *Turismaj informoj* estis aldonita al nia *Jarlibro*. Krom la listo de la Esperantiaj hoteloj, jam multenombraj, tiu parto enhavas pri ĉiu Eŭropa lando artikolon, kiu prezentas informojn pri ĝiaj geografiaj, politikaj kaj ekonomiaj kondiĉoj, ĝiaj fervojoj, ĝia turismo kaj ĝiaj hoteloj. Niaj legantoj trovos en tiuj artikoloj praktikajn informojn, kiuj speciale pri poŝtoj, fervojoj kaj turismo, estas malfacile kune riceveblaj, krom en teknikaj kaj karaj verkoj. Ili utilos ne nur al la vojaĝantoj, sed ankaŭ al la personoj, kiuj deziras havi je sia dispono facile legeblajn informojn pri tiu aŭ alia lando, sen bezono konsulti diversajn tro specialajn librojn. La kunmetado de tiuj artikoloj trudis al ni grandan laboron, kaj spite tio ni bone konscias, ke ni ne ankoraŭ atingis tute kontentigan rezultaton. La proksiman

(Maldekstre : nova stilo ; dekstre (inter krampoj) : malnova stilo).

jaron, dank'al komparado inter la diversaj artikoloj kaj al la faritaj spertoj, ni certe povos plibonigi tiujn informojn kaj forigi eblajn erarojn. Same pri la listo de niaj hoteloj, por kies kompletigo ni bezonas la kunlaboradon de niaj Delegitoj.

4^e Sur apartaj paĝoj ni presigis du varbilojn, kiujn bonvolu uzi niaj membroj por varbado de novaj asocioj (ĉiu membro konsideru kiel devon la varbadon de almenaŭ du novaj membroj !) kaj paĝon por eventualaj korektoj, proponoj aŭ sugestoj.

Kiel en la antaŭaj eldonoj ni ripetas, ke la kunlaborado de ĉiuj niaj membroj estas la necesega rimedo por la plibonigo de nia *Jarlibro*. Do, ĉiufoje kiam oni trovas eraron, malklaraĵon aŭ mankon, oni bonvolu nin informi.

Finante ni deziras esprimi niajn sincerajn dankojn al S^{roj} Stettler, Rousseau, Behrendt, kiuj bonvolis prilabori kelkajn artikolojn, kiel ankaŭ al la verkintoj de la diversaj prilandaj artikoloj en la nova parto dediĉita al Turismaj informoj.

LA DIREKTORO.

	Jan (Dec)	Feb (Jan)	Mar (Feb)	Apr (Mar)	Maj (Apr)	Jun (Maj)	Jul (Jun)	Aŭg (Jul)	Sep (Aŭg)	Okt (Sep)	Nov (Okt)	Dec (Nov)
L.									1 (19)			1 (18)
Ma.				1 (19)			1 (18)		2 (20)			2 (19)
Me.	1 (19)			2 (20)			2 (19)		3 (21)	1 (18)		3 (20)
Ĵ.	2 (20)			3 (21)	1 (18)		3 (20)		4 (22)	2 (19)		4 (21)
V.	3 (21)			4 (22)	2 (19)		4 (21)	1 (19)	5 (23)	3 (20)		5 (22)
S.	4 (22)	1 (19)	1 (16)	5 (23)	3 (20)		5 (22)	2 (20)	6 (24)	4 (21)	1 (19)	6 (23)
D.	5 (23)	2 (20)	2 (17)	6 (24)	4 (21)	1 (19)	6 (23)	3 (21)	7 (25)	5 (22)	2 (20)	7 (24)
L.	6 (24)	3 (21)	3 (18)	7 (25)	5 (22)	2 (20)	7 (24)	4 (22)	8 (26)	6 (23)	3 (21)	8 (25)
Ma.	7 (25)	4 (22)	4 (19)	8 (26)	6 (23)	3 (21)	8 (25)	5 (23)	9 (27)	7 (24)	4 (22)	9 (26)
Me.	8 (26)	5 (23)	5 (20)	9 (27)	7 (24)	4 (22)	9 (26)	6 (24)	10 (28)	8 (25)	5 (23)	10 (27)
Ĵ.	9 (27)	6 (24)	6 (21)	10 (28)	8 (25)	5 (23)	10 (27)	7 (25)	11 (29)	9 (26)	6 (24)	11 (28)
V.	10 (28)	7 (25)	7 (22)	11 (29)	9 (26)	6 (24)	11 (28)	8 (26)	12 (30)	10 (27)	7 (25)	12 (29)
S.	11 (29)	8 (26)	8 (23)	12 (30)	10 (27)	7 (25)	12 (29)	9 (27)	13 (31)	11 (28)	8 (26)	13 (30)
D.	12 (30)	9 (27)	9 (24)	13 (31)	11 (28)	8 (26)	13 (30)	10 (28)	14 (1)	12 (29)	9 (27)	14 (1)
L.	13 (31)	10 (28)	10 (25)	14 (1)	12 (29)	9 (27)	14 (1)	11 (29)	15 (2)	13 (30)	10 (28)	15 (2)
Ma.	14 (1)	11 (29)	11 (26)	15 (2)	13 (30)	10 (28)	15 (2)	12 (30)	16 (3)	14 (1)	11 (29)	16 (3)
Me.	15 (2)	12 (30)	12 (27)	16 (3)	14 (1)	11 (29)	16 (3)	13 (31)	17 (4)	15 (2)	12 (30)	17 (4)
Ĵ.	16 (3)	13 (31)	13 (28)	17 (4)	15 (2)	12 (30)	17 (4)	14 (1)	18 (5)	16 (3)	13 (31)	18 (5)
V.	17 (4)	14 (1)	14 (1)	18 (5)	16 (3)	13 (31)	18 (5)	15 (2)	19 (6)	17 (4)	14 (1)	19 (6)
S.	18 (5)	15 (2)	15 (2)	19 (6)	17 (4)	14 (1)	19 (6)	16 (3)	20 (7)	18 (5)	15 (2)	20 (7)
D.	19 (6)	16 (3)	16 (3)	20 (7)	18 (5)	15 (2)	20 (7)	17 (4)	21 (8)	19 (6)	16 (3)	21 (8)
L.	20 (7)	17 (4)	17 (4)	21 (8)	19 (6)	16 (3)	21 (8)	18 (5)	22 (9)	20 (7)	17 (4)	22 (9)
Ma.	21 (8)	18 (5)	18 (5)	22 (9)	20 (7)	17 (4)	22 (9)	19 (6)	23 (10)	21 (8)	18 (5)	23 (10)
Me.	22 (9)	19 (6)	19 (6)	23 (10)	21 (8)	18 (5)	23 (10)	20 (7)	24 (11)	22 (9)	19 (6)	24 (11)
Ĵ.	23 (10)	20 (7)	20 (7)	24 (11)	22 (9)	19 (6)	24 (11)	21 (8)	25 (12)	23 (10)	20 (7)	25 (12)
V.	24 (11)	21 (8)	21 (8)	25 (12)	23 (10)	20 (7)	25 (12)	22 (9)	26 (13)	24 (11)	21 (8)	26 (13)
S.	25 (12)	22 (9)	22 (9)	26 (13)	24 (11)	21 (8)	26 (13)	23 (10)	27 (14)	25 (12)	22 (9)	27 (14)
D.	26 (13)	23 (10)	23 (10)	27 (14)	25 (12)	22 (9)	27 (14)	24 (11)	28 (15)	26 (13)	23 (10)	28 (15)
L.	27 (14)	24 (11)	24 (11)	28 (15)	26 (13)	23 (10)	28 (15)	25 (12)	29 (16)	27 (14)	24 (11)	29 (16)
Ma.	28 (15)	25 (12)	25 (12)	29 (16)	27 (14)	24 (11)	29 (16)	26 (13)	30 (17)	28 (15)	25 (12)	30 (17)
Me.	29 (16)	26 (13)	26 (13)	30 (17)	28 (15)	25 (12)	30 (17)	27 (14)		29 (16)	26 (13)	31 (18)
Ĵ.	30 (17)	27 (14)	27 (14)		29 (16)	26 (13)	31 (18)	28 (15)		30 (17)	27 (14)	
V.	31 (18)	28 (15)	28 (15)		30 (17)	27 (14)		29 (16)		31 (18)	28 (15)	
S.			29 (16)		31 (17)	28 (15)		30 (17)			29 (16)	
D.			30 (17)			29 (16)		31 (18)			30 (17)	
L.			31 (18)			30 (17)						
	Januaro	Februaro	Marto	Aprilo	Majo	Junio	Julio	Aŭgusto	Septembro	Oktobro	Novembro	Decembro

I^a PARTO

UTILAJ INFORMOJ

Kronologio

La jaro **1913** de la Gregoria Kalendaro (enkondukita la 15. okt. 1582) respondas al la jaroj sube montritaj :

5673 de l'moderna hebrea Kalendaro (jaro 5674 komencas la 2. okt. 1913).

1913 de l'rusa Kalendaro (komencas la 14. jan. 1913).

1331 de l'mahometana Kalendaro (jaro 1332 komencas la 30. nov. 1913).

Luno

NL = Nova luno.

PL = Plena luno.

UK = Unua kvarono.

LK = Lasta kvarono.

Januaro	Februaro	Marto	Aprilo	Majo	Junio	Julio	Aŭgusto	Septemb.	Oktobro	Novembro	Decembro
7 NL	6 NL	8 NL	6 NL	6 NL	4 NL	4 NL	2 NL	7 UK	7 UK	5 UK	5 UK
15 UK	14 UK	15 UK	14 UK	13 UK	11 UK	10 UK	9 UK	15 PL	15 PL	13 PL	13 PL
22 PL	21 PL	22 PL	20 PL	20 PL	18 PL	18 PL	16 PL	23 LK	22 LK	21 LK	20 LK
29 LK	27 LK	29 LK	28 LK	28 LK	26 LK	26 LK	25 LK	30 NL	29 NL	28 NL	27 NL
							31 NL				

Eklipsoj

22 marto. — Plena luneklipso videbla en Pacifika Oceano.

6 aprilo. — Parta suneklipso videbla en Nordokcidenta Nordameriko kaj en Nordorienta Azio.

31 aŭgusto. — Parta suneklipso videbla en Nordorienta Nord-Ameriko.

15 septembro. — Plena luneklipso videbla en Pacifika Oceano.

30 septembro. — Parta suneklipso videbla en Suda Afriko.

Festoj

Ĉefaj religiaj festoj.

Katolikaj kaj protestantaj :	{	23 marto : Pasko.
		1 majo : Ĉieliro.
		11 majo : Pentekosto.
		25 decembro : Kristnasko.
Nur Katolikaj :	{	15 aŭgusto : Maria ĉieliro.
		1 novembro : Ĉiuj Sanktuloj.
Ortodoksaj :	{	14/27 aprilo : Pasko.
		23/5 majo/junio : Ĉieliro.
		2/15 junio : Triunuo.
		25/7 dec./jan. : Kristnasko.

Aliaj ĉefaj naciaj festoj

Aŭstrio : 18 aŭg., Naskiĝo de l'imperiestro. — Belgujo : 8 apr., Reĝa festo ; 21 jul., Nacia festo. — Bulgarujo : 19 febr., Liberigo de Bulgarujo ; 2^a aŭg., Surtroniĝo de Ferdinando I^a. — Britujo : 3 jun., Naskiĝo de Reĝo. — Danujo : 3 jun., Reĝa festo ; 5 jun., Festo de la Konstitucio. — Francujo : 14 jul., Nacia festo. — Germanujo : 27 jan., Naskiĝo de l'imperiestro. — Grekujo : 25/7 mart./apr. Sendependeco. — Hungarujo : 20 aŭg., S^{ta} Stefano. — Italujo : 1 jun., Festo de la Konstitucio. — Nederlando : 31 aŭg., Naskiĝo de Reĝino. — Portugalujo : 31 jan., Suferantoj de la Respubliko ; 5 okt., Proklamo de la Respubliko ; 1 dec., aŭtonomio de Portugalujo ; 25 dec., Familio. — Rumanujo : 24/6 febr., Unuiĝo de Moldavio ; 23/6 apr./maj., S^{ta} Georgo ; 10/23 maj., Nacia festo ; 26/8 okt./nov., S^{ta} Demetrio. — Rusujo : 23/6 apr./maj., Festo de la carino ; 6/19 maj., Naskiĝo de l'caro ; 14/27 maj., Kronado de l'caro ; 7 jun., Naskiĝo de la carino ; 30/12 jul./aŭg., Naskiĝo de la carido ; 21/3 okt./nov., Surtroniĝo de l'caro ; 6/19 dec., Festo de l'caro — Svedujo : 21 jan., Naskiĝo de Reĝo ; 6 aŭg., Morto de Gustav-Adolfo. — Soisujo : 1 aŭg., Fonda de la Konfederacio. — Usono : 22 febr., Naskiĝo de Washington ; 30 maj., Decor. Day ; 4 jul., Sendependeco ; 7 sept., Labor Day.

Horo

La plimulto de la civilizitaj nacioj kalkulas la horon laŭ la Greenwich'a meridiano. Por havi en diversaj landoj aŭ lokoj la horon kompare kun la Greenwich'a horo oni devas adicii al ĝi la tempon montritan en la ĉi-suba tabelo :

Okcidenteŭropa horo.	+ 0 ^a	Monta horo amerika.	- 7 ^a			
Britujo (sen Irlando).	} Horo de Greenwich.	Alberta, Assiniboia, Athabasca, Saskatchewan.	}			
Belgujo.		Arizona, Colorado, Norda Dakoto, Suda Dakoto, Idaho, Montana, Nova Meksikujo, Utah, Wyoming.				
Francujo.						
Hispanujo.						
Portugalujo.						
Algerio.						
Tunizio.						
Mezeŭropa horo	+ 1	Centra horo amerika	- 6			
Norvegujo.	}	Kewatin, Manitoba.	}			
Svedujo.		Alabama, Arkansas, Florida, Illinois, Indiana, Iowa, Kansas, Kentucky, Louisiane, Michigan, Minnesota, Missisipi, Missouri, Nebraska, Ohio, Tennessee, India teritorio, Texas, Wisconsin				
Danujo.						
Germanujo.						
Luksemburgo.						
Svisujo.						
Aŭstrio-Hungario.						
Italujo.						
Serbujo.						
Montenegro.						
Orienteŭropa horo.	+ 2	Orienta horo amerika	- 5			
Rusujo (fervojoj).	}	Nova Brunswik, Ontario, Québec, Okcidenta Labrador.	}			
Rumanujo.		North Carolina, South Carolina, Connecticut, Delaware, Georgia, Maine, Maryland, Massachusetts, New Hampshire, New Jersey, New-York, Pensilvania, Rhode-Island, Vermont, Virginia, West Virginia.				
Bulgarujo.						
Turkujo.						
Egiptujo.						
Hinda horo	+ 5 30	Panama.				
Hindujo.	}	Peruo.	}			
Maleziaj ŝtatoj.		+ 7		Ĉilio.		
Okcidenta Aŭstralio.		+ 8				
Orienta Hinujo		+ 8				
Japanujo		+ 9				
Suda Aŭstralio		+ 9 30				
Suda Nova Kimrujo.		}		Interkolonia horo.		
Viktorio, Queensland				+ 10	Nova Skotlando.	- 4
Nova Zelando.				+ 11 30	Nederlando	+ 0 20
Samoa.				- 11 30	Grekujo	+ 1 35
Hawai.	- 10 30	Irlando	- 0 25			
Alaska horo amerika	- 9	Argentina Respubliko.	- 4 17			
Alaska, Sitka.	}	Kolombio	- 4 57			
Yukon			Meksikujo.	- 6 36		
Pacifika horo amerika.	- 8					
Brita Kolombio.	}					
Kalifornio, Nevada, Oregon, Washington.						

En Belgujo, Francujo, Hispanujo kaj Italujo la fervojoj kalkulas la horojn de 0 ĝis 24. La Greenwich'a horo estas transkomunikata

per la radiotelegrafa stacio de la Eiffelturo en Parizo ĉiutage je 10^h 45, 10^h 47, 10^h 49, kaj 23^h 45, 23^h 47, 23^h 49. Ĉiu observatorio, horlogisto, k. a. povas ĝin ricevi por revizii siajn horloĝojn kondiĉe ke ĝi estu provizita je tre simpla aparato.

Tajdo.

La nivelo de l'maro ne estas konstanta. Ĝi plialtiĝas dum proksimume 6 horoj : *alfluo* ; poste ĝi malplialtiĝas dum ankaŭ 6 horoj : *forfluo*. Tiu movo de l'maro estas la tajdo. Kiam la nivelo estas plej alta oni diras, ke la *maro estas alta* ; kiam la nivelo estas plej malalta oni diras, ke la *maro estas malalta*. La daŭro de l'fluo povas, en iuj lokoj, diferenci sufiĉe multe de 6 horoj : tio dependas de la formo de l'marbordo. Sed la tempodaŭro inter du sinsekvaj altaj maroj malmulte diferencas de 12 horoj 25 minutoj.

En iu loko, la tagon de l'nova luno kaj la tagon de l'plena luno, la maro estas alta ĉiam je la sama horo. Ekzemple, en Dunkerque, Harwich, k. a., la alta maro okazas je noktmezo kaj tagmezo. Por havi la horon de la plena maro alian tagon, oni aldonu tiom da fojoj 8/10 da horo kiom da tagoj forpasis de la lasta nova aŭ plena luno. La tempo tiel kalkulita estas proksimume ĝusta la 2^a tagon post la nova aŭ plena luno ; de la 2^a ĝis la 9^a tago, ĝi estas ĝenerale tro granda ; de la 10^a ĝis la 17^a tago ĝi estas ĝenerale tro malgranda ; tiu diferenco estas ĉefe grava proksime de la ekvinoksoj, kaj tiam ĝi povas iom superi unu horon.

Kalkulinte la horon de alta maro en Dunkerque, Harwich, k. a., oni havas la horon de alta maro en alia loko (laŭ loka horo), aldona la tempon montratan en la kolono A de la ĉi-suba tabelo.

La diferenco inter la niveloj de du sinsekvaj alta kaj malalta maroj estas la *amplekso de l'tajdo*. En iu loko ĝi estas plej granda du tagojn post la nova kaj plena luno (*grandaj tajdoj*), kaj plej malgranda je la lunkvaronoj. La grandaj tajdoj estas maksimumaj je la ekvinoksoj.

La amplekso varias laŭ la lokoj. La meza amplekso de la grandaj tajdoj estas montrata en la kolono B de la ĉi-suba tabelo, por diversaj havenoj.

HAVENOJ	A	B	HAVENOJ	A	B
Dunkerque	0 ^h	5 ^m 40	Hamburg	6 ^m	2 ^m
Harwich	0	3 80	Granville	6	12 50
Cuxhaven	1 20	3 40	Hull	6 30	6 80
Leith	2	5 40	Cherbourg	7 30	5 60
Bremerhaven	2	4	Le Havre	9	6 90
London	2 15	6 80	Dieppe	10 30	8 80
Hæk von Holland	2 30	2	Belfast	10 30	3 16
Ijmuiden	3 15	2	Dover	11	6 20
Saint-Nazaire	3 30	5 30	Liverpool	11	9
Queenstown	4 30	3 80	Boulogne	11	8 30
Plymouth	5 15	5 10	Calais	11 15	6 40
Saint-Malo	6	11 30	Portsmouth	11 15	4 50

EKZEMPLE.— Je kioma horo okazos la alta maro la 28 aŭgusto 1913 en Dover ?

La lasta nova aŭ plena luno antaŭ la 28 aŭgusto estas la 16 (plena luno) ; ĝis la 28 forpasis 28 — 16 = 12 tagoj. La horo de la plena maro en Cherbourg, Harwich, k. a., estos 12 × 0,8 = 9,6, t. e. 9 h. 30 proksimume. La plena maro okazos en Dover je 9 h. 30 + 11 = 20 h. 30 aŭ 8 h. 30 ĉu matene, ĉu vespere, kaj proksimume ; sed, ĉar tiu tago estas la 12^a post la plena luno, la eraro estos verŝajne malgranda.

Mezuroj kaj Pezoj.

METRA SISTEMO

Pezo :

- 1 kilogramo (kgr.) = 1.000 gramoj.
- 1 hektogramo (hgr.) = 100 gramoj.
- 1 dekagramo (dkgr.) = 10 gramoj.
- 1 **gramo** (= pezo de 1 cm³ de distilita akvo je 4^o).
- 1 decigramo (dgr.) = 0,1 gramo.
- 1 centigramo (cgr.) = 0,01 gramo.
- 1 miligramo (mgr.) = 0,001 gramo.

Longo :

- 1 kilometro (km.) = 1.000 metroj.
- 1 hektometro (hm.) = 100 metroj.
- 1 dekametro (dkm.) = 10 metroj.
- 1 **metro** (= 1/40.000.000 de l'tergloba meridiano).

- 1 decimetro (dcm.) . . . = 0,1 metro.
- 1 centimetro (cm.) . . . = 0,01 metro.
- 1 milimetro (mm.) . . . = 0,001 metro.

Surfaco :

- 1 hektaro = 10.000 metroj².
- 1 areo = 100 m².

Enhavo :

- 1 kilolitro (kl.) = 1.000 litroj.
- 1 hektolitro (hl.) = 100 litroj.
- 1 dekalitro (dl.) = 10 litroj.
- 1 litro (= enhavo de 1 dcm³).
- 1 decilitro (dcl.) = 0,1 litro.
- 1 centilitro (cl.) = 0,01 litro.
- 1 mililitro (ml.) = 0,001 litro.

ALIAJ MEZUROJ

- 1 inĉo angla . . . = 2,5 cm.
- 1 futo angla . . . = 30,5 cm.
- 1 jardo angla . . . = 91,4 cm.
- 1 mejlo angla . . . = 1.609 m.
- 1 mejlo mara . . . = 1.852 m.
- 1 nodo mara . . . = 1.852 m.

- 1 verŝoko rusa . . = 4.435 m.
- 1 versto rusa . . = 1.067 m.

ALIAJ PEZOJ

- 1 funto angla . . = 454 gr.
- 1 funto rusa . . = 410 gr.
- 1 pudo rusa . . = 16,380 kg.

Diversaj unuoj.

La interna volumo de ŝipo, utila por transportado de komercaĵoj estas mezurata per la *internacia komerca tuno* kiu valoras 2,830^{m³}.

Por militŝipoj oni kalkulas la pezon, per *metraj tunoj* da 1.000 kgr. en Francujo, aŭ per tunoj da 1.016 kgr. en Anglujo kaj multaj aliaj landoj.

La potenco de maŝino estas kalkulata per *ĉevalforto* montrata per la literoj H. P. (*horse power* en angla lingvo). Ĝi estas la potenco de maŝino kiu levas 75 kgr. je alteco da 1 m. dum 1 sekundo.

Mondformato

Elpensita de S^r K. BÜHRER. — Matematike adaptita de P^r W. OSTWALD. Oficiale alprenita de U. E. A. por ĝiaj presajtoj.

Unueco de formato estas utila al la presistoj pro la simpligo de la aranĝoj por kompostado kaj presado ; ĝi ŝparas multan lokon al la librovendistoj kaj privatuloj, ebligante la enmeton de presajtoj en bretarojn kaj skatolojn de ne ŝanĝebla grandeco ; la komercisto

profitas tiel ke laŭbezone li povas senpene kunigi en koverto aŭ bindaĵo parton de siaj diversaj presajtoj ; la mondformataj presajtoj estos ankaŭ pli volonte konservataj de l'ricevinto. Klara ideo helpas al ordo. La sperto montras, ke persono nur iom kutiminta al la sistemo preskaŭ aŭtomate enkestigas la formate taŭgajn reklami-lojn, kiuj tiel restas pretaj por konsulto okaze de bezono.

De mondformato oni devas teknike postuli, ke la diversaj tipoj facile troviĝu per kunfaldo de l'papero, ke ĉiam la proporcioj restu samaj, ke ĝi estu esprimata konforme al la metra sistemo.

La matematika solvo estas : la rilato inter la larĝo kaj longo estu sama al tiu inter kvadrato kaj sia diagonalo, t. e. kiel $1 : \sqrt{2} = 1 : 1,414$ aŭ ĉirkaŭe $5 : 7$. La sistemo estas tiel kombinita, ke per faldado po duonoj oni trovas unu tipon el la alia kaj la larĝo de unu formato fariĝas la longo de la sekvanta, malpli granda. Tion esprimas la ĝenerala formulo :

$$2^{\frac{n}{2}} : 2^{\frac{n+1}{2}}$$

en kiu la 2 montras la faldadon po duonoj, *n* estas iu cifero ne frakcia, kaj la $\frac{n}{2}$ certigas la rilaton de $1 : \sqrt{2}$.

Teorie tio estas la sole ebla solvo, ke praktike ĝi taŭgas montris la sperto.

Esperantianoj kiuj precize laŭ tiuj indikoj eldonas siajn presajtojn garantias al ili pli grandan atenton, helpas ŝpari tempon kaj monon al la ricevinto kaj subtenas internacian progreson, gravan por la teknika unueco.

Tabelo de la dimensioj.

Rilato : $1 : \sqrt{2} = 1 : 1,414$.

N ^o Centimetraj.		N ^o Centimetraj.	
I. 1 : 1,41	} Por surskribetoj, markoj, numeroj, k. t. p.	VIII. 11,3 : 16	Poŝformato.
II. 1,41 : 2		IX. 16 : 22,6	Por verkoj.
III. 2 : 2,83		X. 22,6 : 32	} Por kartaroj, ardfolioj, k. t. p.
IV. 2,83 : 4		XI. 32 : 45,3	
V. 4 : 5,66		XII. 45,3 : 64	} Por afiŝoj.
VI. 5,66 : 8	XIII. 64 : 90,5		
VII. 8 : 11,3	Por enirbiletoj.	XIV. 90,5 : 128	
	Por membrokartoj.		

Se specialaj formatoj estas nepre bezonataj, oni kreu ilin duobligante unu ciferon de la proporcio. Ekz. : 11,3 : 16. 11,3 : 32. 11,3 : 64, k. t. p.

La ciferoj ĉi tie donitaj rilatas al broŝuritaj libroj, jam triflanke plene tranĉitaj. La eldonado de ne tranĉitaj kaj tial ne tuj legeblaj broŝuroj estas kontraŭ la ideoj de la mondformatanoj.

Mono.

En la aldonita kompara tabelo oni trovos la diversajn monunuojn uzatajn en la ĉefaj landoj

Por siaj internaj monaj interrilatoj, la Esperantista publiko kutime uzas la spesmilan sistemon, elpensitan de D^{ro} de Saussure. La bazo de tiu sistemo estas difinita pezo da oro esprimita per integra nombro de gramoj : 10 Sm. egalvaloras ormoneron da 8 gramoj laŭ proporcio 11/12. 1 spesmilo (Sm.) = 100 spesdekoj (Sd.) = 1,000 spesoj (S.).

La *proksimuma* valoro de 1 Sm. respondas al 2,50 frankoj, 2 ŝilingoj, 2 markoj, 1 rublo, 1/2 dolaro, 2,40 aŭstriaĵ kronoj, 1,80 skandinavaĵ kronoj, 1,20 guldeno.

La spesmilo ebligas al la kliento facilan proksimuman taksadon de iu prezo, sed por ke la vendisto ricevu la ĝustan monsumon kaj poste ne plendu, oni devas por la pago bazi sur lia nacia prezo. Kiu uzas poŝtmandatojn, notu simple la monsumon en la nacia valoro de l'ricevonto (kiel la plimultaj poŝtoj ĝin postulas), tiam la kurzo estas kalkulata de l'poŝto mem.

Pro praktikaj kaŭzoj U. E. A. bazas siajn kalkulojn kaj prezojn sur la svisa franko kiun ĝi rilatigas al la proksimuma spesmila valoro per la firma proporcio : 1 Sm. = 2,50 fr. aŭ ĝia ekvivalento en Svisujo.

KOMPARA TABELO DE LA ĈEFAJ MONUNUOJ

Nomo de la lando	Valoro en	Aŭstria krono =	Brita Funto =	Franca Franko =	Germana Marko =	Nederlanda Guldeno =	Portugala Milerjso =	Rusa Rublo =	Sveda Krono =	Usona Dolaro =
Aŭstrio-Hungario	Krono = 100 heleroj	—	£ 24	Kr. 0,95	Kr. 1,17	Kr. 2	Kr. 5,33	Kr. 2,53	Kr. 1,33	Kr. 4,93
Britujo . . .	1 Funto = 20 ŝilingoj = 12 pencoj	10 1/2 p.	—	ŝ. 9 1/2	ŝ. 1	1 ŝ. 8 p.	4 ŝ. 5 p. 1/2	2 ŝ. 1 p.	1 ŝ. 1 p. 1/4	4 ŝ. 2 p.
Francaĵo . .	1 Franko = 100 centimoj	Fr. 1,05	Fr. 25, 22	—	Fr. 1,23	Fr. 2,08	Fr. 5,60	Fr. 2,66	Fr. 1,39	Fr. 5,18
Germanaĵo .	1 Marko = 100 pfenigoj	M. 0,85	M. 20, 50	M. 0,81	—	M. 1,69	M. 4,55	M. 2,14	M. 1,13	M. 4,21
Nederlandaĵo	1 Guldeno = 100 cents	G. 0,50	G. 12, 12	G. 0,48	G. 0,59	—	G. 2,68	G. 1,28	G. 0,66	G. 2,50
Portugalaĵo	1 Milerjso = 1.000 rejsoj	M. 0,187	M. 4,500	M. 0,178	M. 0,220	M. 0,371	—	M. 0,47	M. 0,247	M. 0,925
Rusaĵo . . .	1 Rublo = 100 kopekoj	R. 0,394	R. 9,48	R. 0,37	R. 0,46	R. 0,78	R. 2,10	—	R. 0,52	R. 1,94
Svedaĵo . . .	1 Krono = 100 oere	Kr. 0,75	Kr. 18, 14	Kr. 0,72	Kr. 0,88	Kr. 1,50	Kr. 4,03	Kr. 1,91	—	Kr. 3,72
Usono	1 Dolaro = 100 cendoj	D. 0,20	D. 4,86	D. 0,19	D. 0,23	D. 0,40	D. 1,08	D. 0,51	D. 0,26	—

RIMARKO. — Kiam oni volas kompari la valoron de monero de unu lando kun tiu de alia, oni serĉu la lokon, kie la vertikala linio krucigas la horizontalan. Ekz : Se oni deziras scii la valoron de germana « marko » laŭ angla monsisistemo, oni serĉu la lokon, kie la germana marko de la vertikala linio IV renkontas la horizontalan linion Britujo (2). La moneroj estas submetataj al kurzdiferencoj.

Belgujo, Bulgarujo (100 stotinki), Grekujo (100 lepka), Italujo, Rumanujo (100 bani), Serbujo (100 para), Svisujo same kiel Francaĵo; Danujo, Norvegujo same kiel Svedaĵo; Aŭstraliao same kiel Granda Britujo; Kanado same kiel Usono.

Universala Poŝta Unio.

La monumto de la Universala Poŝta Unio estas la franca franko, po 100 centimoj. Al valoro de 5 centimoj (verda poŝtmarko) la poŝto egaligas : 5 pfennig, 5 heller, 1/2 penny, 1 cendo, 2 kopekoj, 5 ĉere. Al valoro de 10 centimoj (ruĝa poŝtmarko) ĝi egaligas : 10 pfennig, 10 heller, 1 penny, 2 cendoj, 4 kopekoj, 10 ĉere. Al valoro de 25 centimoj (blua poŝtmarko) ĝi egaligas 20 pfennig, 25 heller, 2 1/2 pence, 5 cendoj, 10 kopekoj, 20 ĉere.

Tarifo por leterajoj.

Leteroj. — 25 centimoj por la unua dudeko da gramoj ; ĉiu plia dudeko aŭ parto de ĝi 15 centimoj.

Poŝtkartoj. — 10 centimoj por ĉiu karto ; sekve karto kun respondkarto kostas 20 centimojn. Ne-afrankitaj leteroj kaj kartoj kostas la duoblon.

Presajoj. — 5 centimoj por ĉiu kvindeko da gramoj aŭ parto de ĝi ; maksimuma pezo : 2 kgr. La dimensio ne superu 45 centimetrojn laŭ iu direkto. Rulaĵforma presajo ne superu diametre 10, longe 75 centimetrojn.

Aferpapiroj (dokumentoj ne havantaj la karakteron de nuna kaj persona korespondo, ekz. : aktoj, manuskriptoj, malnovaj leteroj). — 5 centimoj por ĉiu kvindeko da gramoj aŭ parto de ĝi ; minimuma afranko : 25 centimoj ; maksimuma pezo : 4 kgr. Pri dimensioj vidu sub *Presajoj*.

Specimenoj. — 5 centimoj por ĉiu kvindeko da gramoj aŭ parto de ĝi ; minimuma afranko : 10 centimoj ; maksimuma pezo : 350 gramoj. La dimensio ne superu longe 30, larĝe 20, dike 10 centimetrojn.

La Centra Oficejo de U. E. A. ne akceptas la ne- aŭ nesufiĉe afrankitajn leterojn, por kiuj ĝi devus pagi monpunon.

Presajoj, aferpapiroj kaj specimenoj devas esti afrankitaj almenaŭ parte ; por nesufiĉe afrankitaj tiaspecaj sendaĵoj la ricevanto pagas la duoblan sumon de l'manko.

Presajoj, aferpapiroj kaj specimenoj enhavu nek leteron nek skribitan noton, kiu posedas la karakteron de vera kaj persona korespondo ; ili estu facile kontroleblaj rilate la enhavon.

Respondkuponoj. — Minimuma vendprezo : 28 centimoj ; ŝanĝvaloro : 25 centimoj (afranko de internacia letero). Nuntempe ili valoras en ĉiuj Eŭropaj landoj, escepte Montenegro, Rusujo kaj Serbujo, en britaj, danaj, francaj, germanaj, italaj kaj nederlandaj kolonioj, en Brazilujo, Ĉilio, Costa Rica, Egiptujo, Haiti, Honduras, Japanujo, Liberia, Meksikujo, Siamo, Tunizio, Usono.

Poŝtmandatoj. — Tarifoj kaj specialaj reguloj varias laŭ la landoj kiuj partoprenas en ĉi tiu servo. Oni ĉiuokaze petu informojn de poŝtoficejo.

Sur la kuponon de la mandato oni ne forgesu skribi la nomon de l'sendanto kaj la celon de l'pago. Por kelkaj landoj (Britujo kaj kolonioj, Rusujo, Usono) tio ne estas ebla ; tiuokaze estas nepre necese akompanigi ĉiun mandaton per klariga poŝtkarto. Hispanujo ne havas poŝtmandatojn.

Poŝtpakoj, rembursoj, rekurvoj. — La tarifoj kaj reguloj varias laŭ la landoj. Oni petu informojn de poŝtoficejo.

Internacia Telegrafa Unio.

La tarifoj por telegramoj varias laŭ landoj kaj vojo, trairota de telegramo. Oni petu informon de poŝtoficejo.

Oni atentu, ke Esperanto estas por telegrafado nur interkonsentita lingvo. Unu vorto enhavu maksimume 10 literojn. Vorto kun pli ol 10 literoj estas pagota laŭ la tarifo por cifera lingvo, t. e. ĉiu kvino da literoj aŭ parto de ĝi estas konsiderata kiel unu vorto.

Radiotelegramoj. — Pri tarifoj oni petu informon de poŝtoficejo. Radiotelegramoj estas sendeblaj el lando al lando, el surmara ŝipo al lando, el lando al surmara ŝipo, el surmara ŝipo al surmara ŝipo. En la servo partoprenas — sen konsidero pri la uzata teknika sistemo — ĉiuj stacioj de la ŝtatoj, kiuj subskribis la Londonan konvencion :

Argentino, Aŭstrio-Hungarujo, Bosnio-Hercegovino, Belgio, Belga Kongo, Brazilio, Bulgarujo, Ĉilio, Danujo, Egiptujo, Germanujo kun kolonioj, Hispanujo kun kolonioj, Francujo kaj Alĝerio, Franca Okcident-Afriko, Franca Ekvatora Afriko, Franca Hindujo, Madagaskaro, Tuniso, Granda Britujo kun kolonioj : Sud-Afrika Unio, Aŭstralia Federacio, Kanado, Brita Hindujo, Nova Zelando, Grekujo, Italujo kun kolonioj, Japanujo kun posedaĵoj, Maroko, Monako, Norvegujo, Nederlando, Nederlanda Hindujo kaj Kurasao, Persujo, Portugalujo kun kolonioj, Rumanujo, Rusujo kun posedaĵoj, San-Marino, Siamo, Svedujo, Turkujo, Urugvajo, Usono.

Ĉefaj internaciaj institucioj.

Basel (Svisujo) :

Internacia Labor-Oficejo. (Clarahof, Rebgeasse 1). Sekretariejo de la Internacia Asocio por la leĝa protektado de la laboristoj.

Berlino :

Internacia Sekretariejo de la naciaj sindikataj federacioj. (S. O 16. Engel Ufer 15).

Berno :

Universala Poŝta Unio. Centra Oficejo.
Internacia Telegrafa Oficejo.
Internacia Oficejo por la protektado de la industria propraĵo.
Internacia Oficejo por la protektado de la literaturaj kaj artaj verkoj.
Internacia Pac-Oficejo.

Bruselo :

Centra Oficejo de la Internaciaj Asocioj (3 bis, rue de la Régence).
Sekretariejo de la Unio de l'Internaciaj Asocioj.
Internacia Instituto de Bibliografio (3 bis, rue de la Régence).
Internacia Oficejo por dogantarifoj (38, rue de l'Association).
Internacia Asocio de la fervojaj kongresoj (11, rue de Louvain).
Internacia Asocio de la navigaciaj kongresoj (38, rue de Louvain).
Internacia Oficejo por la aervetura dokumentado (27, Montagne de la Cour).
Internacia Oficejo por la ĉasdokumentado (27, Montagne de la Cour).
Internacia Instituto por la mezaj klasoj (19, rue de la Loi).
Internacia Kolonia Instituto (36, rue Veydt).
Internacia Federacio de la liberpensuloj (50, rue du Remblai).
Internacia Socialista Oficejo.

Fribourg (Svisujo) :

Internacia Katolika Asocio por la protektado de la Junulino.

Genevo :

Universala Esperanto-Asocio (10, rue de la Bourse).
Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco (24, Corraterie).
Ligo de la Kristanaj Unioj de junuloj (3, rue Général-Dufour).
Internacia Federacio de la Blua Kruco (abstinentuloj).

Gento :

Internacia Instituto de juro (11, rue Savaen).

Hago :

Konstanta Arbitracia Kortumo.
Internacia Instituto de Statistiko (12, Nieuwe Parklaan).

Londono :

Internacia Instituto de la rasoj (63, South Hill Park, N. W.).
Internacia Kooperativa Ligo (22, Red Lion Square, W. C.).
Savarnoo (101, Queen Victoria Str.).

Lucerno :

Internacia Muzeo de la Paco kaj Milito.

Monaco :

Internacia Pac-Instituto.

Neuchâtel (Svisujo) :

Internacia Unio de la Amikinoj de la Junulino.

Parizo :

Internacia Oficejo de la Pezoj kaj mezuroj (Sèvres).
Internacia Oficejo de la naciecoj (3, rue Taitbout).
Internacia Instituto de Sociologio (115, boulevard Saint-Germain).
Centra Oficejo Esperantista (51, rue de Clichy).
Universala Scienca Ligo (18, boulevard Saint-Germain).
Internationalis Concordia (15, rue des Grands-Augustins).
Cosmopolitan Correspondence Club (7, rue Cail).
Internacia Unio de la Gazetistaj Asocioj (21, rue de Sèvres).

Romo :

Internacia Agrikultura Instituto.

Stockholm :

Nobel-fondaĵo (Norlandsgatan, 6).

Trieste :

Internacia Societo por la disvolvo de la komerca instruado (Piazza Lipsia 4-5).

Washington (D. C.) :

Tutamerika Unio., Oficejo de la Amerikaj Respublikoj.
Fondaĵo Carnegie por la internacia paco.

Internaciaj Kongresoj.

Ni ĉi-sube publikigas, laŭ informoj liveritaj parte per la eldonadoj de la Oficejo de la Internaciaj Asocioj en Bruselo, parte per miaj Delegitoj, la liston de la diversaj kongresoj dum 1913. La dato de

multaj ne estis ankoraŭ fiksita kiam ni ekpresigis nian Jarlibron. La Esperantianoj, kiuj bezonas pluajn informojn, sin turnu al la Delegitoj de la koncernaj lokoj.

TABELO DE LA MALLONGIGOJ

Kongreso	K.	Kunveno	Kv.
Internacia	I.	Komisio	Km.
Universala	U.	Kunsido	Ks.
Ĝenerala	G.	Interkonsento	Ik.
Konferenco	Kf.	Unuiĝo	Ui.
Komitato	Kt.		

LOKO	TITOLO	DATO
Amsterdamo	I. K. de la ŝpinistoj kaj de la manufakturistoj de kotono.	
Antverpeno	I. K. pri la purigado kaj la sanigeo de la loĝejo.	14-21 Septembro.
Berlino	I. K. de fizioterapio	26-30 Marto.
Berlino	I. K. kontraŭ la tuberklozo.	
Berlino	I. K. pri ĉaso.	
Berlino	I. K. de la metalurgiistoj (7*).	
Biarriz	I. K. de turismo.	Oktobro.
Bonn	I. Ui. pri la sunaj esploroj (5*).	
Bruselo	I. K. de la bankaj kaj borsaj oficistoj (2*).	
Bruselo	I. K. pri la protekto de la infanaro.	Julio.
Bruselo	I. Kf. de la bindistoj	
Budapesto	I. K. de eldonistoj.	2 Junio.
Budapesto	I. K. de la komerca instruado.	Aŭgusto.
Budapesto	I. Kf. pri la balotrajto de la virinoj.	
Budapesto	I. K. de stenografio.	
Buffalo	I. K. pri la lerneja higieno.	
Edinburgo	U. Kf. de la Kristanaj Unuiĝoj de junuloj.	10-15 Junio.
Gento (Gand)	I. K. pri la senlaboreco.	
Gento (Gand)	K. de la internaciaj asocioj (2*).	Junio.
Gento (Gand)	I. K. de la farmistinoj.	12-15 Junio.
Gento (Gand)	I. K. pri la mastruma instruado.	15-18 Junio.
Gento (Gand)	I. K. de la I. federacio de la ŝpinistoj de lino kaj de stupo (4*).	
Gento (Gand)	I. K. de terkulturo (10*).	8-13 Junio.
Gento (Gand)	I. K. pri la Savado (2*).	13-16 Junio.
Genevo	I. K. spiritista.	Junio.
Glasgow	I. K. de la Kooperativa Unuiĝo.	
Groning	I. K. pri fiziologio.	
Hago	I. K. pri la literatura kaj arta propeco.	
Hago	I. K. pri laboristaj loĝejoj (10*).	Septembro

LOKO	TITOLO	DATO
Hago	I. K. interparlamenta (18*).	
Hago	I. K. de la farmaciistoj (11*).	
Hago	I. K. vegetarana.	
Hopenhago	I. K. de la mara I. Komitato (10*).	
Lausanne	I. K. de sportaj psikologio k. fiziologio.	7-10 Majo.
Lima	I. K. kuracista latin-amerika (4*).	Aŭgusto.
—	I. K. medicina panamerikana (5a).	Aŭgusto.
Lisabono	I. K. de Libera Penso.	Oktobro.
Londono	I. K. pri la vojo (3*).	23-27 Junio.
Londono	I. K. kontraŭ la komercado pri la blankulinioj.	
Londono	I. K. de medicino (7*).	6-12 Aŭgusto,
Londono	K. de la internacia kolonia Instituto.	
Londono	I. K. de la laboristoj por transveturado.	
Londono	I. K. de la medicina gazetaro (4*).	
Londono	U. K. de la sciencoj helpaj al la historio.	
Louvain	I. Kf. de la katolika unuiĝo pri la homrajtoj.	
Madrido	I. K. de popola edukado,	22-27 Marto.
Madrido	I. Kf. de la asocio de internacia juro (28*).	
Madrido	Kf. de la universala poŝta unio.	
Madrido	I. K. hidrologia, klimatologia kaj geologia (9*).	
Milano	I. K. pri la trouzo de la alkoholaj trinkaĵoj.	
Monaco	I. K. de zoologio (9*).	30 Marto.
New-York	I. K. de eksperimenta psikologio (7*).	
New-York	I. K. pri malvarmo (3*).	
Parizo	U. K. de la naciecoj.	
Parizo	I. K. pri la korpa edukado (5*).	
Parizo	I. K. de la liberamaj kristanoj kaj de la liberaj kredantoj (6*).	
Peterburgo	Ks. de la I. Asocio de la Akademioj.	Septembro.
Romo	I. K. de geografio (10*).	27 Marto-4 Aprilo.
San Jose	I. Kf. centr-amerika (5*).	
Stockholm	K. eŭropa de la baptistoj.	
Tiflis	K. de ruslandaj natursciencistoj kaj kuracistoj (13a).	Junio.
Wien	I. K. pri la profesiaj malsanoj (3*).	
Wien	I. K. de la socialistoj (9*).	
Wien	Ks. de la I. Instituto pri statistiko.	
—	I. K. de la lignolaboristoj.	
Zurich	I. Kv. de la Asocio de la dimanĉaj lernejoj.	8-15 Julio.

Esperantistaj Kongresoj.

LOKO	TITOLO	DATO
Aarhus	Dana Esp. Kongreso.	11-12 Majo.
Auxerre	Kongreso de Esp. Federacio de Burgonjo.	11-12 Majo.
Berno	Naua U. Kongreso de Esperanto.	
	1a Kongreso de U. E. A.	24-31 Aŭgusto.
Douai	Kongreso de la Nordfranca Esp. Federacio.	1 Junio.
Eastbourne	Konferenco de Brita Asocio.	12 Majo.
Gent	Internacia Esperantista Semajno.	Aŭgusto.
Graz	Aŭstria Esperanto-Tago.	11-12 Majo.
Greenock	Skota Esp. Kongreso.	6-9 Junio.
Haĝo	Festo de la Nederlanda Esp. Federacio.	Aŭgusto.
Romo	Katolika Esp. kongreso.	Septembro.
Stuttgart	Kongreso de G. E. A.	Aŭgusto.
Toulouse	Kongreso de S. f. p. E.	22-23 Marto

Internaciaj ekspozicioj, foiroj kaj festoj.

LOKO	TITOLO	DATO
Augsburgo	Foiro (oktaga).	30 Marto, 5 Okt.
Beaune	Vinifestoj.	16 Novembro.
Berno	Inaŭguro de la tunelo de Lötschberg.	Junio.
Beziers	Granda muzika festo.	23-30 Aŭgusto.
Breslau	Kulturhistoria kaj ĝardenkultura ekspozicioj.	Majo-Oktobro.
Chemnitz	Foiro (kvartaga).	20 Jul. - 1 Nov.
Danzig	Foiro (kvartaga).	5 Aŭg. - 21 Dĉc.
Dole (Franc.)	Jara oktaga foiro	Pentekosto.
Dresdeno	Foiro (dutilaga).	3 Marto - 30 Jun - 20 OKT.
Frankfurt a/M.	Foiro	12 Marto - 27 Aŭg.
Frankfurt a/O.	Foiro	24 Febr. - 7 Jul.
Gento (Gand)	Universala ekspozicio.	Aprilo-Oktobro.
Hago	Inaŭguro de la Pac-Palaco.	Aŭgusto.
Irbit (Perm)	Foiro	1 Febr. - 1 Marto, m. s.
Kiew	Foiro (La kontraktoj).	30 Marto - 20 Aprilo.
Kiew	I. ekspozicio.	Majo-Oktobro.
Leipzig	I. ekspozicio de konstruanto.	Majo-Oktobro.
Leipzig	Novjara foiro.	3-15 Januaro.
Leipzig	Paska antaŭfoiro.	3-15 Marto.
Leipzig	Paska foiro.	30 Marto - 20 Aprilo.
Leipzig	Mi aela foiro.	31 Aŭg. - 21 Sept.
Londono	I. ekspozicio de la vojo.	23-28 Junio.
Madrid	I. ekspozicio de hidrologio, klimatologio kaj geologio.	Oktobro.
Nijnij-Novgorod	Foiro	13 Jul. - 10 Sept. m. s.
Obdorsk (Tobolsk)	Foiro	1-20 Januaro.
Sevilla	Sevilla foiro.	17-20 Aprilo.
Stockholm	Nordaj ludoj.	7-16 Februaro.
Tacoma	Montamara festo.	Julio.

Notindaj datoj el la historio de Esperanto kaj Esperantio.

1859. Zamenhof, Lazaro Ludoviko, naskiĝis en Bjelostok (Rusujo-Polujo).
1878. Zamenhof festis kun siaj kunlernantoj la efektivigon de la « lingve universala ».
- 1887 (junio). Apero de la broŝuro : D^{no} Esperanto, *Lingvo Internacia*.
1889. Apero de la unua gazeto en Esperanto : *La Esperantisto*, en Nürnberg.
- 1892 (marto). Fondo de la Societo *Espero*, en St-Petersburgo.
- 1898 (jan.). Fondo de la Societo por la propagando de Esperanto en Francujo.
1899. La raporto *La lingvo internacia* de E. Naville estis prezentata al la Akademio Franca de la Sciencoj.
1901. Generalo Sébert kaj Ch. Méray prezentis Esperanton al la Franca Akademio de la Sciencoj.
1902. Fondo de la *Svisa Esperanta Societo*.
- 1903 (febr.) Fondo de Hispana Societo por la propagando de Esperanto. Fondo de la *Brita Esperanto Asocio*.
1905. Unua internacia kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer.
1905. Akcepto de la deklaro pri Esperantismo.
1905. Elekto de lingva komitato (L. K.).
1906. La dua kongreso de Esperanto aprobis la proponon de S^{ro} Carles pri la kreo de « konsuloj ».
1906. Fondo de la Germana Esperanto-Asocio en Braunschweig.
1906. Dua internacia kongreso de Esperanto en Ĝenevo.
- 1907 (febr.). *Esperanto*, la nuna oficiala organo de U. E. A. reaperas sub la gvidado de H. Hodler.
1907. Th. Rousseau instigas la kreon de Esperanto-Oficejoj.
- 1907 (majo). R. de Saussure publikigas la internacian monosistemon (Spesmila sistemo).
1907. Tria internacia kongreso de Esperanto en Cambridge.
1907. Dum la tria Esperanto-Kongreso, la konsuloj kunvenis en specialo kunsido.

- 1908 (1^a majo). Oficiala fondo de U. E. A. ; provizora elekto de Deleĝitoj.
1908. Kvara internacia kongreso de Esperanto en Dresdeno.
1908. Unua kunsido de U. E. A. en la kvara Esperanto-Kongreso
1909 (majo). Fondo de Ĉekbanko Esperantista per C. -F. Höveler. (Ĉefeĉ).
1909. Kvina internacia kongreso de Esperanto en Barcelono.
1909. Dua kunveno de U. E. A. dum la kvina Esperanto-Kongreso.
1910 (julio). Malfermo de la unua kongreso de U. E. A. en Augsburg.
1910. Sesa internacia kongreso de Esperanto en Vaŝingtono.
1910. Unua kongreso de la katolikaj Esperantistoj en Parizo.
1910 (nov.). Unua elekto de Distriktaj Deleĝitoj de U. E. A.
1911. Sepa internacia kongreso de Esperanto en Antverpeno.
1911 (aŭgusto). Malfermo de la dua kongreso de U. E. A.
1912. Oka internacie kongreso de Esperanto en Krakovo
1912. Tria kongreso de U. E. A. en Krakovo.
1912. Financa reformo de U. E. A.

II^a PARTO

INFORMOJ PRI U. E. A.

Historio

U. E. A. naskiĝis el duobla bezono : praktika kaj ideo.

Ĝi estis fondita en la komenco de jaro 1908, laŭ la iniciato de S^{ro}d Hodler kaj Rousseau. Sed jam antaŭ tiu dato okazis diversaj faktoj, kiuj preparis ĝian fondon. Oni povas citi, el la vidpunkto praktika : la decidon de la II^e Universala Kongreso de Esperanto (Genevo, 1906) pri la starigo de Esperantistaj Konsuloj en ĉiuj urboj, la samtempan kreon de Esperanto-Oficejoj, la fondon de diversaj fakaj societoj, la reaparon de la ĵurnalo *Esperanto* celanta esti la organo de tiuj diversaj praktikaj institucioj, la kunvenon de la konsuloj ĉe la III^a kongreso de Esperanto, k. t. p. Sed la sperto baldaŭ montris, ke nenia metoda kaj serioza praktika agado povas esti fruktodona sen internacia organizaĵo, kiu kunigos la diversajn iniciatojn kaj kreas praktikan servaron uzeblan de ĉiuj personoj kaj institucioj interesataj en la internacia vivo.

Aliparte la praktikado de la lingvo Esperanto kaj aktiva partopreno en la Esperantista movado kreis inter la plej multaj Esperantistoj fortan ligilon de solidareco kaj nedubeblan komunecon de sentoj kaj ideoj. Tion esprimas la tiel nomata « interna ideo de Esperantismo », kiu mem gvidis la aŭtoron de Esperanto kaj estis ofte aludita de li. Por konkretigi tiun ideon, konstantigi kaj firmigi la ligilojn inter ĝiaj anoj, por realigi Esperantismon kaj ĝin starigi sur neŝancelebla fundamento, estis tiel same necesa unu forta internacia organizaĵo.

Por tiu duobla celo : plifaciligi la interhomajn rilatojn sur

la neŭtrala bazo de Esperantismo, plimultigi la ligilojn inter ĝiaj anoj, estis kreita Universala Esperanto-Asocio.

La unua provizora Statuto de U. E. A. estis akceptita la 28^{an} de aprilo (oficiala fondo). En malmulte da tempo la Asocio faris rapidajn progresojn en ĉiuj landoj. Jam kelkajn monatojn post sia fondo, ĝi kalkulis milon da membroj kun kelkaj centoj da Delegitoj ; dume ĝi organizis diversajn praktikajn servojn por komerco, turismo, junuloj, k. t. p. La unua kunveno de U. E. A. okazis en Dresdeno, la dua en Barcelono. Intertempe la nombro de la membroj senĉese kreskis dum paralele pligrandiĝis la utileco kaj uzo de ĝiaj servoj. Dum la monatoj Julio-Aŭgusto 1910 ĝia I^a kongreso okazis en Augsburg. Tuj poste estis voĉdonita nova Statuto, kiu enkondukis kelkajn ŝanĝojn en la internan organizon de U. E. A. kaj estis aplikata de la komenco de 1911.

Ĉe la 2^a Kongreso okazinta dum 1911 en Antverpeno, estis decidita la kreo de fakaj sekcioj, el kiuj ekzistas nun kvar.

Post la 3^a Kongreso (Krakovo 1912) estis voĉdonita financa reformo por starigi la Asocion sur tute normalan financon bazon. Ĝiaj ĉefaj punktoj, nome plialtigo de la kotizaĵo ĝis 1 Sm. kaj starigo de garantia kapitalo, estis akceptitaj per granda plimulto.

Celo.

Laŭ sia Statuto, U. E. A. havas kiel celon :

1^o Plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materialajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso aŭ lingvo ;

2^o Krei praktikan servaron konstante uzeblan de ĉiuj homoj kaj korporacioj, kies ekonomiaj aŭ intelektaj interesoj celas trans la limoj de ilia gento aŭ lingvolando ;

3^o Kreskigi inter siaj membroj fortikan ligilon de solidareco ;

4^o Ellabori neŭtralan organizan fundamenton super kiu ĉiuj progresemaj homoj povos pace interkomunikiĝadi sen reciproka altrudo de siaj gentaj apartaĵoj.

La celo de U. E. A. estas do esence *socia*.

Nia Asocio do ne celas la senperan propagandon de la lingvo Esperanto aŭ ĝian disvastiĝon.

Ĝi estas internacia organizaĵo, kiu uzas Esperanton por siaj interrilatoj same kiel nacia societo uzas nacian lingvon. Por ĝi la lingvo Esperanto estas nur ilo.

U. E. A. ankaŭ ne estas pure praktika organizaĵo havanta nur materialan celon. La praktika servaro, starigata de ĝi, celas antaŭ ĉio plifaciligi la ĉiuspecajn rilatojn inter ĝiaj membroj, doni konkretan kaj vivantan fundamenton al Esperantismo.

Pri la socia signifo de U. E. A. ni konsilas legi la ĵurnalon *Esperanto* kaj la diversajn specialajn eldonaĵojn de U. E. A.

Organizo.

U. E. A. estas esence internacia aŭ pli ĝuste *supernacia*, t. e. ĝi havas nenian nacian sekcion. Interne de U. E. A. estas nek angloj, nek francoj, nek germanoj, k. t. p. sed nur *Esperantianoj*. Ĝi estas organizata laŭ la modelo de regno, kiu etendiĝus super la naciaj, rasaj aŭ lingvaj baroj, kaj estus konstituata per la homoj kaj institucioj, kiuj deziras rilati unu kun la alia sur la neŭtrala fundamento de Esperantismo.

La organizo de U. E. A. staras sur demokrataj principoj.

La membraro mem elektas siajn ĉefajn reprezentantojn kaj decidis pri la agado de la Asocio. La diversaj postenoj estas komisiataj al personoj, ne al komitatoj, kun klara respondeco kaj iniciato.

Plie, U. E. A. kunigas la bonaĵojn de centralizo kaj malcentralizo, estante internacie centralizata pri la organizo kaj servoj, kaj lasante aliparte memstarecon al la regionoj kaj distriktoj. Konsiderante ne nur la teritorian, sed ankaŭ la fakan grupiĝon, ĝi konformiĝas al la postuloj de la moderna socia vivo.

Pri la detaloj de la organizo, vidu la Statuton kaj la diversajn regularojn, k. t. p. La ĝenerala organizo estas resumata de la suba tabelo :

Regiono :

1° Ĉiujare *regiona kunveno* de la Esperantianoj. Fiksas la regionan agadon de U. E. A.

2° *Delegito kaj Vic-Delegito* (Balotataj de la membroj por 3 jaroj). Reprezentas U. E. A., starigas la servojn, administras. Elektas *lokajn helpantojn* aŭ *Subdelegitojn*, fakajn helpantojn aŭ *Konsulojn*.

Distrikto :

1° Ĉiujare *distrikta kunveno* de la Esperantianoj. Fiksas la distriktan agadon de U. E. A.

2° *Distrikta Delegito* (Balotata de la Delegito por 3 jaroj). Propandas por U. E. A., varbas novajn Delegitojn, kontrolas.

Tutmondo :

1° Ĉiujare *Kongreso* de la Esperantianoj. Fiksas la ĝeneralan agadon de U. E. A.

2° *Komitato* (10 membroj. Balotata de la Delegitoj por 3 jaroj) Gvidas la Asocion, kreas servojn, faras regularojn.

3° *Direktoro kaj Vic-Direktoro* (Balotataj de la Komitato por 3 jaroj). Administras la Asocion, efektivigas, kontrolas. Estas helpata de *Fakestroj* kaj *specialaj komisionoj*.

Fakoj :

Krom tio, la Esperantianoj povas laŭvole grupiĝi laŭ *fakoj*. Ĉiu fako estas prizorgata de *Komisiono* kaj de *Fakestro*, elektataj de la Komitato de U. E. A.

STATISTIKAJ INFORMOJ PRI U. E. A

Nombro de servoj :	1909	1910	1911
Komercio	1.120	1.513	2.698
Junuloj kaj Studentoj	218	408	588
Turismo	650	631	1.252
Servoj al vojaĝantoj	628	1.110	1.704
Diversaj servoj	940	3.756	4.293
SUMO	3.558	7.462	10.475

	1909	1910	1911
Movado de la korespondaĵoj de la Delegitoj	5.754	14.651	19.075
Movado de la korespondaĵoj ĉe la C. O. de U. E. A.)		23.940	34.355
SUMO	5 754	38.591	53.430
Gazetartikoloj pri U. E. A.	328	606	863
Paroladoj pri U. E. A.	218	464	547
Esperanto-Kursoj	»	739	1,036
Lernantoj ĉe la Esperanto-Kursoj	»	11.941	17.530
Lokoj kun Delegitoj	650	832	872
Esperantiaj Entreprenoj	65	126	187
Membroj	4.300	6.500	7.500
	8.000		

ETATO DE MEMBROJ LAŬ LANDOJ

	1910	1911	1912
Aŭstrio-Hungario	387	499	494
Belgujo	73	89	73
Bulgarujo	99	55	66
Danujo	40	45	37
Francujo	1.342	1.181	1.215
Germanujo	1.479	1.293	1.617
Granda Britujo	759	807	936
Grekujo	17	1	1
Hispanujo	512	347	470
Italujo	169	178	256
Nederlando	180	192	249
Portugalujo	41	52	58
Norvegujo	—	25	37
Rumanujo	87	12	13
Rusujo	987	956	1.020

	1910	1911	1912
Serbujo	18	14	9
Svedujo	102	56	61
Svisujo	166	200	184
Turkujo	97	27	34
Eŭropo	6.555	6.029	6.850
NORD-AMERIKO	213	253	311
CENTR-AMERIKO	—	16	17
SUD-AMERIKO	174	116	256
AFRIKO	54	60	54
AZIO	179	95	214
OCEANIO	209	191	114
Tutmondo	7.384	6.760	7.816

Grava rimarko. — Tiu statistiko estas farata la 1^{oo} julio ĉiujare por la kongreso de U. E. A. La finaj ciferoj, je la 31 oktobro, estas do pli altaj. En 1912, la membronombro atingis 8.800.

En 1911 la kotizajo estis plialtigita de 36 ĝis 50 sd.

SERVOJ DE U. E. A.

Laŭ la Statuto de U. E. A., ĉiuj Esperantianoj rajtas uzi la servojn de U. E. A. en la limoj fiksataj de la Regularoj.

Plie, la Esperantiaj Asocioj kaj Entreprenoj, krom la ordinaraj rajtoj de la membroj, rajtas uzi servojn speciale difinitajn por ili. (Vidu Regularon pri Informpetoj, paĝo 63).

Pri la uzado de la diversaj servoj de la Asocio, la fundamenta principo estas la jena: *ĉiuj servoj mem estas senpagaj, sed ĉiu uzanto devas repagi la elspezojn de la Delegito, rezultan-tajn de la peŭila servo* (respondo, specialaj klopodoj, k. t. p.).

INFORMPETOJ

Pri kio oni povas peti informojn : Komerco, industrio, trafiko, laboro, dungado, salajroj, vojaĝoj, turismo, libertempo, interŝanĝo de junuloj, instruado, studentoj, virinoj, maraj aferoj, lokaj institucioj, k. t. p.

Pri kio oni ne povas peti informojn : Pri komerca pagokapablo, morala indeco de persono (konfidenciaj informoj). Tamen, tiukaze la Delegitoj povas konigi la agentejon de sia loko, kiu sin okupas pri tio.

Kiel oni devas peti informojn : Precize skribi al la Delegito de la koncerna regiono, aldoni al la subskribo la numeron de la membrokarto kaj internacian respondkuponon (valoro : 10 sd.) aŭ respond-poŝtkarton (necesige !).

Kiam oni rajtas plendi : Se informpeto ne estis respondita de la Delegito almenaŭ kvin tagojn post ĝia ricevo, la petinto rajtas plendi ĉe la Centra Oficejo de U. E. A., kiu faros la necesan enketon. Same pri malbone aŭ nekontentige farita servo

Pri kio ĉiu devas atenti : 1^o Skribi *tre legeble*, precipe sian adreson (skribotan en nacia lingvo, ne en Esperanto, kaj per latinaj literoj).

2^o Skribi sur la adreso, post la nomo, la titolon *Delegito de U. E. A.*, tiel ke, se la Delegito forestas, la letero estu transdonata al la Vicedelegito.

3^o Skribi ĉiam *en Esperanto*, sola oficiala lingvo de U. E. A. La uzo de nacia lingvo nuligas la rajton al plendo.

4^o Afranki sufiĉe la leterojn (vidu tarifon, paĝo 00).

Kiel presajoj estas respondataj : La *ĉirkuleroj* aŭ *presataj demandaroj*, enketoj, k. t. p., devas esti respondataj de la Delegitoj, nur se ili estas akompanataj de respondkupono aŭ karto. En okazo de enketo, oni estas petata fari kiel eble plej klaran demandaron.

DUM VOJAĜO

Antaŭ la vojaĝo: Oni faru laŭeble vojaĝplanon, skribu — se necese — al la Delegitoj de la diversaj halturboj por ricevi informojn, mendu la kolekton de la *guidfolioj* de la vizitotaj urboj (ĉe la Centra Oficejo de U. E. A. Prezo: 50 sd).

Dum la vojaĝo: Ĉar la Delegitoj plej ofte ne disponas libere sian tempon, oni skribe *antaŭinformu* la Delegiton pri sia vizito kaj la horo de sia alveturo, almenaŭ *24 horojn antaŭ sia alveno*.

La Delegito havas la devon helpi la vojaĝanton. Li donos al li ĉiujn informojn por plifaciligi lian restadon kaj la vizitadon de la vidindaĵoj, montros al li la Esperantian hotelon, lin prezentos al la Esperantianoj de sia loko, ĉe la grupaj kunvenoj, gastotabloj, k. a.

Por la vojaĝantinoj: En granda nombro da regionoj, la Delegitoj elektis specialan Konsulinon por virinoj. Ŝi havas aparte la taskon respondi la informpetojn senditajn de Esperantianoj kaj liveri ĉiujn bezonatajn informojn, konsilojn kaj helpojn al la vojaĝantaj membrinoj de U. E. A.

Ĉiu Esperantiano, vojaĝanta, devas almenaŭ 24 horojn antaŭ sia alveno informi la Delegiton de la trapasota regiono, kiu sendos al la stacidomo la Konsulinon por virinoj por akcepto kaj la necesaj servoj.

KOMERCO

En ĉiuj gravaj lokoj, niaj Delegitoj firme promesis disdonigi ĉiujn prospektojn, reklamilojn, katalogojn, prezarojn, gvidlibrojn, broŝurojn, k. t. p., kiujn ili ricevos, kondiĉe ke ili estu redaktataj, ĉu tute, ĉu parte en Esperanto, kaj

sendataj de *Esperantaj Entreprenoj* per la Centra Oficejo de U. E. A. Oni facile komprenos kian profiton, el la reklama vidpunkto, povas de nun eltiri de tiu servo la komercistoj, kiuj deziras konigi siajn produktaĵojn eksterlanden, la societoj, kiuj deziras konigi sian regionon, ekspozicioj, festoj, k. t. p. Dank'al niaj Delegitoj tiuj reklamiloj estas disdonataj eĉ en la plej malproksimaj regionoj, kia ajn estas ilia lingvo.

Tarifo.

Poŝtelspezoj + 1 Sm (2,50 fr.) po 100 sendaĵoj (por kovertoj kaj adresskribado).

Ekz.:

5.000 cirkuleroj sendotaj al 1.000 Delegitoj kostos:
10 Sm. por kovertoj, adresskribado kaj stampado.
20 Sm. por poŝtelspezoj (2 sd. po koverto, ĝis 50 gramoj, poste. 2 sd. por ĉiu plia kvanto de 50 gr.)

Oni povas sendi la reklamilojn ĉu al ĉiuj landoj, ĉu al kelkaj landoj.

Se la prospektoj devas esti speciale faldataj aŭ kunmetataj, la prezo altiĝas laŭ la laboro ĝis 20 %.

*
* *

Aliparte U. E. A. prizorgas pogranda disdonon de *ĉiulingvaj* reklamiloj, prospektoj, katalogoj, gvidlibroj, k. t. p., per la Delegitoj kaj lokaj agentejoj de reklamo. Ĉiuj Esperantaj Entreprenoj kiuj deziras uzi la servojn de U. E. A. por disdonigi siajn reklamilojn eksterlanden sin turnu al la Centra Oficejo de U. E. A., kiu laŭ la kvanto de reklamiloj disdonotaj kaj la necesaj informoj starigos kalkulproponon.

GVIDFOLIOJ KAJ GVIDLIBROJ

Gvidfolioj.

En sufiĉe multaj urboj, la Esperantistaj societoj aŭ la regionaj kasoj de U. E. A. eldonigis *gvidfolion*. Tiu folio nur

Esperante redaktita enhavas : 1^e la adreson de la Delegito kaj de la Konsuloj, kaj la horojn, je kiuj ili estas viziteblaj ; 2^e la adresojn de la lokaj esperantistaj grupoj, se ekzistas tiaj, kaj iliajn kunvenejojn ; 3^e la adresojn de la firmoj, hoteloj, kafejoj, apotekistoj, bankistoj, k. a., rekomendataj al Esperantianoj (oni montras per speciala signo tiujn, kiuj parolas Esperanton) ; 4^e kelkajn informojn por viziti la urbon, nomaron de la vidindaĵoj, k. a.

La lokoj, kie estis eldonita gvidfolio estas montrataj per **g** en la adresaro de niaj Delegitoj. Ili ankaŭ estas notataj en la klarigaj artikoloj pri la diversaj landoj.

La Centra Oficejo liveras plenan kolekton de la gvidfolioj po 50 sd. afranke.

Por ke gvidfolio surhavu la subtitolon : « Publikigita sub la aŭspicioj de U. E. A. », estas necese ke : 1^e ĝia manuskripto estu sendata al la Centra Oficejo de U. E. A. por tralego ; 2^e ĝi estu presata en la tute sama formato kaj similaj literoj, kiel la ĝis nun eldonitaj gvidfolioj ; 3^e U. E. A. ricevu por disdonado al la petantoj 500 ekzemplerojn. U. E. A. prenas ankaŭ mem sur sin la presadon kaj eldonadon de tiuj gvidfolioj, kondiĉe ke la eldonanto : 1^e sendu tute pretan manuskripton ; 2^e pagu sumon da 6 Sm. por la unua milo kaj 4 Sm. por ĉiu sekvanta milo.

Universitataj gvidfolioj.

Por tuj de nun utiligi U. E. A. al la junuloj, speciale studentoj, kiuj deziras veturi eksterlanden por kompletigi siajn studojn, U. E. A. komencis instigi en ĉiu *universitata urbo* la eldonon de *Universitata gvidfolio*, Esperante redaktita, eldonata ĉu de la Universitato mem, ĉu de la regiona kaso de U. E. A., ĉu de la loka Esperantista Grupo. Tiu gvidfolio enhavas informojn pri la Universitato (programo, kosto, studkondiĉoj), pri loĝejoj por studentoj, pri libertempaj kursoj por alilandanoj, k. c. Tiuj Universitataj gvidfolioj estas eldonataj laŭ la sama principo kaj la samaj kondiĉoj kiel la turistaj gvidfolioj.

U. E. A. liveras plenan kolekton de tiuj universitataj gvidfolioj po 10 sd.

En ĉi tiu Jarlibro la lokoj, kie ekzistas tiaj gvidfolioj, estas montrataj per **Ug**.

Gvidlibroj.

Sufiĉe multaj Esperantistaj aŭ turismaj societoj eldonis Esperante redaktitajn gvidlibrojn, plej ofte ilustritajn. Oni trovas la liston de tiuj gvidlibroj en la klarigaj artikoloj pri la diversaj landoj.

STUDENTOJ

Universala Studenta Asocio (fako de U. E. A.).

La studentoj povas aliĝi al la fak-asocio *Universala Studenta Asocio*, kreita en 1912.

Ĝia celo estas plifaciligi la rilatojn inter la ĉiulandaj Esperantianaj studentoj, studi ĉiujn demandojn, kiuj rilatas al la starigo de praktikaj servoj por la ĉiulandaj studentoj, propagandi U. E. A. kaj Esperantismon ĉe la studentaron.

La fako estas direktata de Fakestro helpata de Studenta Komisiono. La *Studenta Bulleno* estas la oficiala organo de la Studenta fako

La studentoj, kiuj deziras aliĝi al la Studenta Asocio, devas pagi kotizajon da 50 sd. jare (krom la ordinara membra kotizajo de U. E. A.). Ĉiuj membroj senpage ricevas la Bullenon.

VIRINOJ

Universala Virina Asocio (fako de U. E. A.).

Interne de U. E. A., la virinoj povas aliĝi al la speciala fak-asocio *Universala Virina Asocio*.

Ĝia celo estas plifaciligi la rilatojn inter la ĉiulandaj Esperantianinoj, studi ĉiujn demandojn kaj helpi ĉiujn entrepre-

nojn, kiuj celas la plibonigon de la socia stato de la virinoj, propagandi U. E. A. kaj Esperantismon ĉe la virinoj.

La virinoj, kiuj deziras aliĝi al la Virina Asocio, devas pagi kotizaĵon da 50 sd. jare (krom la ordinara membra kotizaĵo de U. E. A.).

La viroj ankaŭ povas aliĝi kiel aprobantoj.

INTERŜANĜISTOJ

Universala Interŝanĝa Asocio (fako de U. E. A.).

Por la kolektistoj, interŝanĝistoj, personoj dezirantaj korespondadi, estis kreita speciala fako sub la titolo *Universala Interŝanĝa Asocio*.

Ĝia celo estas plifaciligi la interŝanĝadon de korespondaĵoj, ilustritaj poŝtkartoj kaj de aliaj objektoj, kiel poŝtmarkoj, fotografajoj k. t. p.

Ĉiu aliĝanto je tiu fako devos subskribi specialan promeson respondi almenaŭ unufoje ĉiun peton de samfakano. (Vidu la regularon, pag. 76.)

La nomaro de la membroj kun ĉiuj informoj pri iliaj petoj aperas en la *Interŝanĝa Bulleno*, kiu estas senpage sendata al ĉiuj membroj kvaronjare.

La speciala kotizaĵo al la Interŝanĝa Fako estas 50 sd. jare.

LABORISTOJ

Universala Laborista Asocio (fako de U. E. A.).

La laboristoj povas aliĝi al la speciale por ili kreita *Universala Laborista Asocio*.

Ĝia celo estas plifaciligi kaj plimultigi la rilatojn inter la ĉiulandaj Esperantianaj laboristoj, studi ĉiujn demandojn kiuj rilatas al la starigo de praktikaj servoj por la ĉiulandaj

laboristoj, propagandi U. E. A. kaj Esperantismon ĉe la laboristojn kaj laboristajn instituciojn.

La laboristoj, kiuj deziras aliĝi al la Laborista Asocio, devas pagi kotizaĵon da 50 sd. jare (krom la ordinara membra kotizaĵo de U. E. A.). Ĉiuj membroj senpage ricevas la Bullenon.

ESPERANTO-OFICEJOJ

Esperantia Librejo

La Universala Esperantia Librejo, kunigita kun la Centra Oficejo de U. E. A., eldonas la publikaĵojn de U. E. A. kaj aliajn librojn, liveras la ĉefajn esperantajn verkojn, insiĝnojn, flagojn, k. t. p.

Esperanto-Oficejo.

En granda nombro de lokoj ekzistas ejo, en kiu oni alcentrigis ĉion, kio koncernas U. E. A. kaj Esperanton en sama regiono. Tiu-loko estas nomata *Esperanto-Oficejo*.

Tiuj Oficejoj sidas ĝenerale en privataj magazenoj (librovendejoj, ĵurnalvendejoj, ŝtataj tabakvendejoj, k. t. p.). Iu en ili ĝenerale parolas Esperanton. Ĉe la fenestrego ekzistas afiŝejo, t. e. kadro aŭ kartono videbla de ekstere, sur kiu estas afiŝataj ĉiuj komunikoj ĉu al la publiko, ĉu al Esperantianoj.

En la Esperanto-Oficejo la publiko povas :

1^o Aĉeti kaj mendi ĉiuspecajn propagandilojn, lernolibrojn, vortarojn, esperantajn verkojn, poŝtkartojn, muzikaĵojn, k. t. p.


2^o Aĉeti, mendi ponumere, kaj aboni la ĉefajn ĵurnalojn, gazetojn, revuojn esperantistajn.

3^o Aĉeti kaj mendi insiĝnojn, jarlibrojn kaj propagandilojn de U. E. A., pinglojn, flagojn, k. t. p.

4^e Ricevi informojn pri la lokaj Esperantaj organizoj (adreso de la Delegito kaj Konsuloj, gvidfolio, k. t. p.).

Ili estas do samtempe utilaj al la eksteresperantia publiko kaj al la Esperantianoj.

En tiu Jarlibro ni montris per* la Oficejojn plene organizitajn, per (p) la Oficejojn, ĉe kiuj oni parolas Esperanton. La ceteraj Oficejoj estas ne plene organizataj.



AKTIENGESELLSCHAFT-DRESDEN

Plej granda kaj plej malnova fabriko de
Kameroj kaj Kinoaparatoj en Eŭropo.

Unuiĝo de la fabrikoj :

Hüttig
Dr Krügener
Wünsche
Zeiss-Palmos
Zulauf

Akcia kapitalo :

4,000,000 Markoj.

Jara produkcio :

ĉirkaŭe 100,000 kameroj.

Pli ol 1,200 laboristoj.

KAMEROJ

en plej alta teknika perfekteco por teknikaj, amatoraj kaj sciencaj celoj. Vendado de la aparatoj per ĉiu fotovendejo de la mondo je originalaj prezoj.

Ilustrita ĉefkatalogo N^o 380 laŭ deziro senpage.

★ PROPAGANDA LIGO PARKURBO ESPERANTO ★
 Telefono 3062 MUNĤENO Pfandhausstrasse, 8

BANKKONTOJ : { Ĉekbanko Esperantista en Londono.
 Bayer. Vereinsbank, München.

ESPERANTIA ENTREPRENO

Ĝenerala celo : ĉiutoka energia propagando de Esperanto.
 Speciala celo : Konstruado de Esperanta urbo "Parkurbo-Esperanto".

Propaganda ligo estas laŭleĝe enskribita en la
 regnan societregistron (E. S.); la aliĝo estas tute senpaga.

Vidu raportojn kaj artikolojn pri niaj entreprenoj en esper.
 gazetoj de 1912 : *Esperanto*, *La Esperantisto*, *La Revuo*,
Germana Esperantisto, *La Ondo de Esperanto*, *Normanda*
Stelo, *Deutsch-Oesterreichischer Esperantist*, *Germana Espe-*
ranto-Gazeto kaj multaj aliaj.

La plej ĉefa entrepreno de la Propaganda Ligo estas

GRANDA LOTERIO

enhávanta 90.000 gajnojn, kies la tuta sumo egalas al
 400.000 markoj kaj, krom tio, unu ĉefgajnon belegan
 domon en Parkurbo, valorantan 25.000 markojn, aŭ
 20.000 mk. per mono.

KONKURSO !

360 premioj en la sumo de 50.000 markoj,
 kaj, krom tio, domo en Parkurbo, valoranta 18.000 markojn,
 aŭ 15.000 markojn per mono al tiuj, kiuj varbos la
 plej grandan nombron da aĉetantoj de la lotletero.

Postulu informojn kaj ilustritajn prospektojn !
 La adresojn kaj nomojn oni petas skribi **TRE LEGBLE**.



ESPERANTISTOJ ! LERNU LA ANGLAN LINGVON

sen Instruisto

Per la MARLBOROUGH Serio de MEM-INSTRUAJ Lernolibroj

Por FRANCOJ

L'Anglais pour les Français
 Prezo : fr. 1.50. Sm. 0.60
 (Tolo) fr. 2.25. Sm. 0.90
 (Afrankite.)

Por HISPANOJ

L'Inglese Imparato da Sè
 Prezo L. 1.50. Sm. 0.60
 (Tolo) L. 2.25. Sm. 0.90
 (Afrankite.)

Por GERMANOJ

Der Englische Dolmetscher
 Prezo M. 1.25. Sm. 0.60
 (Tolo) M. 1.75. Sm. 0.90
 (Afrankite.)

Por ITALOJ

El Ingles para Cada Cual
 Prezo P. 1.50 Sm. 0.60
 (Tolo) P. 2.25 Sm. 0.90
 (Afrankite.)

ENHAVOJ

Vortaroj, Konversaciaj Frazoj, Gramatiko, Komercio,
 Vojaĝado, Juraj kaj Religiaj Frazoj, Fotografado, Biciklado,
 Aŭtomobilismo, Amuzaĵoj, Mono, Pezoj kaj Mezuroj, k. t. p.

FRAZLIBRO POR VOJAĜANTOJ

ESPERANTO-ANGLA. { Prezo. 6 p. Sm. 0.25.
 (Tolo) 1 ŝ. Sm. 0.50.

ESPERANTO-ITALA. { Prezo. L. 1. » Sm. 0.40
 (Tolo) L. 1.50 Sm. 0.60

Enhavoj : Prononcado, Konversaciaj Frazoj, (Temoj aranĝitaj
 alfabete), Tabeloj de Mono, Pezoj kaj Mezuroj, la Numeroj,
 Listoj diversspecaj, kaj vortaroj da ĉiutage uzataj vortoj.

SPECIALA NOTO. — Por tiuj Esperantistoj kiuj vojaĝas al la
 10^a Kongreso en Genova, la Itala Frazlibro estas speciale rekomen-
 dinda, ĉar ĝi estos tre helpema al ili en Italujo.

Obteneblaj ĉe Anglaj kaj Kontinentaj Librejoj, aŭ ĉe
 la Eldonistoj.

Por plena listo petu Katalogon n^o 54, senpage, de
 E. MARLBOROUGH & Co, 51, Old Bailey, LONDONO (Anglujo)

Kolegio de la Kristanaj Fratoj

ĈE

Sankta Ludoviko, Mo. Usono.



Ĝi estas la unua katolika kolegio en tiu ĉi urbo, en kiu oni parolas kaj instruas Esperante, kaj la unua kiu havas oficialan Delegiton de U. E. A. Gesamideanoj, pripensu kaj helpu ĝin.

EDUKEJO POR JUNULOJ

- 1^e Arta Fako ĝis atingado de abiturienta Diplomo.
- 2^e Scienca Fako ĝis atingado de abiturienta Diplomo.
- 3^e Inĝenierartaj Fakoj ĝis atingado de :

- 1^e Civila Meĥanikista Diplomo.
- 2^e Maŝina Meĥanikista Diplomo.
- 3^e Elektra Meĥanikista Diplomo.

- 4^e Komercaj Fakoj ĝis atingado de komerca Diplomo.

— Oni sendos katalogojn al ĉiuj petontoj —

LA EDUKEJESTRO :

Pro **LORENZO.**

KOMERCO

Akceptejo de novaj elpensadoj por disvastigi ilin en la Rusa Imperio
LODZ (Rusl.-Polujo), Konstantinowska, 49

KOMERCO penegasas disvastigi kaj diskonigi ĉiujn ajn eltrovaĵojn, de la plej malgravaĵoj ĝis la plej gravegaj.

Se vi deziras aĉeti aŭ vendi ion en Rusujo, plej bone vi faras skribante antaŭe al « Komercio ».

KOMERCO klopodas varbi por Rusujo laboremajn riprezentantojn por ĉiuj branĉoj de l'komercio kaj industrio.

KOMERCO esperas, ke la Esperantista mondo ankaŭ bonvolos ĝin subteni, por kio ĝi dankegas antaŭe.

★ LA ĜARDENURBO LETCHWORTH

Ĉiu samideano kiu veturas Anglujon nepre devas viziti la interesegan belan ĝardenan urbon Letchworth.

Kuŝas nur 53 kilometroj de Londono

50 minutoj vagonare. — 55 ĝesperahlistoj enloĝantaj.

Sigelmarkoj esperantistaj kun la bildo de malfaldita aglo (tenanta rubandon kun la vorto *Esperanto*) kiel simbolo de la forteco de Esperanto estas aĉeteblaj ĉe

AUGUST HACHE, STEINSTR., 4^{III}
DRESDEN - A. (Germ.)

HIGGIE KAJ K^{IO}

Esperanto-Presistoj kaj Eldonistoj

ROTSEO (Rothesay), Skotlando
Katalogoj, k. t. p., laŭ peto.

J. Mogendorff en Zoon GROENLO (Holandujo)

HAŬTOJ — FELOJ — HAROJ — VESIKOJ — PELTOJ

IMPORTO

TALPFELOJ

EKSPORTO



Pasteŭriloj.
 Malvarmigiloj.
 Kombinitaj
 Buteriloj kaj Knediloj.
 Kremkuvegoj.
 Laktopumpiloj.
 Pesiloj.

PAASCH & LARSEN, PETERSEN, Ltd.

Fabrikado de ĈIUJ LAKTAJ MAŜINOJ

HORSSENS — DANUJO

EDUARDO KÜHNE

ĈEFA TENEJO DE RUSA-AMERIKA MANUFAKTURO

St. PETERBURGO (Rusl.), Gorohovaja, 1

Ĉiuspecaj kaŭĉukaĵoj por tekniko, sporto, vojago, mastrumado, kuracado, k. t. p.

**KONTRAŬPLUVAJ VESTAĴOJ, GALOŜOJ
 PRETAJ KAJ LAŬ MENDO**

Antaŭkalkuloj kaj katalogoj (en rusa lingvo) laŭ peto, senpage.

Esperanta, rusa, germana, franca, esta kaj finna lingvoj parolataj.

Ĉekoj kaj transpagiloj de Esp. Ĉekbanko akceptataj.

BRUXELLES

HOTEL METROPOLE

1[^] RANGO

ĈIU MODERNA KOMFORTO

500 ĈAMBROJ KUN BANEJOJ

TELEFONO EN ĈIUJ ĈAMBROJ

OFICEJO DE LA DORM-VAGON-SOCIETO EN LA HOTELO

Granda salono por festoj kaj edziĝfestoj

S. I. T. A.

(Stelo Internacia Komerc-Asocio)

Pogranda kaj Podetala Komercado pri ĉiuspecaj objektoj, precipe *Eldonaĵoj, Artajoj, Ilustritaj Poŝtkartoj, Muzik-Instrumentoj, Reklamilajoj*, k. t. p.

*Komisijaj Agentoj por Britaj Komercaĵoj ĉiuspecaj.
 Reklamoj enmetataj en ĉiuj jurnaloj.*

ESPERANTIA ENTREPRENO — KONTO ĈE ĈEKBANKO

GRAVA NOTO

Petu senpagan Katalogon, kaj sendu respond-kuponon por belega kaj forta Konserv-Kovrilo por tiu ĉi Jarlibro.

S. I. T. A., 7, South Street, Finsbury, London E. C. (Anglujo)

TELEFONO : CENTRAL 3179 — TELEGRAF-ADRESO : EMPTRIX-LONDON

UNIVERSALA FEMINISTA ASOCIO

CHATEAU-RAYET FALICON

près NICE (*Alpes-Maritimes*)

Kolonio Esperantista

AGRIKULTURA KAJ MASTRUMA
MODELA FARMDOMO

Domo de ripozo por Sinjorinoj. Pensiono por
Fraŭlinoj. Prezoj modestaj.

Por ricevi informojn aldoni : por Francujo poŝtmarkon
da 25 ctm., por eksterlando unu respondkuponon.

GERMANUJO Stuttgart, Doroteenplatz, 2

WERNER & MÜLLER

LANAĴOJ — GANTOJ — ŜTRUMPAĴOJ
== TRIKOTAĴOJ ==
ŜELKOJ — KOLUMOJ — KRAVATOJ

VILA'O ESPERANTO

FREMDULA kaj FAMILIA PENSIONO

WERNIGERODE - HARZ

Bismarckstr., 24, Centra Germanujo

Unua vere esperantista hejmo, kie oni efektive ĉiutage parolas
Esperanton.

Libertempejo en plej ĉarma montregiono, vizitata de ĉiulandaj
Geesperantistoj.

Detalaj esper. prospektoj je demando.

Gesroj **W. NEURATH.**

ESPERANTIA ENTREPRENO

III^a PARTO

STATUTO KAJ REGULAROJ

STATUTO DE U. E. A.

Akceptita la 1^{an} de oktobro 1910. — Modifita la 1^{an} de oktobro 1912.

CELO KAJ PRINCIPOJ

§ 1. — Sub la nomo *Universala Esperanto-Asocio* (Esperantio) estas fondita Asocio, kiu celas :

1^e Plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materialajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso aŭ lingvo ;

2^e Krei praktikan servaron konstante uzeblan de ĉiuj homoj kaj korporacioj, kies ekonomiaj aŭ intelektaj interesoj celas trans la limoj de ilia gento aŭ lingvolando ;

3^e Kreskigi inter siaj membroj fortikan ligilon de solidareco ;

4^e Ellabori neŭtralan organizan fundamenton super kiu ĉiuj progresemaj homoj povos pace interkomunikiĝadi sen reciproka altrudo de siaj gentaj apartaĵoj.

§ 2. — U. E. A. estas absolute neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacieco.

§ 3. — La sola lingvo oficiala de U. E. A. estas la lingvo Esperanto tia, kia ĝi estas difinita per sia literatura kaj teknika verkaŭo.

§ 4. — Ĉi tiu statuto fiksas la fundamentan organizon de U. E. A. La aranĝo de la diversaj servoj estos difinata per regularoj ellaborotaj laŭ la formo ĉi tie priskribita.

MEMBROJ

§ 5. — La Asocio konsistas el :

Membroj aŭ Esperantianoj (jaraj aŭ dumvivaj);
Esperantiaj Entreprenoj (1-jaraj aŭ 30-jaraj);
Esperantiaj Asocioj;
Honoraj membroj.

§ 6. — Estas membro de U. E. A. (Esperantiano) ĉiu persono, kiu akceptinte tiun statuton kaj dezirante uzi la servojn de la Asocio, elpagas jaran kotizaĵon da 1 ₪ aŭ dumvivan kotizaĵon da 50 ₪.

§ 7. — Estas Esperantia Entrepreno :

Ĉiu entrepreno, societo, gazeto, korporacio, ktp., kiu akceptinte tiun statuton kaj dezirante partopreni en la servoj de U. E. A. kiel *korporacio*, elpagas jaran kotizaĵon da 5 ₪ aŭ tridekjaran kotizaĵon da 100 ₪.

§ 8. — (Forigita laŭ voĉdonado de 1. oktobro 1912).

§ 9. — Estas Esperantia Asocio :

Ĉiu Asocio kiu plenumas la jenajn kondiĉojn :

1^e Ĝia regularo ne kontraŭstaru le celon de U. E. A. formulitan en § 1 de tiu statuto ;

2^e Ĉiuj ĝiaj aktivaj membroj estu Esperantianoj, laŭ ĝia regularo aŭ speciala decido.

La Esperantiaj Asocioj ne pagas kotizaĵon.

§ 10. — Estas honoraj membroj personoj, kiuj faris gravajn servojn al la U. E. A. aŭ kiuj pro sia sperteco kaj morala aŭtoritateco povos doni utilajn konsilojn kaj helpojn al la Asocio. Ili estas elektataj de la Komitato.

§ 11. — U. E. A. estas neŭtrala rilate al la Esperantiaj Asocioj kaj Entreprenoj kaj neniel sin enmiksas en la agadon, kiu koncernas ilian celon.

RAJTOJ DE L'MEMBROJ

§ 12. — La organizo de la servoj estas fiksata per regularoj al kiuj devas konformiĝi ĉiuj uzantoj sub la sankcioj difinitaj en ili. Specialaj servoj povas esti starigataj por difinitaj kategorioj de membroj.

§ 13. — Ĉiu Esperantiano rajtas ;

1^e Uzi ĉiujn servojn organizitajn de U. E. A. neformale rezervitajn por aliaj kategorioj de membroj ;

2^e Ricevi la oficialan Jarlibron de la Asocio ;

3^e Plendi se li ne ricevis la servojn, kiujn li rajtas ;

4^e Partopreni en la balotoj fiksataj de tiu statuto.

§ 14. — Ĉiu Esperantia Asocio kaj Entrepreno, krom la ordinaraj rajtoj de la membroj, rajtas uzi specialajn servojn difinitajn por ili ekskluzive kaj priskribitajn en la regularoj. Ili ne havas voĉdonrajton.

§ 15. — Estos eksigebla de U. E. A. :

1^e Ĉiu membro aŭ Entrepreno, kiu agis kontraŭ la celo de U. E. A. aŭ en daŭra maniero ne konformiĝis al la regularoj La procedo uzota en tiu okazo estos fiksata de speciala regularo.

2^e Ĉiu membro aŭ Entrepreno ne plenuminta siajn financajn devojn.

REGIONA ORGANIZO

§ 16. — La Esperantiano estas dividata laŭ *regionoj*. La regionoj havantaj komunajn interesojn rilate al la agadkampoj de U. E. A. estas kunigataj laŭ *distriktoj*. La limojn de tiuj dividoj fiksas la Centra Oficejo de U. E. A. kun la konsento de la interesatoj.

§ 17. — En ĉiu *regiono* estas Delegito kaj Vicdelegito. Ili estas balotataj de la regionaj Esperantianoj por 3 jaroj kaj konstante reelekteblaj.

Tamen en la regionoj, kie estas malpli ol 20 membroj, ili estos elektataj de la Direktoro de U. E. A. por la sama daŭro.

§ 18. — La regiona Delegito havas la jenan taskon :

1^e Li klopodas pri varbado de membroj, ricevas la kotizajojn, administras la regionan kason kaj zorgas pri ĉiuj administraj aferoj de sia regiono ;

2^e Li klopodas por starigi en sia regiono la diversajn servojn organizatajn de U. E. A. ;

3^e Li ricevas ĉiujn komunikaĵojn de la Centra Oficejo, zorgas pri ilia konstanta efektivigo kaj aplikado ;

4^e Li reprezentas oficiale la membrojn de sia regiono, ĉu rilate al la Centra Oficejo, ĉu rilate al eksterasociaj aŭtoritatoj.

§ 19. — La Vicdelegito anstataŭas la Delegiton en la okazo se ĉi tiu ial ajn ne povas plenumi sian taskon. En la ordinara tempo la Vicdelegito helpas la Delegiton.

§ 20. — En okazo de morto aŭ ekziĝo de Delegito, la Vicdelegito informas la Centran Oficejon kaj balotigas novan Delegiton en tempolimo de du monatoj.

§ 21. — La Delegito elektas inter la Esperantianoj de sia regiono kaj sub sia respondebleco :

1^e Diverslokajn helpantojn aŭ *subdelegitojn* ;

2^e Diversfakajn helpantojn aŭ *konsulojn*.

§ 22. — La Subdelegitoj helpas la Delegiton por laŭeble starigi en sia loko la servojn organizatajn de U. E. A., varbi novajn membrojn kaj diskonigi la Asocion.

§ 23. — La Konsuloj havas kiel devon helpi al la starigo de la servoj, kiuj koncernas ilian fakon, kaj diskonigi la Asocion en la samfakaj rondoj.

§ 24. — En la regionoj, kie estas minimume 20 Esperantianoj, la membroj kunvenas unu fojon ĉiujare, laŭeble en novembro. Eksterordinara regiona kunveno devas ankaŭ okazi, se la Delegito aŭ 10 Esperantianoj tion deziras.

§ 25. — La regionaj kunvenoj havas la jenan taskon :

1^e Ili aŭdas kaj diskutas la raporton pri la agado de la Delegito kaj liaj helpantoj ;

2^e Ili ekzamenas la financon raporton de la regiona kaso ;

3^e Ili esploras la diversajn proponojn de la Delegito aŭ de la membroj kaj laŭ ili fiksas la regionan agadon de la Asocio dum la venonta jaro.

La regionaj kunvenoj havas kompetentecon nur pri regionaj aferoj.

DISTRIKTA ORGANIZO

§ 26. — En ĉiu *distrikto* estas distrikta Delegito helpata de distrikta Vicdelegito. Ili estas balotataj de ĉiuj regionaj Delegitoj por 3 jaroj kaj konstante reelekteblaj.

Tamen en la distriktoj, kie estas malpli ol 5 Delegitoj, ili estos elektataj de la Direktoro de U. E. A. por la sama daŭro.

§ 27. — La distrikta Delegito havas la jenan taskon :

1^e Li zorgas pri la disvastigo de U. E. A. en sia distrikto kaj diskonigo de la Asocio en la lokoj kien ĝi ne ankoraŭ penetris ;

2^e Li alcentrigas la raportojn de la Delegitoj kaj Konsuloj de sia distrikto ;

3^e Li sendas regule al la oficiala ĵurnalo de U. E. A. raporton pri la stato de U. E. A. en sia distrikto ;

4^e Li oficiale reprezentas la distriktajn interesojn, ĉu rilate al la Centra Oficejo, ĉu rilate al la eksterasociaj aŭtoritatoj.

§ 28. — En la distriktoj kie estas minimume 100 Esperantianoj, la membroj kunvenas unu fojon ĉiujare, laŭeble en

printempo. Eksterordinara distrikta kunveno devas ankaŭ okazi se 50 Esperantianoj tion deziras.

§ 29. — La distriktaĵoj havas la jenan taskon :

1^e Ili aŭdas kaj diskutas la raporton pri la agado de la distrikta Delegito kaj liaj helpantoj ;

2^e Ili esploras la diversajn proponojn de la distrikta Delegito aŭ de la membroj kaj laŭ ili fiksas la distriktan agadon de la Asocio dum la venonta jaro.

La distriktaĵoj havas kompetentecon nur pri distriktaĵaj aferoj.

FAKA ORGANIZO

§ 30. — Ĉiu societo kiu respondas la jenajn kondiĉojn :

1^e Estas Esperantia Asocio aŭ Entrepreno ;

2^e Havas fakan (profesian, idealan, filantropian) karakteron ;

3^e Estas neŭtrala rilate al politiko, religio kaj nacieco ;

4^e Ne limigas sian agadon al difinita teritorio ;

5^e Enhavas almenaŭ 50 Esperantianojn ;

Povas elekti unu reprezentanton kaj unu vicreprezentanton.

§ 31. — Tiu reprezentanto havas la jenajn taskojn :

1^e Li reprezentas oficiale sian organizaĵon rilate al U. E. A.

2^e Li partoprenas en la balotoj kaj voĉdonoj priskribitaj en tiu statuto. La reprezentantoj de la fakaj organizaĵoj ne havas administran rolon.

CENTRA ORGANIZO

I. — Komitato.

§ 32. — La ĝenerala gvidado de la Asocio estas komisiita al *Komitato*. Ĝi konsistas el 10 membroj kaj 3 vickomitatoj balotataj de ĉiuj plenrajtaĵaj regionaj Delegitoj por 3 jaroj. Ili estas konstante reelekteblaj.

§ 33. — La komitato havas la jenan taskon :

1^e Ĝi fiksas la ĝeneralan agadon de la Asocio laŭ la dezir-esprimoj de la Kongreso kaj la decidoj de la Delegitoj, konforme al § 53.

2^e Ĝi difinas la organizon de la diversaj servoj kaj kontrolas ilian administradon, diskutas kaj voĉdonas la ĝeneralajn regularojn, balotas la Direktoron, la Vicdirektoron kaj fakes-trojn.

3^e Ĝi voĉdonas la buĝeton de la Asocio.

4^e Ĝi zorgas pri la disvastigo de U. E. A. kaj pligrandigo de ĝiaj servoj.

§ 34. — La komitato balotas inter siaj membroj la Prezidanton kaj Vicprezidanton de la Asocio. Ili estas balotataj por 3 jaroj kaj konstante reelekteblaj.

§ 35. — En okazo de eksiĝo aŭ de morto de komitatano, la vakanta loko estos okupata de vickomitato, laŭ la vico de la voĉoj ricevitaj ĉe la balotado aŭ, se voĉegaleco, laŭ la lotumo.

§ 36. — La Prezidanto reprezentas oficiale la Asocion kaj prezidas la Kongreson. La Vicprezidanto lin anstataŭas.

§ 37. — La Komitato ĉiam povas elekti inter aŭ ekster si por nedifinita tempo komisionojn pri speciala fako, servo aŭ agado. Tiuj komisionoj havas konsilan rolon.

§ 38. — La Komitato kunvenas ĉiujare antaŭ la Kongreso. Ĝi kunvenas eksterordinare se pli ol la duono de ĝiaj membroj tion postulas.

II. — Centra Oficejo.

§ 39. — La administrado de ĉiuj servoj estas dividata laŭ fakoj, kies nombron kaj celon fiksas speciala regularo. Ĝi estas plenumata ĉe la Centra Oficejo de U. E. A.

Tiu Oficejo sidas en Genevo.

§ 40. — La Centra Oficejo de U. E. A. konsistas el Direktoro, Vicdirektoro, Fakestroj kaj la necesaj oficistoj.

§ 41. — La Direktoro kaj Vicdirektoro estas balotataj de la Komitato por 3 jaroj kaj estas konstante reelekteblaj.

§ 42. — La Direktoro kaj Vicdirektoro ne povas esti komitatanoj, sed la Direktoro havas konsilan voĉon en la Komitato kaj iniciatraĵton.

§ 43. — La Direktoro estas responde antaŭ la komitato pri la plenumo de la jenaj taskoj :

1^e Li efektivas la decidojn de la Komitato, zorgas pri la konstanta aplikado de la regularoj, kaj faras la proponojn utilajn por la disvastigo de la Asocio.

2^e Li direktas la Centran Oficejon, prizorgas speciale la administradon de la Asocio kaj la fakojn ne komisiitajn al fakestroj.

3^e Li komunikas kun la Delegitoj, redaktigas la oficialajn bultenojn kaj informilojn por la oficiala ĵurnalo.

4^e Li prezentas ĉiujare al la Kongreso, raporton pri sia agado kaj ĉiumonate al la Komitato raporton pri la laboroj plenumataj ĉe la Centra Oficejo de U. E. A.

§ 44. — La Vicdirektoro anstataŭas la Direktoron en la okazo se tiu ĉi ial ajn ne povas plenumi sian taskon. En la ordinara tempo la Vicdirektoro helpas la Direktoron.

§ 45. — La Fakestroj estas elektataj de la Komitato laŭ propono de la Direktoro.

Ili, sub lia respondeco, zorgas pri la gvidado kaj funkciado de sia fako kaj de la dependantaj servoj. Ili komunikas pri ĝi senpere kun la Komitato, kun la specialaj komisionoj kaj la Delegitoj.

§ 46. — La oficistoj estas elektataj de la Direktoro kaj, kie estas, de la Fakestroj.

§ 47. — Por la starigo de siaj servoj, U. E. A. povas kontrakti kun eksteresperantiaj entreprenoj. La kontraktoj devas esti submetataj al la aprobo de la Komitato.

§ 48. — Ĉiuj ĝeneralaj regularoj devas esti submetataj al la aprobo de la Komitato.

Ĉiuj pure administraj regularoj devas esti submetataj al la aprobo de la Direktoro.

III. — Kongreso.

§ 49. — La Esperantianoj kunvenas ĉiujare en Kongreso, ĉe loko difinita de la antaŭa Kongreso.

La Kongreso havas kiel celon :

1^e La ekzamenadon de la morala kaj financa situacio de U. E. A. kaj de ĝia agado dum la jaro ;

2^e La esploron de la diversaj proponoj de la komitato aŭ de la membroj ;

3^e Laŭ tiuj proponoj la fiksadon de la ĝenerala agado de la Asocio dum la venonta jaro.

§ 50. — La Kongreso havas la jenajn rajtojn :

a) Ĝi aŭdas la raportojn de la Direktoro kaj de la fakestroj kaj esprimas sian aprobon aŭ malaprobom pri ili ;

b) Ĝi ekzamenas la proponojn prezentitajn de la Komitato aŭ de la Direktoro, de la fakestroj aŭ de la Esperantianoj en la maniero fiksita de la Kongresa regularo, kaj voĉdonas pri ĉiu el ili motivitan deziresprimon, ĉu por malakcepti la proponon, ĉu por ĝin resendi al la Komitato, ke ĝi efektivigu ĝin dum la venonta jaro.

DIVERSAĴOJ

§ 51. — En la ĝeneralaj balotoj kaj voĉdonoj partoprenas :

1^e Ĉiuj regionaj Delegitoj, en kies regiono estas minimume 20 Esperantianoj ;

2^e Ĉiuj reprezentantoj de la fakaj organizaĵoj konforme al § 31 ;

3^e La komitatanoj kaj vickomitatanoj.

Ĉiu Delegito havas unu voĉon se estas en lia regiono de 20 ĝis 49 membroj ; du voĉojn se estas de 50 ĝis 99 membroj ; tri voĉojn se estas de 100 ĝis 149 membroj, k. t. p.

§ 52. — Estas submetataj al la ĝenerala voĉdono :

1^o Ĉiuj ŝanĝoj en la Statuto proponitaj de la Komitato ;

2^o Ĉiuj ĝeneralaj regularoj akceptitaj de la Komitato, se en tempolimo de 60 tagoj post ilia publikigo en la oficiala ĵurnalo de U. E. A., pli ol kvinono de la voĉdonrajtintoj ĝin skribe postulas ;

3^o Ĉiuj proponoj prezentitaj laŭ la iniciatraĵo, konforme al § 53.

§ 53. — Ĉiu Delegito aŭ Reprezentanto de faka societo havas iniciatraĵon : se li deziras proponi ĉu ŝanĝon aŭ aldonon en la Statuto aŭ en regularo, ĉu ellaboron de regularo pri difinita temo, li sendos sian proponon al la Direktoro de U. E. A., kiu ĝin presigos en la oficialan ĵurnalon. Se en tempolimo de 60 tagoj pli ol la kvinono de la voĉdonrajtintoj, aprobas la diritan proponon, ĝi estos submetata al la ĝenerala voĉdonado en tempolimo de du monatoj.

§ 54. — Propono aŭ baloto valoras se ĝi ricevis la voĉojn de pli ol la duono de voĉdonintoj. Ĉiuj voĉdonoj kaj balotoj estas sekretaj kaj korespondaj. La kontrolado de la voĉoj estos efektivigata ĉe la Centra Oficejo de U. E. A. antaŭ 5 membroj de la regiono kie sidas la Oficejo.

§ 55. — La balotado de la regionaj Delegitoj, distriktaj Delegitoj kaj Komitato okazos alterne ĉiujare dum monatoj septembro kaj oktobro.

§ 56. — Ĉiuj tempolimoj fiksataj en tiu ĉi statuto estas kalkulitaj por korespondajoj el Eŭropo. Por ekstereŭropaj landoj kaj lokoj kun speciale malfavoraj poŝtaj rilatoj, la Direktoro rajtas plilongigi la tempolimojn laŭ neceseo.

FINANCOJ

§ 57. — La enspezoj de U. E. A. konsistas el :

a) La kotizajoj de la diverskategoriaj membroj ;

b) La monhelpoj, donacoj, ktp. ;

c) La profitoj de la diversaj servoj, vendoj, ktp., farataj de U. E. A.

Por forigi eventualajn deficitojn kaj helpi al la starigo de novaj servoj, povas esti starigata garantia kapitalo, kies administrado estos fiksata per speciala regularo.

58. — En ĉiu regiono estas regiona kaso de U. E. A., kies enspezoj konsistas el :

a) La 1/10 de la kotizajoj de la Esperantiaj Entreprenoj de la regiono ;

b) Ĉiuj monhelpoj kaj donacoj formale difinitaj por la regiona kaso. La organizo kaj kontrolo de tiu regiona kaso estos fiksata per speciala regularo.

§ 59. — La regionaj Delegitoj ricevas por pagi siajn administrajn elspezojn :

1^o La 1/5 de la kotizajoj de la regionaj membroj = 20 Sd. ;

2^o La 1/10 de la kotizajoj de la Esperantiaj Entreprenoj de la regiono.

§ 60. — La buĝeto de la Asocio estos fiksata de la Komitato, laŭ la propono de la Direktoro kaj de la financa fakestro.

La financa jaro komenciĝas la 1^{an} de novembro.

§ 61. — La kontrolado de la kalkuloj estos farata ĉiujare, ĉe la Centra Oficejo de U. E. A., de du Delegitoj elektitaj de la Komitato.

La samaj kontrolantoj ne povas plenumi tiun oficon dum du sinsekvaj jaroj.

§ 62. — La membroj de U. E. A. ne estas persone respondaj por la ŝuldoj de la Asocio.

§ 63. — En okazo de finiĝo de la Asocio, la uzo de la restanta kapitalo estos decidata per ĝenerala voĉdono.

TABELO DE LA KOTIZAĴOJ

DIVIDO DE LA KOTIZAĴOJ	POR 1 JARO-					DUMVIVA	POR 30 JAROJ		
	Membro	Subtenanto (1)	Fakano (2)	Esperantia Entrepreno (3)			Membro	Esperantia Entrepreno (3)	
				4 —	2 40			100 —	50 —
Sumo sendota de la Delegito al la Centra Oficejo de U.E.A.	0 80	2 —	0 50	4 —	2 40	50 —	100 —	50 —	
Restas por la Delegito	0 20			0 50	0 30				
Restas por la Regiona Kaso				0 50	0 30				
Plena Sumo de la kotizaĵo en Sm.	1 —	2 —	0 50	5 —	3 —	50 —	100 —	50 —	

- (1) La kotizaĵo de la Subtenanto entenas la membran kotizaĵon.
 (2) Fakano devas, krom la faka kotizaĵo, pagi la membran kotizaĵon.
 (3) Maldekstre estas la ĝenerala kotizaĵo, dekstre tiu por la entreprenoj kun karaktero de Esperantista organizaĵo.

FINANCA REGULARO

La financa administrado de U. E. A. fariĝas laŭ § 57-63 de la statuto. La financa jaro komencas la 1^{an} de novembro ; la monsis-temo uzata en la librotenado estas tiu de ĝia oficiala sidejo, la svisa franko. La spesmilo estas kalkulata po 2,50 frankoj.

La Centra Kaso administras la monaferojn de U. E. A., la kasojn de la diversaj fakoj, la kason de la kongresoj U. E. A. kaj aliajn al ĝia prizorgo transdonitajn posedaĵojn.

La garantia kapitalo estos deponata en Kantonal Bank Bern (ŝtata banko) kaj de speciala komitato administrata.

La ĉefaj monataj spezoj kaj la jara bilanco kun la raporto de la kaskontrolantoj estas publikiĝataj en la oficiala organo ; la buĝetoj troviĝas en la kongresa raporto ; la kvaronjaraj bilancoj kiel aliaj detaloj estas submetataj al la komitatanoj, k. t. p., en « Financa kaj Statistika Informilo ».

Krom en Svisujo elpageblajn poŝtmandatojn la Centra Kaso akceptas la pagilojn de la Internacia Ĉekbanko en London laŭ surskribila spesmila valoro, ĉiujn en banko ŝanĝeblajn paperojn je la taga kurzo kaj la internaciajn respondkuponojn, valoro 25 centimoj.

Oni nepre *rifuzas poŝtmarkojn* kaj aliajn pagilojn ne destinatajn al eksterlanda uzado.

La Delegitoj bonvolu kalkuli la kotizaĵojn en sia nacia valoro je kurzo plej proksime rilatanta al 2,50 fr. = 1 Sm. kaj sendi al ni : por membro 2 fr. ; por subtenanto : 5 fr. ; por fakano : 1,25 fr. ; por entrepreno 10 aŭ 6 fr., ne deprenante la poŝtelspezojn.

La pagoj de la dumvivaj membroj kaj 30-jaraj entreprenoj por akiro de atestoj de l'garantia kapitalo estu senpere sendataj al la banko, kiu por ili kvitanco.

La kotizaĵoj de la membroj devas esti pagataj inter la 1^a novembro kaj la 1^a marto de ĉiu jaro ; dum la sama templimo la membroj ne intencantaj repagi informu pri tio sian Delegiton aŭ la Centran Kason. De la membroj kiuj nek pagis nek skribe ekŝiĝis oni postulos dum aprilo aŭ majo per avertilo la sumon de 3 fr. (1,20 Sm.) por kotizaĵo kaj kostoj. Personoj ne pagintaj unu monaton

post tiu averto estos forstrekataj. Simile oni procedos kun la entreprenoj. — Kotizajoj de novaj membroj povas ĉiam esti alsendataj; tiuj de septembro kaj oktobro valoras por la proksima jaro.

Ĉiu esperantiano rajtas havi specialan konton ĉe la Centra Kaso, kondiĉe ke estu en ĝi ĉiam minimuma aktiva soldo da 12,50 fr. (5 Sm.). La kontoj utilas por la diversaj pagoj al U. E. A., al la gazeto *Esperanto*, al la Esperantia Librejo kaj al transpagoj inter la kontuloj. Pro la ŝparo de poŝtpagoj kaj la facileco de l'transigo ili estas rekomendindaj al personoj havantaj multajn esperantiajn rilatojn.

Flanke de tiuj ĉi kontoj de U. E. A. kaj ne rilatante kun ili, restas la komercaj kontoj de Esperanto kaj de la Librejo kun siaj specialaj klientoj, kies kondiĉoj estas interkonsente fiksataj.

La stato de la privata kontaro kiel tiu de U. E. A. kaj de ĝia Garantia Kapitalo vidiĝas el la publikigitaj ciferoj.

La Delegitoj kaj membroj loĝantaj en Nord-Ameriko (Usono Kanado, Kuba, Meksikujo) bonvolu rilati pri ĉiuj administraj kaj financaj aferoj kun la *Nord-Amerika filio de la Centra Oficejo de U. E. A.* Adreso: Esperanto Office, Washington, D. C.

La Prezidanto U. E. A.,

H. BOLINGBROKE-MUDIE.

La Financa Faktestro,

Ed. STETTLER.

REGULARO PRI LA KOLEKTADO KAJ ADMINISTRADO DE LA GARANTIA KAPITALO DE U. E. A.

§ 1. — Por plifortigi sian financon kaj disvastigi sian laborokampon, U. E. A. starigas Garantian Kapitalon da dek mil Spesmiloj (du dek kvin mil frankoj)

§ 2. — La kapitalo estas dividata en du cent partoj po kvindek Sm. (125 frankoj) reprezentataj de atestoj kaj akireblaj po unu aŭ pluraj ekzempleroj de ĉiu persono aŭ organizaĵo deziranta subteni la celadon de U. E. A.

§ 3. — La Garantiantoj estas dumvivaj membroj de U. E. A., la garantiantaj organizaĵoj fariĝas tridekjaraj Esperantiaj Entreprenoj, laŭ § 7 de la Statuto de U. E. A. Ili rajtas privoĉdoni kaj kontroli la uzon de l'kapitalo, kaj ricevas senpage la oficialan organon de U. E. A. kiel ĉiujn aliajn presajojn. La organizaĵoj valorigas siajn rajtojn per unu de ili elektata reprezentanto.

§ 4. — La kapitalo kolektiĝas per promesiloj. Tiuj ĉi ne povas enhavi specialajn kondiĉojn. Ili fariĝas devigaj se ses monatojn post komenco de l'oficiala kolektado almenaŭ kvin mil Spesmiloj (dek du mil kvin cent frankoj) estas promesitaj. Oni avertos pri tio la garantiantojn, kiuj devos pagi la promesitan monon plej malfrue tri monatojn post tiu informo. Krom la provizora kaskvitaneo ili ricevos la korespondan nombron de numeritaj atestoj, kiuj portos la nomon de la garantiinta persono aŭ organizaĵo kaj la oficialajn subskribojn de U. E. A. La atestoj estas personaj. La kolekton de l'kapitalo oni daŭrigos ĝis ĉiuj atestoj estos akiritaj.

§ 5. — La Garantia Kapitalo konsistas el la pagitaj partoj, el la ĝisnuna rezerva kapitalo kaj el donacoj de minimume 50 Sm. al ĝi destinataj. Ĝi apartenas al U. E. A. sed estas speciale administrata.

§ 6. — La celo de l'garantia kapitalo estas: plifortigi la financon staton de U. E. A., subteni la regulan administradon kaj ebligi novajn laborojn kaj servojn por kiuj ne sufiĉas la kutimaj enspezoj. Tamen se la duono de la pagita kapitalo devis esti uzata nur por la regula administrado kaj se oni ne povis atingi, ke per plialtigo de l'kotizaĵo aŭ per aliaj regulaj enspezoj la Asocio subtenu sin mem, tiam la Garantiantoj rajtas decidi la reprenon de l'esto je la fino de l'financa jaro.

§ 7. — La garantiantoj rajtas: elekti la administrantaron de l'kapitalo, postuli voĉdonojn aŭ voĉdoni pri speciale gravaj aferoj, voĉdoni pri repreno laŭ § 6. Ĉiu pagita atesto donas unu voĉdonon (La elektoj kaj voĉdonoj fariĝas laŭ simpla plimulto, decido pri repreno de l'kapitalo bezonas du trionojn (rilate al la alvenintaj voĉdoniloj)). Povas postuli voĉdonadon la kvinono de la garantiantoj kaj la personoj aŭ organizaĵoj kune posedantaj la kvinonon de la atestoj. Se repreno de l'kapitalo estas decidita, oni unue egaligas ĉiujn pasivojn de U. E. A., dealkulas la monon gajnitan alie ol per pago de la garantiantoj, dividas la restantan kapitalon per la nombro de ĉiuj pagitaj atestoj kaj elpagas la sumojn. La partoj

de la mortintaj garantiantoj apartenas al U. E. A., kies financa fakestro ilin reprezentas. Okaze de dissolviĝo de U. E. A. la kapitalo estos redonata al la garantiantoj laŭ la supra kalkulmaniero. Post tridek jaroj la kapitalo fariĝas libera posedaĵo de U. E. A. kaj estos uzata laŭ la decidoj de ĝia Komitato.

§ 8. — La Administrantaro konsistas el tri garantiantoj, elektataj por tri jaroj kaj reelekteblaj. Konforme al la principoj de § 6 kaj la tuloj de l'garantiantoj ili decidas pri la monsumoj donotaj al la Centra Oficejo de U. E. A. kaj konservigas en banko, sub sia persona respondeco, la reston de l'kapitalo. Ili informas la Prezidanton de U. E. A. pri siaj decidoj, raportas ĉiujare al la Komitato kaj al la garantiantoj, sed ankaŭ havas la rajton kunlabori en la starigo de la kalkuloj, bilancoj kaj buĝetoj de l'Asocio.

§ 9. — Ŝanĝoj de tiu regularo devas esti akceptataj de du trionoj de la voĉdonintoj. Sen konsento de ĉiuj garantiantoj ne povas esti ŝanĝataj la specialaj rajtoj al ili rezervataj.

§ 10. — Oni ŝanĝos la Statuton de U. E. A. en tiu senco, ke sub rezervo de jam akiritaj rajtoj estas dumviva membro nur persono paginta almenaŭ unu ateston kaj tridekjara Esperantia Entrepreno nur la organizaĵoj pagitaj almenaŭ unu ateston se ili havas karakteron de Esperanta organizaĵo kaj du atestojn sen tio. Ĝis la Administrantaro estos laŭregule elektata de la garantiantoj, la Komitato de U. E. A. provizore elektos ĝin.

Regularo akceptita de la Komitato de U. E. A. — Oktobro 1912

La Prezidanto,

H. BÖLINGBROKE MUDIE.

La Financa Fakestro,

Ed. STETTLER.

REGULARO PRI LA SERVOJ DE U. E. A.

Informpetoj de membroj.

§ 1. — Ĉiu Esperantiano, Esperantia entrepreno kaj Esperantia asocio rajtas peti informojn, ĉu parolajn, ĉu skribajn, de la Delegitoj kaj Subdelegitoj de U. E. A. pri ĉiu ajn temo rilata al la agadkampo de U. E. A., en la limoj fiksataj de tiu regularo. La Esperantiaj asocioj kaj entreprenoj havas plie la rajton uzi servojn speciale starigitajn por ili kaj priskribitajn en la regularoj.

§ 2. — Ĉiu skriba informpeto devas esti precize formulita, subskribita per la nomo de la petinto kaj lia membronumero kaj redaktita per la oficiala lingvo de U. E. A.

§ 3. — Ĉiu skriba informpeto nepre devas esti akompanata per poŝtkarto aŭ poŝtkupono, egala je la valoro de la afranko por la petita respondo. Naciaj poŝtmarkoj estas akcepteblaj nur se ili estas plenvalore interŝanĝeblaj en la lando de l'respondonto.

§ 4. — La skribaj informpetoj estas komunikataj de la Delegito al la kompetenta konsulo, kiu ilin respondos kiel eble plej akurate. Se ne estas konsulo, la Delegito aŭ Subdelegito mem respondos.

Informpetoj de Esperantiaj entreprenoj.

§ 5. — Por la Esperantiaj asocioj kaj entreprenoj estas eldonataj specialaj pretaj demandfolioj, redaktataj Esperante kaj nacilingve. Nur asocioj entreprenoj, delegitoj, subdelegitoj kaj konsuloj rajtas uzi tiujn demandfoliojn.

§ 6. — La Esperantiaj entreprenoj kaj asocioj povas fari informpetojn ĉu senpere sin turnante al la Delegito de la regiono pri kiu ili deziras informojn, ĉu, se neniu ĉe ili scias la oficialan lingvon de U. E. A., uzante la perecon de la regiona Delegito por tradukigi kaj forsendigi la informpetojn.

§ 7. — Ĉiu Esperantia entrepreno, kiu uzos senpere la servojn de la Delegitoj skribos Esperante sian peton sur la demandfolion, kiun ĝi rekte sendos al la kompetenta Delegito, kun respondkarto aŭ respondkupono, laŭ § 3.

Demandfolioj.

§ 8. — Ĉiu Esperantia entrepreno, ĉe kiu neniu scias la oficialan lingvon de U. E. A. skribos nacilingve sian peton sur specialan demandfolion (kun klariga teksto en la nacia lingvo) kaj forsendos ĝin al la Delegito de sia regiono kun la sumo da 24 Sd. poŝtmarke aŭ mone, se la informo rilatas al eksterlando kaj 16 Sd., se ĝi rilatas al enlando.

§ 9. La Delegito tradukigos Esperanten la informpeton per la kompetenta faka konsulo kaj kun la originalo sendos ĝin al la Delegito de la koncernata regiono. Tiu Delegito uzos specialan respondfolion kaj en la regula tempolimo skribos Esperante la respondon al la petinta Delegito, kiu ĝin tradukigos nacilingven kaj kun la originalo sendos al la Esperantia entrepreno.

§ 10. — En la okazo montrita en § 9, la petanta Delegito povas pagi la respondon al la demandita Delegito, ĉu per poŝtmarko aŭ respondkupono ĉu per transpagilo de U. E. A., konforme al la speciala regularo pri ili.

§ 11. — Krom la okazo montrita en § 8, nur la oficiala lingvo de U. E. A. devas esti uzata por la Asociaj interrilatoj. Naciaj lingvoj estas uzablaj oficiale nur inter la regiona Delegito kaj la Esperantiaj entreprenoj. La aliĝiloj por la Esperantiaj entreprenoj, ĉe kiuj neniu scias la oficialan lingvon de U. E. A., estos redaktataj Esperante kaj nacilingve.

§ 12. — Provido da dek demandfolioj por Esperantiaj entreprenoj estos senpage sendata de la centra oficejo de U. E. A. al la Esperantiaj entreprenoj. Ĉiu plua kvanto da dek demandfolioj estos vendata je 20 Sd. po deko. Tiu sumo apartenas al la Delegito.

§ 13. — Ĉiu Esperantia entrepreno ricevas rajtigan karton subskribitan de la prezidanto de U. E. A. kaj de la regiona Delegito. La nomo de la Esperantiaj asocioj kaj entreprenoj aperas sur la oficiala ĵurnalo. Samtempe kun la rajtiga karto ĉiu entrepreno ricevos la provizon da demandfolioj priskribitan en § 12.

Juraj informpetoj.

§ 14. — Ĉiu Esperantia asocio kaj entrepreno, ĉiu Delegito kaj konsulo rajtas peti informojn pri demandoj juraj de ĝenerala intereso.

Ĉiuj juraj informpetoj estos senpere adresataj de la petanto al la centra oficejo de U. E. A. La Esperantiaj entreprenoj, ĉe kiuj neniu scias la oficialan lingvon de U. E. A. povas uzi la demandfoliojn kaj la perecon de la regiona delegito por tradukigo.

§ 15. — Al ĉiu jura informpeto la centra oficejo de U. E. A. tuj respondos per ricevatesto kaj la demandon transdonos al la kompetenta jura konsilanto, kies respondon ĝi poste komunikos al la petinto, ĉu senpere, ĉu per la regiona Delegito.

Korespondado de la Delegito.

§ 16. — La Delegitoj kaj Subdelegitoj devas konservi kaj klasigi ĉiujn informpetojn ricevatajn, kiuj estas je la dispono de la Komitato de U. E. A., en okazo de bezono; ili ankaŭ devas konservi kopion de ĉiuj respondoj sendataj de ili, en okazo de plendo.

Respondo al informpeto.

§ 17. — Ĉiu informpeto laŭregule sendita devas esti respondata maksimume kvin tagojn post la ricevo. En la okazo se informpeto postulus specialajn priserĉojn, kiuj daŭrus pli ol kvin tagojn post la ricevo, la Delegito aŭ konsulo devas en la supra tempolimo respondi al la petinto kiam, li povosfor sendi la definitivan respondon.

§ 18. — Ĉiu informpeto, kiu rilatus temon ekster la agadkampo de U. E. A., aŭ estus kontraŭa al la bonmoraj aŭ ne konforma al la regularoj aŭ redaktata en alia lingvo ol la oficiala lingvo de U. E. A. estos resendata al la petinto, kun la noto subskribita de la Delegito ke li devas respondi nenion, ĉar la informpeto estas nekonforma al la regularo. La informpetoj, ne akompanataj per marko, kupono aŭ transpagilo estos ne respondataj. Pri la informpetoj, al kiuj estas aldonita neŝufiĉa valoro por la respondo, la Delegito informu pri tio la petinton.

§ 19. — Estas malpermesate peti aŭ sendi konfidenciajn informojn pri iu ajn persono, aŭ firmo, pri ĝia stato financa, ĝia morala indeco, vivmaniero, pagokapablo, k. t. p.

§ 20. — Tuj kiam respondo estas sendita, finita estas la agado de la Delegito aŭ konsulo. Li povas nek pere nek senpere interhelpi la traktadon de la aferoj, kiujn li ebligis per sia pereco.

§ 21. — Estas malpermesate al la Delegitoj kaj konsuloj en siaj respondoj favori aŭ speciale rekomendi iun personon aŭ firmon,

escepte se ĝi apartenas al U. E. A., aŭ uzi sian Esperantian oficon por fari specialan reklamon, ĉu por si mem, ĉu por iu persono aŭ firmo

§ 22. — Ĉiu informpeto aŭ servo, kiu necesigas specialan elspezon aŭ klopodon devas esti repagata de la petinto. Tiuokaze, antaŭ ol plenumi la servon, la Delegito devas informi la petinton pri la kosto de la servo, sen persona procento aŭ maklero. La petinto devas forsendi la necesan sumon al la koncarnata Delegito, se li volas ricevi la servon. Tamen, la Delegito havas, sub sia respondebleco, la eblecon plenumi tiun servon antaŭ ol ricevi la koston kaj poste sendi la fakturon al la petinto. U. E. A. garantias la fakturojn al Esperantiaj Entreprenoj nur ĝis sumo da 1 Sm.

Servoj pri dungado, reprezentado, reklamoj, vojaĝo.

§ 23. — Ĉiu Delegito, kiu ricevos peton pri reprezentanto, pri dungoto, k t. p., ĝis speciala servo estos aranĝita, devos komuniki laŭeble tiun peton al la dungoficejo aŭ dunga institucio en sia regiono aŭ post interkonsento kun la petinto, li ankaŭ sen respondeco povos proponi taŭgajn personojn al la petinto.

§ 24. — Enketoj aŭ cirkuleroj presataj aŭ hektografataj, senditaj de Delegito, Esperantia asocio aŭ entrepreno, devas esti respondataj nur se ili estas akompanataj de pagilo por la respondo, laŭ § 3.

§ 25. — Informpetoj povas esti farataj nur de membroj, Esperantiaj asocioj kaj entreprenoj. Tamen, firmoj, institucioj aŭ personoj, ne apartenantaj al U. E. A., povos ricevi informon aŭ servon per ĝi. Tiuokaze ĉiu demandfolio por servo estos vendata al ĝi po 60 Sd. por eksterlando kaj 40 Sd. por enlando.

§ 26. — Esperantianoj vojaĝantaj, kiuj bezonas informpeton aŭ deziras renkontiĝi kun Delegito aŭ konsulo devas informi la Delegiton pri sia alveno almenaŭ 24 horojn antaŭe. Se li avertas lin pli malfrue li perdas la plendorajton.

§ 27. — En okazo de foresto, malsano aŭ okupateco la Vicdelegito anstataŭas la Delegiton laŭ la samaj kondiĉoj. Se ne estas Vicdelegito, la Delegito devas tamen zorgi, ke estu nenia interrompo en la servoj.

§ 28. — La Delegitoj kaj Konsuloj estas respondaj rilate al la Asocio nur pri la informoj, kiujn ili donas kaj la helpo, kiun ili liveras Ili havas la devon resti neŭtralaj kaj senpartiaj rilate al ĉiuj Esperantianoj, Esperantiaj asocioj kaj entreprenoj.

Rajtoj al plendo

§ 29. — Ĉiu Esperantiano, Esperantia asocio aŭ entrepreno, kiu farinte informpeton aŭ petinte servon konforme al la regularoj, aŭ ne ricevis respondon en la tempolimo fiksita de la regularo aŭ ricevis respondon en kiu la Delegito agas kontraŭ la regularoj, rajtas plendi al la komitato de U. E. A. Ĉiu plendo devas esti adreŝata al la centra oficejo de U. E. A., esti subskribita, citi la daton de la forsendo de l'informpeto kaj precize formuli la kaŭzon de l'plendo.

§ 30. — Ĉiu Delegito aŭ Konsulo, kontraŭ kiu estis ricevita plendo kiun enketo de la Administra fako pruvis prava, ricevos oficialan averton kaj estos citata sur la oficiala organo de U. E. A. Post du citoj en daŭro de 12 monatoj, li, konforme al la statuto, estos eksigata el sia posteno.

§ 31. — Ĉiu Delegito aŭ Konsulo rajtas plendi al la Komitato de U. E. A., en la okazo se membro aŭ Esperantia entrepreno agis kontraŭ la regularoj de U. E. A. Tiu plendo precize formulita estos komunikata al la centra oficejo de U. E. A.

§ 32. — Ĉiu entrepreno aŭ membro, kontraŭ kiu estis ricevita plendo kiun enketo de la Centra Oficejo pruvis prava, ricevos oficialan averton kaj estos citata sur la oficiala organo de U. E. A. Post du citoj en daŭro de 12 monatoj, la dirita entrepreno aŭ membro estos eksigata el la Asocio kaj ĝia nomo publikigata en la oficiala organo.

Regularo akceptita de la Komitato de U. E. A. Marto 1910.

La Prezidanto,
H. BOLINGBROKE-MUDIE

Por la Administra fako,
H. HODLER.

REGULARO PRI KONSULOJ

§ 1. — En ĉiu regiono, kie tio estas ebla, la Delegito elektas sub sia respondebleco diversfakajn helpantojn aŭ Konsulojn.

§ 2 — Ekzistas unu Konsulo por ĉiuj jenaj fakoj : komerco, turismo, laboro, junuloj, studentoj, virino (konsulino), maraferoj (en marhavenoj). Provizore la sama persono povas prizorgi pli ol unu fakon. La Vicedelegito, krom sia ofico, povas esti ankaŭ konsulo. En la regiono, kie ekzistas neniu konsulo, la Delegito mem plenumas ilian taskon.

§ 3. — La elekto de Konsulo fariĝas oficiala nur post komuniko de ĝi al la Centra Oficejo de U. E. A. kaj publikigo en la Oficiala ĵurnalo. Ĉiu Konsulo ricevas rajtigan karton kaj necesajn instrukciojn pri sia tasko.

§ 4. — La Konsuloj havas, rilate al la fako, por kiu ili estis komisiitaj, la devon respondi ĉiujn informpetojn faritajn en la kondiĉoj fiksitaj de la regularoj kaj plenumi ĉiujn instrukciojn, kiujn sendos al ili la Centra Oficejo de U. E. A.

§ 5. — La Konsuloj rilatas kun la membroj, Esperantiaj entreprenoj kaj asocioj kaj fakestroj de U. E. A. per la regiona Delegito, de kiu ili dependas kaj kontraŭ kiu ili estas respondaj.

§ 6. — Ĉiu Konsulo povas, por la plenumo de sia tasko, elekti ĉiujn helpantojn, kiujn li juĝas necesaj, kaj rilati kun ĉiuj eksteresperantiaj samfakaj aŭtoritatoj.

§ 7. — Ĉiu Konsulo havas la devon traduki en la oficialan lingvon de U. E. A. la kurantajn korespondaĵojn de la Esperantiaj entreprenoj de sia regiono, laŭ la Regularo pri informpetoj, sed ne la specialajn presadojn, kiel katalogojn, prezarojn, gvidlibrojn, k. t. p., kiujn tradukos la oficialaj tradukistoj de U. E. A.

§ 8. — La Konsuloj devas konservi kaj klasigi ĉiujn informpetojn ricevitaĵojn, kiuj estas je la dispono de la Centra Oficejo de U. E. A. en okazo de bezono. Ili ankaŭ devas konservi kopion de ĉiuj respondoj de ili sendataj en okazo de plendo. Ĉiujare tiuj korespon-

daĵoj estas transdonataj al la regiona Delegito kaj enmetataj en la regionajn Esperantiajn arkivojn.

Regularo akceptita de la Komitato de U. E. A. Septembro 1910.

La Prezidanto,

H. BOLINGBROKE-MUDIE.

Por la Administra fakoj :

H. HODLER.

REGULARO DE LA KONGRESOJ

§ 1. — La Kongreso de U. E. A. havas kiel celon :

a) La ekzamenadon de la morala kaj financa situacio de U. E. A. kaj ĝia agado dum la jaro ;

b) La esploradojn de la diversaj proponoj de la Komitato kaj de la membroj ;

c) Laŭ tiuj proponoj la fiksadon de la ĝenerala agado de Asocio dum la venonta jaro.

§ 2 — La Kongreso havas la jenajn rajtojn :

a) Ĝi aŭdas la raportojn de la Komitatoj pri ilia agado kaj esprimas sian aprobon aŭ malaprobon pri ili ;

b) Ĝi proponas la diversajn kotizaĵojn por la venonta jaro. Tiuj proponoj estas poste submetataj al la laŭstatuta voĉdonado de ĉiuj Delegitoj.

c) Ĝi ekzamenas la proponojn prezentitajn de la komitato aŭ de la membroj en la maniero sube dirita kaj voĉdonas pri ĉiu el ili motivitan deziresprimon, ĉu por malakcepti la proponon, ĉu por ĝin resendi al la komitato, ke ĝi efektive ĝin dum la venonta jaro.

§ 3. — Estas kongresano ĉiu Esperantiano, kiu pagis la kongreskotizaĵon, difinitan de la Komitato. Tiu kotizaĵo ne povas superi 3 Sm. Ĉiu kongresano havas la rajton partopreni en la kunvenoj, voĉdoni kaj senpage ricevi la kongresdokumentojn.

§ 4. — Havas la rajton prezenti proponon al la kongreso ĉiu Esperantiano, membro aŭ Delegito, ĉiu Esperantia entrepreno aŭ asocio (per Esperantiano rajtigita de ĝi), ĉiu komitatano aŭ la Komitato mem, sub la jenaj kondiĉoj.

Ĉiu propono devos konsisti el raporto de 2,000 vortoj maksimume. Tiu raporto klarigos la staton de la demando, formulos la proponon kun la necesaj praktikaj detaloj kaj finiĝos per deziresprimo pri kiu voĉdonos la Kongreso.

§ 5. — Ĉiu propono, subskribita de la proponinto, estos komunikata al la Centra Oficejo de U. E. A., almenaŭ 60 tagojn antaŭ la malfermo de la Kongreso. Preter tiu tempolimo nenia propono povos esti submetata al la Kongreso.

§ 6. — Ĉiu propono, kiu aŭ ne konformiĝus al la supre ditaj kondiĉoj aŭ estus redaktata en alia lingvo ol la oficiala lingvo de U. E. A. aŭ estus kontraŭa al la celo de U. E. A. kiel ĝin fiksas § 1 de la Statuto, estos resendata de la Centra Oficejo de U. E. A. al ĝia aŭtoro.

§ 7. — Ĉiuj proponoj ricevitaĵ estas anoncataj kaj resumataj en la oficiala ĵurnalo de U. E. A. almenaŭ 40 tagojn antaŭ la malfermo de la Kongreso. Ili estos ankaŭ citataj sur la labora programo de la Kongreso.

§ 8. — Ĉiu ricevita propono estos submetata al la antaŭa esplorado de la Komisiono, kiun ĝi koncernas. Post tiu esplorado la kompetenta Komitatano verkos raporton, en kiu li resumos la proponon faritan kaj la rezultatojn de la esplorado de la komisiono kaj formulos deziresprimon, kiu konkludos aŭ per akcepto de la propono aŭ per ĝia modifo aŭ per ĝia malakcepto. La aŭtoro de propono ĉiam havos la rajton legi aŭ legigi sian propran raporton, se li tion deziras.

§ 9. — Al la proponoj de la Komitatanoj estos aplikataj la samaj reguloj. Ĉiu Komitatano devas formale deklari en la raporto, ĉu propono estas farata en lia propra nomo aŭ en la nomo de la Komitato. Tiu lasta kondiĉo estas plenumata nur se la Komitato antaŭe aprobis la proponon kaj la rilatan deziresprimon.

§ 10. — Post ĉiu raporto la diskutado estos malfermata. Ĝi unue celas la principon de la propono kaj poste la formon de la deziresprimo rilata al tiu propono. Ĉiu povos prezenti modifon dum la diskutado. Tiu modifo estos skribe komunikata al la prezidanto. La Kongreso voĉdonos pri ĝi antaŭ la ĉefa propono.

§ 11. — La kunvenoj estas prezidataj de la prezidanto de U. E. A. La administra fako zorgas pri havigo de la necesaj sekretarioj, kun la aprobo de la Kongreso.

§ 12. — La definitiva tagordo de la kunvenoj devas esti presita almenaŭ 10 tagojn antaŭ la Kongreso. La Kongreso rajtos ŝanĝi

laŭbezone la vicon de la traktotaĵoj aŭ ilin resendi al venonta kongreso, en okazo de tempomanko.

§ 13. — Ĉe la diskutoj la oratoroj parolas laŭ la vico de sia enskribiĝo ĉe la prezidanto; en okazo de kontestaĵo pri la diskutmaniero la prezidanto konsultas la Kongreson, kiu decidas.

§ 14. — Pri la sama temo neniu povas paroli pli ol 10 minutojn kaj unu fojon, sen la permeso de la kongreso. Tiu limigo koncernas nek la komitatanojn, nek la aŭtorojn de la proponoj aŭ ilian reprezentanton.

§ 15. — La voĉdonoj estas farataj per levado de la manoj. La voĉoj estas laŭbezone kalkulataj de la prezidanto.

§ 16. — Post ĉiu kunveno estas farata protokolo kiu estas legata en la venonta kunveno kaj submetata al la aprobo de la Kongreso.

§ 17. — Post la Kongreso ĉiuj oficialaj aktoj, raporto, protokoloj kaj aliaj informoj estas publikigataj kaj sendataj al ĉiuj kongresanoj. La protokoloj ankaŭ aperas en la oficiala ĵurnalo.

§ 18. — La kunvenoj de la Kongreso estas publikaj, escepte se la Kongreso formale decidas la malon.

§ 19. — La loko de la Kongreso estas fiksata de la Komitato laŭ la propono de la lasta kongreso. Se la disvastiĝo de la Asocio tion postulas, Kongreso de U. E. A. povos esti eventuale aranĝata en ĉiu kontinento. Tiukaze la rajtoj de la Kongresoj estas egalaj kaj la supraj reguloj estas aplikeblaj al ĉiuj.

§ 20. — La labora aranĝo de la kongreso estas prizorgata de la Administra fako, sub la kontrolo de la Komitato. La lokaj aranĝoj estos prizorgataj de komisiono elektota de la Administra fako inter la Esperantianoj de la regiono, kie okazos la Kongreso.

§ 21. — La elspezoj por la publikigado de la kongresaj aranĝoj estas repagataj per la kongreskotizaĵoj kaj la donacoj. Por ĉiu kongreso povos esti eldonataj helpkongresaj kartoĵ por la personoj, kiuj ne ĉeestas en la kongreso, sed deziras ricevi ĝiajn dokumentojn.

§ 22. — En okazo de profito el la kongresaj spezoj almenaŭ duono estos difinata por speciala kongresfondaĵo.

Regularo akceptita de la Komitato de U. E. A. Majo 1910.

La Prezidanto de U. E. A.

R. BOLINGBROKE-MUDIE.

Por la Administra Fako,

H. HODLER, komitatano.

FAKAJ ASOCIOJ

REGULARO DE LA UNIVERSALA INTERŜANGA ASOCIO (*Interŝanga Fako*).

§ 1. — Estas kreita interne de U. E. A. sub la nomo « Interŝanga Fako » speciala servo, kiu celas la interŝanĝadon de korespondajtoj ilustritaj poŝtkartoj kaj de aliaj objektoj, kiel poŝtmarkoj, fotografajoj, k. t. p.

§ 2. — Povas partopreni en tiu servo ĉiu Esperantiano, kiu akceptas la jenan regularon kaj pagas specialan kotizajon da 50 Sd. jare. La membroj estas varbataj ĉu senpere, ĉu de la Delegitoj.

§ 3. — La fako estas direktata de Fakestro, elektita de la komitato de U. E. A., konforme al § 45 de la Statuto. Li zorgas pri gvidado de la fako kaj redaktado de la Bulteno. Li estas responda antaŭ la Direktoro de U. E. A.

§ 4. — La listo de la membroj de la Interŝanga Fako estas publikigata en speciala Bulteno, aperanta plurfoje dum la jaro kaj sendata al ĉiuj membroj. La Bulteno enhavas ĉiujn informojn pri la agado de la fako, kies oficiala organo ĝi estas.

§ 5. — Ĉe sia aliĝo la membro komunikas sur speciala formulo ĉiujn necesajn informojn pri la objekto de sia interŝanĝado, kun sia aĝo, profesio, adreso, k. t. p. Li subskribos la promeson respondi almenaŭ unufoje ĉiun peton, sendotan al li de samfakano, kaj rilatan al la sama objekto, korespondi Esperante kaj, en okazo de specialaj interŝanĝoj, ilin plenumi konforme al la interkonsento farita.

§ 6. — Ĉiu membro, kiu ricevas peton de alia fakano, konforman al la regularo kaj celantan la objekton, pri kiu li volas interrilati (laŭ la informo liverita en la Bulteno), havas la devon respondi ne pli malfrue ol dum dek tagoj post la ricevo. Li rajtas rifuzi interrilaton, sed kondiĉe ke li respondu almenaŭ unufoje la petinton.

§ 7. — Ĉiu membro, kiu ne konformiĝas al la antaŭaj reguloj kaj pri kiu plendo estis alsendita, ricevos rememorigan avizon de la fakestro. Se li ne respondas, li estos citata sur la faka Bulteno. Tri citoj en la daŭro de sama jaro kaŭzas eksigon.

La eksigoj kaj eksigoj aperas en la Bulteno. La membroj estas ĉiam citataj per sia orda numero.

§ 8. — En la okazo de eksigo aŭ eksigo la kotizaĵo ne estas repagata.

§ 9. — La jaro komenciĝas la 1^a de novembro. La personoj aliĝantaj post la 1^a de septembro estos konsiderataj kiel membroj, ĝis la 1^a de novembro de la venonta jaro.

§ 10. — La fako estas kontrolata de la Centra Oficejo de U. E. A., kiu ankaŭ prizorgas la ĝeneralan administradon kaj financon laboron. La memstara faka kaso, el kies kotizaĵoj kaj donacoj, oni elpagas ĉiujn elspezojn por la fako, estas prizorgata de la Centra Kaso de U. E. A.

Regularo akceptita de la Komitato de U. E. A. Oktobro 1911.

La Prezidanto,

H. BOLINGBROKE-MUDIE.

La Direktoro,

H. HODLER.

REGULARO DE LA UNIVERSALA LABORISTA ASOCIO (*Laborista Fako*).

§ 1. — Estas kreita interne de U. E. A., sub la nomo *Universala Laborista Asocio* (Fako de U. E. A.) speciala sekcio, kun celo :

a) Plifaciligĝi kaj plimultigi la rilatojn inter la ĉiulandaj Esperantianaj laboristoj.

b) Studi ĉiujn demandojn, kiuj rilatas al la starigo de praktikaj servoj por ĉiulandaj laboristoj.

c) Propagandi U. E. A. kaj Esperantismon ĉe la laboristoj kaj la laboristaj institucioj.

§ 2. — Estas membro de tiu fako ĉiu persono-paginta la kotizaĵon de U. E. A. por la kuranta jaro, kaj specialan kotizaĵon da 50 Sd. jare.

§ 3. — La fako estas direktata de Fakestro, elektata de la Komitato de U. E. A., konforme al § 45 de la Statuto. Li zorgas pri gvidado de la fako, kaj redaktado de la Laborista Bulteno.

§ 4. — La Fakestro estas helpata de Komisiono konsistanta el 5 ĝis 9 membroj elektataj de la membroj por 3 jaroj, kaj prezidata de la Fakestro.

§ 5. — La Komisiono studas ĉiujn demandojn, rilatajn al la agado de la fako, novaj servoj por laboristoj, propagando, k. t. p. Ĝiaj decidoj devas esti sankciataj de la Komitato de U. E. A.

§ 6. — La fako havas kiel oficialan organon, specialan Laboristan Bultenon, kiu enhavas la liston de la membroj, kaj pritraktas ĉiujn demandojn kiuj koncernas la agadon de la fako.]

§ 7. — La fako estas kontrolata de la Centra Oficejo de U. E. A., kiu ankaŭ prizorgas la ĝeneralan administradon kaj financon laboron. La memstara faka kaso, el kies kotizajoj kaj donacoj, oni elpagas ĉiujn elspezojn por la fako, estas prizorgata de la Centra Kaso de U. E. A.

Regularo akceptita de la Komitato de U. E. A. Oktobro 1911.

La Prezidanto,

H. BOLINGBROKE-MUDIE.

La Direktoro,

H. HODLER.

REGULARO DE LA UNIVERSALA VIRINA ASOCIO

(*Virina Fako*),

§ 1. — Estas kreita interne de U. E. A. sub la nomo *Universala Virina Asocio* (Fako de U. E. A.) speciala sekcio, kiu celas :

a) Plifaciligi kaj plimultigi la rilatojn inter la ĉiulandaj Esperantianoj.

b) Studi ĉiujn demandojn kaj helpi ĉiujn entreprenojn, kiuj celas la plibonigon de la socia stato de la virinoj.

c) Propagandi U. E. A. kaj Esperantismon ĉe la virinoj kaj virinaj institucioj.

§ 2. — Estas membro de tiu fako ĉiu persono paginta la kotizajon de U. E. A. por la kuranta jaro, kaj specialan kotizajon da 50 Sd. jare. Viroj ankaŭ povas esti akceptataj kiel aprobantoj.

§ 3. — La fako estas direktata de Fakestrino, elektata de la Komitato de U. E. A. konforme al § 45 de la Statuto. Li zorgas pri la gvidado de la fako, kaj redaktado de la Virina Bulteno.

§ 4. — La Fakestrino estas helpata de Komisiono, konsistanta el 5 ĝis 9 membroj elektataj de la membrinoj por 3 jaroj, kaj prezidata de la Fakestrino.

§ 5. — La Komisiono studas ĉiujn demandojn rilatajn al la agado de la fako, novaj servoj por virinoj, propagando, k. t. p. Ĝiaj decidoj devas esti sankciataj de la Komitato de U. E. A.

§ 6. — La fako havas kiel oficialan organon specialan Virinan Bultenon, kiu enhavas la liston de la membrinoj, kaj pritraktas ĉiujn demandojn kiuj koncernas la agadon de la fako.

§ 7. — La fako estas kontrolata de la Centra Oficejo de U. E. A., kiu ankaŭ prizorgas la ĝeneralan administradon kaj financon laboron. La memstara faka kaso, el kies kotizajoj kaj donacoj, oni elpagas ĉiujn elspezojn por la fako, estas prizorgata de la Centra Kaso de U. E. A.

Regularo akceptita de la Komitato de U. E. A. Oktobro 1911.

La Prezidanto,

H. BOLINGBROKE-MUDIE.

La Direktoro,

H. HODLER.

REGULARO DE LA UNIVERSALA STUDENTA ASOCIO

(*Studenta Fako*).

§ 1. — Estas kreita interne de U. E. A. sub la nomo *Universala Studenta Asocio* (Fako de U. E. A.) speciala sekcio, kun celo :

a. Plifaciligi kaj plimultigi la rilatojn inter la ĉiulandaj Studentoj.

b. Studi ĉiujn demandojn, kiuj rilatas al la starigo de praktikaj servoj por ĉiulandaj studentoj.

c. Propagandi U. E. A. kaj Esperantismon ĉe la studentaro.

§ 2. — Estas membro de tiu fako ĉiu persono paginta la kotizajon de U. E. A. por la kuranta jaro, kaj specialan kotizajon da 50 Sd. jare.

§ 3. — La fako estas direktata de Fakestro, elektata de la Komitato de U. E. A., konforme al § 45 de la Statuto. Li zorgas pri gvidado de la fako, kaj redaktado de la Studenta Bulteno.

§ 4. — La Fakestro estas helpata de Komisiono konsistanta el 5 ĝis 9 membroj elektataj de la membroj por 3 jaroj, kaj prezidata de la Fakestro.

§ 5. — La Komisiono studas ĉiujn demandojn, rilatajn al la agado de la fako, novaj servoj por Studentoj, propagando, k. t. p. Ĝiaj decidoj devas esti sankeciataj de la Komitato de U. E. A.

§ 6. — La fako havas kiel oficialan organon, specialan studentan bultenon, kiu enhavas la liston de la membroj, kaj pritraktas ĉiujn demandojn kiuj koncernas la agadon de la fako.

§ 7. — La fako estas kontrolata de la Centra Oficejo de U. E. A., kiu ankaŭ prizorgas la ĝeneralan administradon kaj financon laboron. La memstara faka kaso, el kies kotizajoj kaj donacoj, oni elpagas ĉiujn elspezojn por la fako, estas prizorgata de la Centra Kaso de U. E. A.

Regularo akceptita de la Komitato de U. E. A. Septembro 1912.

La Prezidanto,

H. BOLINGBROKE-MUDIE.

La Direktoro,

H. HODLER.

IV^a PARTO

CENTRA ORGANIZO DE U. E. A.

Honora membraro.

D^{ro} Ludoviko-Lazaro ZAMENHOF, aŭtoro de Esperanto; *Honora Prezidanto.*

S^{ro} E. BOIRAC, prezidanto de la Esperantista Akademio kaj de la Esperantista Lingva Komitato; prezidinto de la 1^a Esperantista Kongreso; rektoro de la Dijona Akademio.

S^{ro} Lucien CORNET, membro de la Franca Senato.

S^{ro} Justin GODART, deputato ĉe la Franca Parlamento.

Sir Antony IRAILL, LL. D. MD., Estro de la Universitato de Dublin (Irlando).

D^{ro} MYBS, honora prezidanto de la Germana Esperantista Asocio; prezidanto de la Hamburga Grupo Esperantista; prezidinto de la IV^a Esperantista Kongreso.

Kolonelo J. POLLEN, honora prezidanto de la Brita Esperanto-Asocio; prezidinto de la III^a Esperantista Kongreso.

Generalo SEBERT, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Esperantistaj Kongresoj; prezidinto de la Esperantista Scienca Asocio; membro de la Franca Instituto.

Sir VEZEY STRONG, Eks.-Urbestro de Londono.

Sir Joseph WARD, ĉefministro de Nov-Zelando.

Komitato.

Prezidanto :

H. BOLINGBROKE-MUDIE (Viceprezidinto de la III^a Esperantista Kongreso kaj de la konstanta Komitato de la Esperantistaj Kongresoj; prezidanto de la Brita Esperanto-Asocio kaj prezidanto de la Londona Esperantista Federacio; membro de la Lingva Komitato). *Adr.*: 77, Kensington Garden Square, London-W. C.

Vicprezidanto :

TH. ROUSSEAU (Iniciatinto de la Esperanto-Oficejoj ; kunfondinto de U. E. A. ; Distrikta Delegito por Burgonjo ; redaktoro ĉe *Esperanto*).
Adr. : 37, rue Jean-Baptiste-Baudin, *Dijon* (Francujo).

Membroj :

P. BLAISE (Distrikta Delegito por Londono). *Adr.* : 3, Lynette Avenue, Clapham Common, *London*.

A. CARLES (Iniciatinto de la Esperanto-Konsuloj ; Distrikta Delegito por Suda Francujo). *Adr.* : 84, allées Paul-Biquet, *Béziers* (Francujo).

P. LINARES (Distrikta Delegito por Suda Hispanujo). *Adr.* : H^o San Basilio, *Cordoba* (Hispanujo).

ED. PRIVAT (Fondinto de *Juna Esperantisto* ; direktoro de la Internacia Instituto de Esperanto ; membro de la Lingva Komitato). *Adr.* : Bedales, *Petersfield*, Hants. (Anglujo).

F. ROCKMANN (Konsilaro de la Germana Esperantista Asocio ; Distrikta Delegito por Centra Germanujo). *Adr.* : Klewitzstr., 12, *Magdeburg* (Germanujo).

J. SCHMID (Sekretario de la Svisa Esperanta Societo ; membro de la Lingva Komitato ; Distrikta Delegito por Svisujo). *Adr.* : Handelsdepartement, Bundeshaus, *Bern* (Svisujo).

S. SZABUNIEVICZ (Distrikta Delegito por Centra Rusujo). *Adr.* : Krivokolennij pereulok, dom. de Sytov, *Moskvo* (Rusujo).

Vickomitatano.

D^{ro} STROMBOLI. *Adr.* : via Gropallo, 3, int. 4, scala 2, *Genova* (Italujo).

Centra Oficejo de U. E. A.

Sidejo : 10, rue de la Bourse, *Genève* (Svisujo).

Telefono : 25-98

Direktoro :

H. HODLER (Direktoro de *Esperanto*, sekretario de la II^a Esperantista Kongreso ; kunfondinto de U. E. A.). Administra fako kaj aliaj fakoj (laŭ § 43).

Vicdirektoro :

ED. STETTLER (Financa fako (laŭ § 44, 45)). *Adr.* : 16, Bundesgasse, *Bern*.

Oficistaro :

Ĝenerala sekretario : FR. FLECK.

Centra kasisto : F. LUCAS.

Redakcia sekretario : ED. BOUVIER.

Aliaj oficistoj : J. SPILLER, W. GÜRGES.

La oficejo estas vizitebla ĉiutage, krom dimanĉe, de 9 h. ĝis 12 h. kaj 2 ĝis 5 h.

Sekretario por Londono : H.-A. EPSTEIN, Ĉefdelegito.

Nord-Amerika filio.

Esperanto-Office. Washington, D. C.

Sekretario : ERWIN REED.

Nord-Amerika Komisiono : D.-E. PARRISH (Los Angeles) ;

E. REED (Washington), C.-H. FESSENDEN (Boston) ; ALEMAN

RUIZ (Habana), E. WILSON (Québec).

FAKAJ ASOCIOJ

Universala Interŝanĝa Asocio.

Fakestro :

M. LÉVY (Del. S^a Mihiel), redaktoro de la *Interŝanĝa Bulteno*. *Adr.* : Saint-Mihiel (Meuse, Francujo).

Universala Laborista Asocio.

Fakestro :

Ed. PARKER (Del. Holmfirth). *Adr.* : 15, Wellington Crescent, Shipley (Anglujo).

Laborista komisiono :

L. CARLOS (Parizo). — H. MANGELSDORF (Magdeburg). — E. SOUCHAY (konsulo Parizo). — B. TUGARINOV (konsulo Moskvo). — F. WATTERS (London).

Universala Studenta Asocio.

Fakestro :

J. MAREŠ, (redaktoro de la *Studenta Bulteno*). *Adr.* : Luhačovice (Moravio, Aŭstrio).

Studenta komisiono :

H. CHRISTALLER (Stuttgart). — K. FRÖDING (Rockford). — I.-H. KRESTANOF (Sofia). — J. LITAUER (Varsovio). — J. VALETTE (Toulouse).

Universala Virina Asocio.

Fakestrino :

S. LEGRELLE DE FERRER. *Adr.* : Chateau Rayet, Falicon apud Nice (Alpes-Mar., Francujo).

Virina komisiono :

S^{ino} P. BLAISE (Londono). — F^{ino} A. CAUVIN (Nice). — S^{ino} DION-
TROUILLON (Parizo). — S^{ino} M. HANKEL (Dresdeno). — F^{ino} HERZOG
(Davas). — F^{ino} K. JAHNS (Braunschweig). — F^{ino} C. ROYER
(Parizo).

JURA KONSILANTARO.

La *Jura Konsilantaro* havas la taskon liveri ĉu al la Asocio, ĉu al la Esperantiaj Entreprenoj, jurajn konsilojn, ĉu pri demando interesanta la tutan Asociacion, ĉu okaze de malkonsentoj okazantaj inter Esperantianoj, ĉu okaze de malkonsentoj okazantaj inter la Komitato kaj Esperantianoj aŭ Esperantiaj Entreprenoj.

La Jura Konsilantaro de U. E. A. ĝis nun konsistas jene :

- D^o A. ALEMAN RUIZ, por *Cubo* (Habana, Kubo).
- W.-E. BAFF, por *Usono* (New-York, Usono).
- H. BRUNET, por *Belgujo* (Bruxelles, Belgujo).
- P. DEGON, por *Francujo* (Douai, Francujo).
- R. VON DUNIECKI, por *Aŭstrio* (Wien, Aŭstrio).
- J. ELLIS, por *Anglujo* (Keighley, Anglujo).
- J. GARZON RUIZ, por *Hispanujo* (Cadiz, Hispanujo).
- D^o ORTHAL, por *Germanujo* (Nürnberg, Germanujo).
- W. PAGE, por *Skotlando* (Edinburgh, Skotlando).
- Ed. STETTLER, por *Svisujo* (Bern, Svisujo).
- AL. TEODORESCU, por *Rumanujo* (Bucaresti, Rumanujo).

DUMVIVAJ MEMBROJ

S^{roj} J.-A. ARAKELOV (Lozovaja) ; BÜNEMAN (Patras) ; CAMES-
CASSE (Paris) ; DAINELLI (Genova) ; E. FASCE (Genova) ;
A. FIŠER (Tiflis) ; Fr. FLECK (Genève) ; J. FORESTIER (Genève) ;
F.-W. HIPSLEY (Birmingham) ; H. LEWIS (Gawler) ; P. LINARES
(Cordoba) ; MANGELSDORF (Magdeburg) ; MARTINET (Paris) ;
S^{ino} MILSON (Genève) ; H.-B. MUDIE (London) ; PRIESTMAN
(Bradford) ; Th. ROUSSEAU (Dijon) ; S. SCHULZ (Lodz) ; SHARPE
(Torquay) ; P. STOJAN (Peterburgo) ; STROMBOLI (Genova) ;
R. VAUGHAN (Totok).

SUBTENANTAJ MEMBROJ (1)

AAE (Horsens) ; U. ALEKSANDROV (Moskvo) ; M. AVERIN (Moskvo) ;
J. BETTGES (Essen-Ruhr) ; L. BLAZOWSKA (Krakow) ; O. BUJWID
(Krakow) ; M. BULOČKIN (Moskvo) ; H. CHAVES (Rio-de-Janeiro) ;
Th. CHRISTEN (Bern) ; M. CARY (Schaller) ; C. COTELO (Monte-
video) ; J.-F. DINSLAGE (Th. Orchard) ; H. DION-TROUILLON
(Paris) ; W. DISTELKAMP (Essen-Ruhr) ; LE DOUGOU (Cherbourg) ;
E. EHRIKKE (Essen-Ruhr) ; H. EICHELHARDT (Essen-Ruhr) ;
G. ENZIGER (Duisburg) ; J.-J. ETHELLES (Poole) ; FAIRMAN (London) ;
A. FANZERES (Rio-de-Janeiro) ; M. FERNANDEZ (Montevideo) ;
J.-F. FERNANDEZ (Matanzas) ; A. FIŠER (Tiflis) ; H. FONOLLA (Auto-
fagasta) ; R. FRIDRICH (Prostejov) ; L. FUHRMANN (Düsseldorf) ;
O. GABRICK (Moskvo) ; O. GARCIN (Castelblanc) ; J.-M. GELDER
(Halifax) ; T. GRAHAME-BAILEY (Calcutta) ; H. GRIEMAN (Rostov-
Don) ; L. GRIEVE (Stirling) ; EL.-M. GRINEVA (St-Peterburgo) ;
J. GUETROZ (Rio-de-Janeiro) ; H. HALL (Aggelby) ; J.-E. HAMAND
(Schaller) ; S.-H. HEATON-RUDOLF (St-Gravenhage) ; W. HÜTT-
MANN (Borbeck) ; M. JANNASCH (Leipzig-Reudnitz) ; R.-V. YDOYAGA
(Montevideo) ; J.-R.-P. YNNOCENCIO (Rio-de-Janeiro) ; N. IVANOV-
BRUNO (St-Peterburg) ; NIKE-KABANOV (Moskvo) ; L. KAERTEL
(Leipzig) ; O. KISCHKE (Essen-Ruhr) ; A. KOŬ (Varsovio) ;
H. KOLLERT (Tiflis) ; N. KORZLINSKI (Moskvo) ; B. KOTZIN (Moskvo) ;
N. KOTZIN (Moskvo) ; A. KRAJEWSKI (Zabor) ; J. KWOLECK (Dobromil) ;
L. LAMANT (Limoges) ; A. LLINAS (Barcelona) ; A. LOCHHEAD

(1) De post la 15 decembro 1911. La 1^a listo aperis en la Jarlibro de 1912, paĝo 62.

(Halifax); R. LORENCSON (Peterburgo); V. LUDVIK (Vieno); CH. MAC KINNON (Invercargill); M. MAILLART (Genève); ED. MALLET (Genève); G. MANSFELD (Mersenburg); M. MARANHAO (Pernambuco); M. MARSEILLE (Paris); MARTIN (Nice); F. MATHIEUX (Bruselo); A. MELLO (Rio-de-Janeiro); C.-S. MIDDLEMISS (Calcutta); R. DE SAN MILLAN (Madrid); AL. MILSON (Genève); N. MOESGAARD (Køge); B. DE MORAES (Rio de Janeiro); C.-CH. MÜLLER (Joinville); A. NIEDZWIEDSKI (Minsk); E. NIKOLAŪ (Bukarest); A. NONIN (Châtillon); C.-A. OLIVEIRA (Rio-de-Janeiro); D.-E. PARRISH (Los Angeles); R. PEIFFERKORN (Rio-de-Janeiro); F. PILLATH (Essen-Ruhr); W. PITT (Bath); P. PROCTOR (Brisbane); J. RADVANYI (Gyulafehérvár); RADZIMINSKI (Zaporojje Kamienskoje); Z. RANIECKI (Kobierzyn); S.-F. REŖKO (Lublin); RICHARDSON (Bruselo); R. ROBERTSON (London); F.-W. ROHDEN (Essen-Ruhr); A. ROSS (London); H. RUDNICKA (Krakova); ST. RUDNICKI (Krakow); G.-V. RUDOLPH (Hartford); M. SANCHEZ (Valencia); J.-J. SARAIVA JUNIOR (Rio-de-Janeiro); S. SAZY (Rabat); C. SCHENK (Rolle); W. SCHMITZ (Alavena); N. SEJERMANN (Lubotin); A. SMIRNOVA (Moskvo); A. SMITH (Invercargill); J. SMOLNICKA (Czudec); FR. SÓUBRANNE (Tulle); ED. STETTLER (Bern); C.-G. STERKENBURG (Groenlo); F.-J. STRONG (Coventry); A. STUPIN (Moskvo); ST. SZABUNIEWICZ (Moskvo); J. SZUREK (Laczi); A. ŖARAPOVA (Moskvo); K. ŖIDLOVSKIJ (Moskvo); M. ŖIDLOVSKAJA (PriŖkino); F.-E. THIERACK (S.-Leo poldo); TIARD (Paris); J. TOSTA (Rio-de-Janeiro); L. DAS TRINAS (Lubotin); C. VELLOZO (Rio-de-Janeiro); A. VIEIRA DE SOUZA (S.-Paulo); G. WARTMANN (Genève); E. WEBBER (Invercargill); E. WENGLER (Essen-Ruhr); A. WESTERMANN (Jurjevskij-Zavod); J. WILSON (Leck).

Por la jaro 1913 (1) :

E. ANDREWS (Coltherstone); A.-J. ASHLEY (Cannock); CH. DURIS (Limoges); N. EVSTIFEIEF (Peterburgo); O. GABRIK (Moskvo); A. GIRAUD (Marseille); R. HILDING (Hartford); L. ILLAŖEVIĆ (Kiev); IV. JEGALKIN (Moskvo); M. KOSTIN (Kamenij Rybolov); J. KUCZEWSKA (Libau); LÉCORCHÉ (Romilly-sur-Seine); JOS. MATTES (Bradford); M. NOVAKOVA (Vladivostok); W.-W. PADFIELD (Bath); A. PAGIREV (Kamenij Ribolov); ABATO REQUIN (Draguignan); A. RUSIECKI (Kiev); A. SJANICKIJ (Pliski); A. SIMOV (Moskvo); V. SMITH (Cromer); R. ŖEITMANN (Vladivostok); A. ZAJEW (Peterburgo).

DISTRIKTA ORGANIZO

Distriktaj Delegitoj.

Pri la tasko de la Distrikta Delegito, vidu § 26, 27 de la Statuto.

Listo de la Distriktaj Delegitoj je 1^a januaro 1913.

EŬROPO

<i>Distrikto.</i>	<i>Delegito.</i>	<i>Adreso.</i>
Aŭstrio-Hungario :		
<i>Adriatiko.</i>	D ^{ro} A. GHEZ.	Via Boschetto, 13 ^{mi} , Trieste.
<i>Aŭstrio.</i>	J. GLÜCK.	VI, Theobaldgasse, 12, Wien.
<i>Bohemujo.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Galicio.</i>	S. RUDNICKI.	Kopernikstr., 17, Krakow.
<i>Hungario.</i>	A. DE ZSIGMOND.	Balfiutca 49, Sopron.
<i>Moravio.</i>	(Ne elektita.)	
Belgujo.	W. ERNST.	4, rue du Ravin, Charleroi.
Britujo :		
<i>Centro-Norda.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Centro-Suda.</i>	F. W. HIPSLEY.	156, South Rd. Erdington-Birmingham.
<i>Irlando.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Kimrujo.</i>	D ^r D.-R. JONES.	19, Paget Street, Cardiff.
<i>Londono.</i>	P. BLAISE.	3, Lynette avenue, Clapham Common, London-S. W.
<i>Nord-Okcidenta.</i>	F.-W. SHAW.	4, Lancaster Ave. Didsbury-Manchester.
<i>Nord-Orienta.</i>	A.-E. HEPTON.	11, Perth Str., Hull.
<i>Orienta.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Skollando.</i>	J.-A. COWIE.	Western. Av., Perth,
<i>Sud-Okcidenta.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Sud-Orienta.</i>	W.-G.-A. EDE.	183, Chichester Rd, Portsmouth.

Bulgarujo.	G. ATANASOV.	Str. Botev, 35, Sofia.
Danujo.	Ad. B. HANSEN.	D'Olgas Vej., 47, Kopenhago.
Francujo :		
<i>Burgonjo.</i>	TH. ROUSSEAU.	37, rue J.-B.-Baudin, Dijon.
<i>Centro.</i>	A. AUTIN.	3, rue de la Mariette, Le Mans.
<i>Centro-Sudo.</i>	L. LAMANT.	48, avenue du Pont-Neuf, Limoges.
<i>Nordo.</i>	E. DELIGNY.	33, rue Thiers, Saint-Omer (P.-de-F.).
<i>Normandio.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Okcidento.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Oriento.</i>	H. MARESUELLE.	109, rue Isabey, Nancy.
<i>Parizo.</i>	R. DE LAJARTE.	4, villa d'Orléans, Fontenay-sous-Bois (Seine)
<i>Sudo.</i>	A. CARLES.	3, rue des Balances, Béziers.
<i>Sud-Okcidento.</i>	CH. BRUNET.	59, cours Victor-Hugo, Bordeaux.
<i>Sud-Oriento.</i>	E. GABERT.	Hôtel de Ville, Saint-Etienne.

Germanujo :

<i>Bavarujo.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Centro.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Nordo.</i>	Ch. SOSTMANN.	Ottostr., 11 ¹¹¹ , Berlin N. W., 87.
<i>Nord-Okcidento.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Oriento.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Rejnlando-Vestfalia.</i>	B. LUIS.	5, Gehrtsstr. Düsseldorf-GrifBg.
<i>Saksujo.</i>	J. KARSCH.	Holbeinstr., 6, Dresden.
<i>Sud-Okcidento.</i>	H. PFAFF.	Ulmallee, 10, Worms.
<i>Virtembergo.</i>	R.-H. HENGSTENBERG.	8, Turmstr. Esslingen a. N.
Grekujo.	P. BÜNEMAN.	Firma Hancock kaj Wood, Patras.

Hispanujo :

<i>Centro.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Nordo.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Oriento.</i>	A. SABADELL.	Diputacion, 280, Barcelona.
<i>Sudo.</i>	P. LINARES.	H ^o San Basilio, Cordoba.
<i>Sud-Oriento.</i>	(Ne elektita.)	

Italujo :

<i>Centro.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Nord-Okcidento.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Nord-Oriento.</i>	A. TELLINI.	Vallescura, 11, Bologna.
<i>Sudo.</i>	(Ne elektita.)	

Nederlando. P.-J. VERMAAS. Nieuwe Binnenweg, 340, Rotterdam.

Norvegujo. (Ne elektita.)

Portugalujo. B. MARTINS D'ALMEIDA. R. da Barroca, 135, Lisbon.

Rumanujo. J. E. NICOLAU Str. Decebal, 5, Bukarest.

Rusujo :

<i>Centro.</i>	S. SZABUNIEWICZ.	5, Krivokolennij pereulok, dom. de Sitov, Moskvo.
<i>Finlando.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Kaŭkazo.</i>	A. FIŠER.	15, Sudebnaja, Tiflis.
<i>Nordo.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Okcidento.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Oriento.</i>	G. DAVIDOV.	Poštkesto, 12, Saratov.
<i>Polujo.</i>	(Ne elektita.)	
<i>Sudo.</i>	L. ILLAŠEVIČ.	Moskovskaja, 26, Kiew.

Serbujo. (Ne elektita.)

Svedujo. J. LUNDGREN. Hedemora.

Svisujo. J. SCHMID. Handelsdepartement, Bundeshaus, Bern.

Turkujo. D^{no} A. STAMATIADIS. Samos.

EKSTER EUROPO (1)

Azia Turkujo. J. GUÉRON. Alliance Israélite, Aïdin.

Siberio. R.-J. ELLEDER. Orienta Instituto, Vladivostok.

(1) Ekster Eŭropo, la plimultaj distriktoj ne estas ankoraŭ organizitaj.

Usono (Okcidenta). Clifford M. BALKAM. PO. Box 228, Colorado Springs.

Usono (Pacifika). John M. WOOD. 943, Commerce St., Tacoma (Wash).

Kuba Respubliko. D^{ro} A. ALEMAN RUIZ. Apartado 1324, Habana.

Brazilujo (Norda). D^{ro} M. SÖNDAHL. Bahia.

Brazilujo (Centra kaj Suda). D^{ro} E. BACKHEUSER. Escola Politecnica, Rio-de-Janeiro.

ADRESARO

DE LA DELEGITOJ, VICDELEGITOJ, SUBDELEGITOJ

KAJ ESPERANTO-OFICEJOJ de U. E. A. (1).

MALLONGIGOJ

- D.** = Delegito kun voĉdonrajto (pli ol 20 membroj).
D. = Delegito.
VD. = Vicdelegito.
SD. = Subdelegito.
E.-O. = Esperanto-Oficejo.
E.-O'. = Esperanto-Oficejo plene organizita.
(p) = Esperanto-Oficejo, ĉe kiu iu parolas Esperante.
g = Gvidfolio.
G = Gvidlibro.
Ug = Universitata gvidfolio.

La ciferoj skribitaj post la nomoj de l'urboj montras la nombron de la loĝantoj. Ni indikis la loĝantaron nur de la urboj havantaj pli ol 25.000 loĝantoj (50.000 ekster Eŭropo).

(1) Ordigita ĝis la 1^a januaro 1913. Por la korektoj, adresŝanĝoj novaj Delegitoj kaj Subdelegitoj legu la oficialan organon *Esperanto* kaj la aldonon al Oficiala Jarlibro.

A

- Aachen** (Germanujo, Rheinland), 160,000.
D : V. PINAGEL, 38, Lüfticherstr.
- Aalborg** (Danujo).
D : Edv.-Alfred HANSEN, librotenisto, 24, Prinsensgade.
- Aarhus** (Danujo), 60,000.
D : Ch.-P. HELSKOV, bibliotekoficisto, 25, Heibergsgade.
- Abbeville** (Francujo, Somme).
D : D^{no} Claude NEULLIÉS, kuracisto, 8, rue des Cordeliers.
VD : Henri GUERILLOT, bankisto, 43, rue du Lillier.
E.-O : Librejo Cufay, 1 kaj 3, rue Saint-Wulfan.
- Abo** (vidu *Turku*).
- Accrington** (Anglujo, Lancash.).
D : Edwin ROBERTS, oficisto, 15, Owen str.
VD : James BARON, 124, Burnley Rd.
- Adelaide** (Sud-Aŭstralio), 192,000.
D : I. LYALL, Box 61, G. P. O.
- Agen** (Francujo, Lot-et-Garonne).
D : MAILLE, kolegia profesoro, 37, Cours Voltaire.
- Aguilas** (Hispanujo, Murcia).
D : NORMAN-MACLEAN, komercisto.
- Ainsdale** (Anglujo, Lancashire).
SD : S^{mo} PIERPOINT, « Lynton », Sandringham Rd.
- Aix-sur-Vienne** (Francujo, Haute-Vienne).
SD : Gabriel PIGAH, komerca voĵagisto, café de la Poste.
- Ajaccio** (Francujo, Corse).
D : Gaston THIBON, studento, préfecture.
- Alagoinhas** (Brazilujo, Bahia).
D : Carlos DE SOUZA CUNHA, juĝeja skribisto, 14, rua 24 de Fevereiro.
- Alcoy** (Hispanujo, Alicante), 30,000.
D : Domingo TALENS, S. Tomas, 8.^{te}
- Aleksandropol** (Rusujo, Kaukazo), 36,000.
D : J. MAJEWSKI, stacidomo (Vokzal).
- Alfreton** (Anglujo, Derbysh.).
D : Harry SHAW, Fernleigh Villa, Leabrooks.

- Alkmaar** (Nederlando).
D : J.-L. THEUNIS, instruisto, Vrouwenstraat, 1.
- Amay** (Belgujo, Liège).
SD : Alphonse MAINFROID.
- Amiens** (Francujo, Somme), 91,000.
D : Georges POTEAUX, reprezentanto, 8, rue Alphonse-Paillat.
VD : Ed. SEARLE, 11, avenue de Londres.
E.-O : Librairie centrale de Picardie, 8, rue de la République.
A la *Civette*, place René-Goblet.
- Amsterdam** (Nederlando), 574,000.
D : H. BEKKER, Regulierschwaarsstraat, 113^{te}.
VD : W.-F.-A. MUDDE, tipografo, 2^e Bloemdwarsstraat, 9.
E.-O : Van Baerlestr, 18 (p.)
- Anacortes** (Usono, Wash.).
D : Frank-P. ZENT, dogana oficisto.
- Andenne** (Belgujo, Namur).
SD : A. MELIN, kuracisto, 9, Grand'ruce.
- Angoulême** (Francujo, Charente).
D : Armand LÉAUD, 10, rue Vauban.
- Annecy** (Francujo, Haute-Savoie).
D : DANNEMÜLLER, apotekisto, rue Sommehier.
VD : S^{mo} PERRENOT, prof^{no} ĉe la liceo.
- Annonay** (Francujo, Ardèche).
VD : G. GRIMAUD, 2, Rue Saint-Georges.
D : Louis CHENEVIER, rue Greffier-Chomel.
- Ansbach** (Germanujo, Bavarujo).
D : Karl JUNGE, Fr. Seybold's Buchhandlung, Karlstr., 10, telef. 135.
VD : W. BEUSCHEL, magistrata oficisto, Schlosstr., 21.
E.-O : Librejo Seybold, Karlstr., 10 (p). g.
- Anstruther** (Skotlando).
D : C.-H. MAXWELL, St. Ayles Crescent.
- Antibes** (Francujo, Alpes-Maritimes).
SD : CAMPICHE, 28, rue Aubernon.
- Antofagasta** (Ĉilio).
D : Jacinto FONOLLA, komercisto, Casilla, 516.

Antwerpen (Belgujo), 321,000.
D : Arthur VERMANDEL, profesoro, Borgerhoutschestraat, 72
Borgerhout.

Anvers (vidu *Antwerpen*).

Arad (Hungario).

D : D^{ro} Andreo VEGH, Uezletvezetöseg I.
VD : Kardos BELA, dentisto, 15^a, str. Aulich.

Arcis-sur-Aube (Francujo, Aube).

D : R. MOREY, oficisto, 26, rue de Paris.

Arcueil-Cachan (Francujo, Seine).

SD : Albert DAUPHIN, 12, rue Nouvelle-du-Parc.

Arendonk-Turnhout (Belgujo, Antwerpen¹).

D : Leo HEIDENDAL, kontorestro.
E.-O : Jos. Splichal.

Arezzo (Italujo, Arezzo), 46,000.

D : Jakobo MEAZZINI, S. Giovanni Valdarno, Badiola

Arles (Francujo, Bouches-du-Rhône).

D : Louis LAGET, 4, rue Gambetta.
VD : Henri MOURET, fervoja oficisto, Buffet de la Gare.

Arnhem (Nederlando, Gelderland) 64,000.

D : Johannes KET, ĉefkonduktoro, Nael-Tynnegieterstr., 46.

Arnstadt (Germanujo, Thüringen).

D : Georg SACHS, studento, 7, Feldstr.

Asch (Aŭstrio, Bohemujo).

D : Otto LEDERER, naturhistoriisto.

Astraĥan (Rusujo), 150,000.

D : Ivan SEMIZOROW, oficisto, 26, Ivanovskaja.
VD : S.-V. SARIĈEV, komercisto, kontoro Gubina Kjuj.

Auckland (Nov-Zelando), 100,000.

D : J.-S. RUSSELL, kasisto, Grange Road.
VD : P. ENGLAND, P. O. Box 36.

Aue (Germanujo, Saksujo).

D : HOHNSTEDTER, burĝa lernejo (Bürgerschule).

Auerbach (Germanujo, Saksujo).

D : Hugo GERISCH, fabrikanto, Kaiserstr., 60.
VD : Walter ENGELHARDT, fabrikdirektoro, Kaiserstr., 30^a.

Augsburg (Germanujo, Bavarujo), 123,000.

D : Josef SCHMALZL, ĉefinstruisto, Bernauerstr., 41/1.
VD : J. LINGENHOEL, Riedingerhaus, telef. 1398.

Augusta (Usono, Maine).

D : EMERSON, 5, Scott str.

Austin (Usono, Minnesota).

D : C.-H. GIBBONS, askuristo, Winona Str., 407.

Autun (Francujo, Saône-et-Loire).

D : F. DEJUSSIEU, presisto, 4, Grande-Rue.

Auxerre (Francujo, Yonne)

D : L. CESTRE, honora profesoro, 10, rue Faidherbe.

Auxonne (Francujo, Côte-d'Or)

D : A. NARAT, profesoro ĉe la kolegio, rue Lafayette, 28.

Avignon (Francujo, Vaucluse), 48,000.

London E. C. — *Burroughs Wellcome & K^{io}.* — *Adr.* : Snow Hill Buildings. Fabrikistoj de bonegaj produktaĵoj vendataj sub la komercnomoj « Tabloid », « Soloid », « Kepler », « Hazeline », « Vaporole », « Wellcome », k. t. p. Kuracilaroj por vojaĝantoj.

London. W. — *Holden Fratoj.* — *Adr.* : 3, Harewood Place, Oxford Street. Bot-fabrikistoj. Solaj fabrikistoj de « Naturformaj » botoj, ŝuoj kaj ŝtrumpaĵoj, kaj de anatomiaj, higienaj kaj kuracigaj botoj. Vidu la anoncon.

London S. W. — *A.-O. Fallek.* — *Adr.* : 71, Park Hill, Clapham. Altklasa presisto, litografisto, fabrikisto de kontlibroj. Presas katalogojn, prezlistojn, broŝurojn. Specialaĵo : presado en Esperanto, angla, franca kaj germana lingvoj.

London E. C. — *Hymans & K^{io}.* — *Adr.* : 69, Hatton Garden. Fabrikistoj de ĉiuspecaj ledoj por librobindado, ledaj objektoj kaj remburado; pergameno por bindado kaj presado, tambursuproj kaj laŭtenisbatilaj kordoj.

London E. C. — *Thos. Cook & Son.* — *Adr.* : Ĉefoficejo Ludgate Circus. Elpensintoj de plezurvojaĝoj. Turist-, vaporsip- kaj ekspedagentoj, bankistoj, k. t. p. Filioj en la tuta mondo. Vidu la anoncon, paĝ. 249.

London W. C. — *J.-M. Dent & Sons LTD.* — *Adr.* : Bedford Street. Eldonistoj de la fama angla libraro « Everyman ».

London E. C. — *E Marlborough & K^{io}.* — *Adr.* : 51, Old Bailey. Eldonisto de la fama « Self-Taught » (Mem-Instrua). Serio de eŭropaj kaj orientaj lingvoj. Vidu anoncon pri lernolibroj kaj frazlibroj.

London W. C. — *Internacia Propagandejo Esperantista.* — *Adr.* : 135, High Holborn. Plej efika propagandilo por la paco militonta propagandisto estas la fama *ĉefeĉa ŝlosilo* Esperanta en 18 lingvoj (1,50 Sm. por 100 aŭfranke).

Lübeck. — *Georg-F. Klefe.* — *Adr.* : Poŝtfako, 51. Eksportoficejo kaj kreditinformejo Ekspedoj al nordaj landpartoj. Specialaĵoj : produktoj de kamparaj devenoj, bonegaj fruktinoj, industriaĵoj, k. t. p. Konto ĉe Ĉekbanko Esperantista

Lyon. — *Esperanto-Oficejo.* — *Adr.* : *S^{ino} FARGES*, 36, rue Victor-Hugo. Informejo por Esperantianoj. Centra propagandejo. Librejo, abonejo por ĉiuj ĵurnaloj. Eldonejo de propagandaj poŝtkartoj kaj silkaj flagetoj. Konsulejo de U. E. A.

Lyon. — *Thimonnier & K^{io}.* — *Adr.* : 21, rue Terme. (Fondita en 1830 de B. Thimonnier, elpensinto de la kudromaŝino). Fabrikado kaj vendado de kudromaŝinoj, brodmaŝinoj, trikmaŝinoj, bicikloj, motocikloj, k. c. Bicikloj « Superior », kudromaŝinoj « Neva ».

Lyon. — *Henri Leroudier* — *Adr.* : 20, chemin de la Scaronne. Diversaj hemiaj produktaĵoj por ĉiuj industrioj (devenaĵoj de gudro, gravaj industrioj, tinkturejoj, k. c.). Fabrikado, deponado, reprezentado.

Magdeburg. — *Paul Göring, presejo.* — *Adr.* : Lübeckerstr., 10, Magdeburg N.

Manchester. — *Swiss Embroidery & Lace Mngf Co Ltd.* — *Adr.* : 89-91, Rusholme Road. Fabrikas ĉiuspecajn maŝinbrodaĵojn. Specialaĵo : Broditaj kitolpecoj kaj roboj laŭ la plej moderna stilo, sur anglaj ŝtofoj. Petu informojn kaj prezojn.

Marseille. — *Société des Codes télégraphiques, G. Lugagne.* — *Adr.* : 19, rue de la Darse. Vidu la anoncon, paĝ. 221.

Moskvo. — *Libroeldonejo « Posrednik ».* — *Adr.* : 36, Arbato, d. Testov. Ĉeladas vegetarismon, kontraŭalkoholismon, kooperativismon, pedagogiajn idealojn, plibonigon de popola terkulturado : eldonis jam 2.000 diversajn presajojn (3.000.000 ekz. jare). Revuoj : porinfana *Majak* (Zumturo) kaj *Libera Edukado*.

Moskvo. — *Librejo « Esperanto ».* — *Adr.* : 26, Tverskaja. Havante ĉiam provizon de diverslandaj esp. eldonaĵoj por pli ol 60.000 frankoj (Sm. 24.000) la Moskva Librejo senprokraste liveras kiun esp. libron. Katalogo (20-paĝa) estas sendata senpage.

Moskvo. — Mahler & Jackiewicz. — *Adr.* : Krivokolennij, 5. Interesiĝas pri ĉiuj teknikajoj, koncernantaj vaporkaldronegojn kaj tubokondukojn por superhejtitigita vaporo.

München. — Jos. Sedlmayr, Brauerei zum Franziskanerkeller (Leistbräu). — *Adr.* : A.-G., 7. Hochstr. Rekomendas tre bongustajn eksport-bierojn, helajn kaj malhelajn. Eksporto en bareloj kaj en boteloj ĉiutlande la mondo. Plej altaj premioj

München — Graphia, G. m. b. H., Kunst- und Verlagsanstalt. — *Adr.* : 125/127, Nymphenburgerstr. Rekomendas siajn specialaĵojn : atplenajn afiŝojn, kompletajn katalogojn, prezarojn, prospektojn, reklamilojn, klišeojn. Litografio, ĉirifnara presado, kemigratio. Granda biudejo. Liverantoj de Parkurbo Esperanto.

Nancy. — Daum frères — *Adr.* : Verreeries de Nancy. Artvitraĵoj kaj kristaloj de Nancy. Vazoj. Elektraj lampoj. Ĝenerala magazeno (deponejo) en Parizo, 32, rue Paradis.

Nancy. — Librejo kaj papervendejo Victor Berger. — *Adr.* : 13, rue Saint-Georges. Ĝeneralaĵaj libroj. Verkoj kaj revuoj esperantistaj.

Newcastle-on-Tyne. — W. McCreight Brown. — *Adr.* : 11-15, Clayton Street. Fruktimpovisto. Vendas ankaŭ Esperantaĵojn kaj librojn.

Nice. — Société des fleurs de Nice (Societo de la Nicaj floroj). — *Adr.* : 27, rue Lamartine. Eksportado de floroj. Korboj « Esperanto » printempa : 2 Sm. Lazura marbordo : 4 Sm. Select Nicea : 6 Sm. Riviera : 8 Sm. Sendo afranke kontraŭ poŝtmandato.

Paderborn. — Heinrich Stöltzing, civila inĝeniero. — *Adr.* : 28, Neuhauserstr. Rekomendas kurbigmaŝinojn por ladoj, fajlacotmaŝinoj, glatig-akrigm-ŝinojn, forojn por cementaĵoj kaj fandaĵojn ĉiaspecajn. Reprezentant'oj serĉataj.

Paris. — Presa Esperantista Societo. — *Adr.* : 33, rue Lacépède. Liveras librojn, insignojn, poŝtkartojn, ĵurnalojn kaj ĉiujn esperantaĵojn ; liveras ankaŭ je plej favoraj kondiĉoj ĉiujn francajn verkojn.

Paris. — Centra Presejo Esperantista — *Adr.* : V. Polgar, 33, rue Lacépède. Entreprenas la faradon de ĉiuspecaj presaĵoj en nacilingvoj kaj Zamenhofa Esperanto. Fondita en 1904.

Paris. — Louis Menand. — *Adr.* : 52, avenue Parmentier, Paris-XI. Petas en tuta Francujo agentojn je maklera profito por reklamado-administra monopoligita, ĉiaj reklamaj objektoj kaj kalendaroj.

Paris. — Les Entrepôts réunis Havrais. — *Adr.* : 6, rue du Repos, Paris-XX.

Peterburg. — Petro Stojan. — *Adr.* : B. O. 17 lin. 68, k. 25. Deponejo de Ornitologia Vortaro Oklingva (1 Sm.) kaj de Ruslingva Vortaro (3 Sm.). Konto ĉe la Esp. Ĉekbanko Rus-Esperanta eldonejo.

Peterburg. — Ed Kühne. — *Adr.* : 1, Gorohova. Vendejo de kaŝekajoj kaj vojaĝobjektoj. Vidu la anonparton.

Bad-Reichenhall. — Fritz Mayerhauser — *Adr.* : 1, Gradirhausstr. Dissendejo de praktikaj novaĵoj. Specialaĵoj : Velofot-fotografajoj (tre konvenaj por Esperanto-korespondado k. t. p.). — Konto ĉe Ĉekbanko Esperantista. Vidu la anoncon.

Rio-de-Janeiro. — Muzikeldonejo kaj vendejo de la plej bonaj kordaj muzikiloj. — *Adr.* : Luiz Silva, r. Carioca, 37.

Rio-de-Janeiro. — Automobilista Lernejo. — *Adr.* : Direktoro D^o José V. da Rocha Miranda, r. Constituição, 14.

Saumur. — Vidvino Amiot. — *Adr.* : S. Hileire, S. Florent (Franc). Grandaj ŝaŭmantaj vinoj. Komercaj markoj : « Carte bleue », « Military » kaj « Crémant du Roi ».

Saumur. — Gratien & Meyer. — *Adr.* : Beaulieu-lez-Saumur (Franc). Grandaj ŝaŭmantaj vinoj « Kastelo de Beaulieu ». La firmo akceptas agentojn ĉie kie ĝi ne estas reprezentata.

Saumur — Balme kaj filoj. — *Adr.* : 117, boulevard Richard-Lenoir, Paris. Fabrikejo de rosarioj, medaloj kaj religiaj juvelaro.

Terrasson (Franc.) — M. Fleury de la Ruelle. — Trufoj el Perigord kaj vinoj el Bordeaux'a regiono; grandega ŝparoj; oni sin turnu rekte al la bienposedanto. Speciala rabato por mendoj skribitaj esperante.

Thorn — Esperanta Enkasigo, Entrepreno por Germanujo. — *Adr.* : Civil-inĝenier Reimann, 95, Graudenzer Str. Aĉetas, diskontas, enkasigas, informas, germanlingven tradukas, ĉiaspece komisiis (maŝinoj, konstruaĵoj). Ĉekbanka konto, aldoni afrankilon.

Toulouse. — F. Laveran. — *Adr.* : 11, rue Caffarelli. Cedorajtigito : 1^o de l'Internacia Telegraf' Kodo Lugagne; 2^o de l'Ideala Datilo « Kalendör » patentita en Francujo kaj aliaj landoj. Li eldonas en 1914 belan esperantistan kalendaron.

Wiesbaden. — D^{ro} M. Albersheim. — *Adr.* : 38, Wilhelmstr. Fabrikejo de noblaj parfumoj; specialmagazeno por ĉiuj tualetobjektoj en arĝeno, testudŝelo, eburo, celulojdo, kristalo, en- kaj eksterlandaj parfumoj kaj sapoj.

Wiesbaden. — Paul Heinrich, arbokulturejo — *Adr.* : Wiesbaden, Wehrhitztal. Kulturejo kaj eksporto de frukt-, ale- kaj ornamarboj kaj arbetaĵoj. Rozoj- kaj senkulturoj. Oni vidu la anoncon.

HOTELOJ

Bamberg. — **Hotel National.** — *Adr.* : 37, Luitpoldstr. *Pos.* : Jakob LIEB.

Bern. — **Hotelo St. Gotthard,** apud la stacidomo kaj centra punkto de l'tramlinioj. Nova domo, moderne ekipita. Lifto. Ĉambroj de 1 Sm.

Bordighera. — **The Bordighera Tea Rooms.** — *Adr.* : F^{ino} Eileen DALY. Teotrinkejo en belega ĝardeno. Ĉiuspecaj kukoj konfitaĵoj *Pos.* : F^{ino} Eileen DALY. Konto ĉe Ĉekbanko Esperantista.

Breslau. — « Pomona » vegetara restoracio senalkohola. — *Adr.* : 44-45/1, Albrechtstr. Posedanto : Carl BOHNE. Telefono 5841.

Dresden. — **Pension Seidel.** — *Adr.* : 30/1, Lüttichastr. 1 minuto de l'ĉefstacidomo. Elegantaj ĉambroj kun kaj sen manĝoj; elektra lumo, banejo. Moderaj prezoj. Oni parolas germane, angle kaj esperante.

Genève. — **Hôtel meublé du Théâtre.** — *Adr.* : 12, boulevard du Théâtre. Lokita je unu el la ĉefaj placoj, kontraŭ la teatro, proksima de la unuversitato, oficejo de U. E. A., k. t. p. Moderna komforto, elektra lumo, centra hejtado, banĉambroj. Prezjoj de 2,50 ĝis 5 frankoj. (1 ĝis 2 Sm.); aranĝoj por pli longa restado.

Genève. — **Pensio por junulinoj.** — *Dir.* : Suzanna Taeger. *Adr.* : 1, rue de l'Ouest, Delices, Genève. Instruado de la franca, angla, germana, itala lingvoj kaj de Esperanto, muziko, pentrado. Bela situacio proksime de Genève Gardeno, laŭteniso.

Hannover. — **Pensio « Hubertus » por junulinoj.** — *Adr.* : S^{ino} HARTOG, Parkstr. 7 A. Laŭindividua edukado, pliperfektigado en ĉiuj fakoj: lingvoj (germ., franca, angla, esperanta), literaturo, muziko. Mastrumado, instruado. Familia vivado. Vilao en parko. Esperantaj prospektoj kaj referencoj.

Köln. — **Hôtel Bayrischer Hof.** — 3 minutoj de la stacidomo, preferata de la komercaj vojaĝistoj. Ĉiusabate (9^o) kunveno de Esperantistoj « Ora Rondeto ».

Krakow. — **Hotel Belvedere.** — *Adr.* : Str. Basztowa, 27. Komforta kaj eleganta meblita hejmo por esp. vojaĝantoj, proksime de la stacidomo; elektra lumo, banejo, prezjoj malaltaj — Esperanto parolata.

Krakow. — **Hotel de France** — *Adr.* : Str. Pijarska. Unuaranga hotelo, komforte kaj higiene aranĝita Restoracio, kafejo, lifto. En ĉiu ĉambro telefono, varma akvo, vekigilo. Ĉambroj de 3 kronoj.

London W. C. — **Milton Temperance Hotel.** — *Adr.* : Featherstone Buildings, High Holborn. Milton Temperance Hotel : posedantino S^{ino} BODGER. Lokita centre kaj kviet-; lito kaj matenmanĝo kostas de 3 ĝis 5 ŝilingoj laŭ postuloj Telegrafa adreso : Embayment Holb. London.

London. — **Pensio de S^{ino} O'Connor.** — *Adr.* : 17, St. Stephen's Square, Bayswater. Ĉambro kaj matenmanĝo Sm. 1,25. D^{ro} O'Connor M.-A. donas anglajn lecionojn.

London W. C. — **Imperial Hotel.** — *Adr.* : Russell Square. Centra situacio, apud la Esperantista konsulejo. Orkestro ĉiutage en la Vintra Ĝardeno. Ĉambro, matenmanĝo kaj servado de 5 ŝilingoj (Sm. 2,50).

Marseille. — **Grand hôtel du Louvre et de la Paix.** — Ĉambroj de 1.60 Sm. *Palace-Hôtel* kaj la « Réserve Echenard », multekonata restoracio fama pro la *Bouillabaisse*. Filio en Hyères : *Grand Hôtel et les d'Or*, pensio de 4 Sm. Posedanto : Echenard-Neuschwander.

München. — **Esperanto-Hotelo « Reichshof ».** — *Adr.* : 15, Sonnenstr. *Pos.* : C. BISCHOFF. Proksime de la ĉefstacidomo. La sola München'a hotelo kie oni parolas esperante. Bonaj referencoj de diverslandaj geesperantistoj.

Nürnberg. — **Hotelo Maximilian.** — *Adr.* : Nürnberg. Posedanto : Konrad BURLEIN.

Paris. — **Grand Hôtel du Globe.** — *Adr.* : 71, rue Monge. *Pos.* : A. Leclerc. Ĉambroj de 0.80 Sm. ĝis 2 Sm. kaj de 12 Sm. ĝis 30 Sm. monate. La gemastroj estas Esperantistoj.

Wernigerode. — **Hotelo « Gothisches Haus ».** — *Adr.* : Markt. *Pos.* : W. FRICKE. Multe vizitata kaj ŝatata hotelo de turistoj. Klubejo de Esp. Grupo de Wernigerode.

Wernigerode. — **Vilao « Esperanto ».** — *Adr.* : 24, Bismarckstrasse. *Pos.* : Ges^{roj} NEURATH. Frenetika kaj familia pensio en ĉarme lokita urbeto kun belega montregiono. Vizitata de ĉiulandaj geesperantistoj. Oni bone parolas Esperanton. Esp. prospektoj senpage. Vidu la anoncojn.

MOTORCIKLETOJ


= je 2 HP. kaj 2 HP. 3/4 unucilindraj. =

4 HP. 1/2 ducilindraj.

kun laŭgrada rapideŝanĝo kaj ekmovigilo, sola ekmovigilo, reguligebla rolbloko, elasta alpendiĝo

antaŭe kaj malantaŭe, k. t. p.

Sparigaj, senriskaj, potencaj kaj bongedaŭrajna ŝin o



BICIKLETOJ je 1, 2, 3, 4, 6 rapidecoj per direkta, retdirekta kaj perlevita pedalado.

*La marko **TERROT**, sola, ricevis la **UNUAN PREMION** en la 3 kvalitkonkursoj organizitaj de la franca Turing-Klubo.*

Senpaga ilustrita katalogo laŭ peto.

TERROT & K^{io}

DIJON (Côte-d'Or - Francujo)

Ni serĉas agentojn por Argentino, Ĉilio, Meksikujo, Bulgarujo, Rumanujo, Serbujo, Turkujo, Grekujo, Aŭstrujo

SPA

The Spa Development Syndicate L^d

GRANDA BANENTREPRENO

Karbogasaj banoj naturaj : **KORMALSANOJ**

Kotbanoj : **VIRINMALSANOJ**

Fortaj ferhavaj mineralakvoj, Hidroterapio

NEŬRASTENIO * ANEMIO

Radiuma inhalatorio

INSTITUTO ZANDER

Mondumaj kaj sportaj festoj

Promenadoj kaj ekskursoj en Ardenoj

Senpagaj informoj : **CASINO-SPA** (Belgujo)

“COOK'S TOURS”

Vojaĝoj pere de Cook ĉirkaŭ kaj tra la mondo

Sendependaj biletoj. La biletoj de Cook estas utiligeblaj ĉie en la mondo, por la simplaj aŭ la plej kompleksaj vojaĝoj, kaj donas specialajn facilajojn rilate al interrompo de vojaĝo kaj portado de pakajoj. Biletposedantoj povas ricevi informojn kaj konsilojn de la agentoj kaj riprezentantoj, kaj utiligi la oficejojn de la Fermo por sia korespondado. Interpretistoj ĉeestas la ĉefajn stacidomojn kaj havenojn.

Inkluziva sendependa vojaĝo. La plej perfekta vojaĝo estas atingata per tiu metodo. La biletposedanto vojaĝas tute sendepende, sed ĉiu detalo antaŭe estas aranĝita kaj ĉiu dispezo praktite antaŭsciigita. Skribu por klariga libreto.

Mara vojaĝo Ĉiuklasaj transiraj biletoj estas vendataj je la plej malkaraj prezoj al aŭ de la Unuigitaj Ŝtatoj, Kanado, Sud-Afriko, Hindujo, Aŭstralio, Nov-Zelando, ankaŭ al Ĥinujo, Japanujo, al ĉiuj partoj de la mondo kaj ĉirkaŭ la mondo.

Pakajoj kaj komercaĵoj Ĉiuspecaj estas asekuritaj, kolektitaj, konservataj, enprovizataj kaj forsendataj.

Bankado kaj monŝanĝo. Fremdaj moneroj estas ŝanĝataj je la plej bonaj kondiĉoj; rondiraj notoj kaj kreditleteroj eldonataj, kaj kablaj ĝiroj farataj.

Hotelkuponoj estas eldonataj je fiksitaj prezoj, kaj utiligeblaj ĉe pli ol 2,000 hoteloj.

THOS. COOK & FILO, LUDGATE CIRCUS, LONDON
Elpensintoj de la tutmondo sistemo de plezurvojaĝoj. Fondita 1841
Filiigita al U. E. A.

OFICEJOJ ĈIE EN LA MONDO

GRAVAJ INFORMOJ PRI BRAZILUJO

Malgraŭ la propagando, kiu de kelkaj jaroj estas farata en Ameriko kaj en Eŭropo por Brazilujo, estas certe, ke tiu granda lando estas ankoraŭ malbone konata kaj ke oni ne sufiĉe atentis la gravan progreson, kiun en Brazilujo faris ĉiuj fakoj de la sociala agado, kiel: Komercio, Industrio, Financoj, k. t. p.

Ĉiu **ĵurnalisto** deziranta liveri ĝustajn informojn al siaj legantoj, konigi al ili, kion enhavas Brazilujo, kiujn ĉiuspecajn riĉaĵojn oni povas tie eltiri, montri la progreson de ĉiu el tiuj fakoj, por juĝi, kiel en la estonteco estos tiu lando, trovos tre valoran profiton abonante miajn:

MONATAJN RAPORTOJN PRI LA PLEJ GRAVAJ FAKTOJ DE LA EKONOMIA AGADO EN BRAZILUJO

aperantajn regule ĉiumonate Esperante, angle, france, germane, k. t. p., kaj kies ekspedo okazas per rekomendita letero.

Abonprezo:

1 jaro = 12 monataj raportoj	150 ₺
1 monata raporto	20 ₺

Pagebla per enpago al **ĈEKBANKO ESPERANTISTA**, Merton-Abbey, London S. W., aŭ per ĉeko al Rio-de-Janeiro.

Oni bonvolu rekomendi ĉiun gravan komunikadon.

10 % de ĉiu mendo estas donata, kiel monhelpo, al la Centra Kaso de U. E. A., kies publika kaj internacia utileco meritas subtenon.

CARLOS-CHR. MULLER
JOINVILLE (SANTA CATHARINA), BRAZIL

Korespondanto de ĵurnaloj naciaj kaj eksterlandaj

Delegito de U. E. A. — Esperantia Entrepreneo 313

Societo de la Telegrafiaj Kodoj

Georges LUGAGNE

ANONIMA SOCIETO JE LA KAPITALO DA 250.000 FRANKOJ

Societa sidejo: 19, rue de la Darse, MARSEILLE (Francujo)

TELEFONO: 50.00 + TELEGRAFADRESO: TELECODE

INTERNACIA KODO LUGAGNE. — La sola komerca verko kiu permesas uzi la lingvon Esperanto por la telegrafa korespondado. 500 miliardoj da frazoj estas kombineblaj en 7 lingvoj: Esperanto, franca, angla, portugala, hispana, germana kaj itala.

VORTARO LUGAGNE. — Enhavanta 100.000 vortojn de 5 literoj havantaj inter si minimume du literojn de diferenco, permesantaj kombini 10 miliardojn da dekliteraj vortoj. Rapida korekto de ĉiuj eraroj de transmetado.

ENCIKLOPEDIA KODO G. L. — Permesas kombini ĉiujn ajn frazojn en franca lingvo.

TRANSSKRIBILO KUN SEKRETAJ PERMUTACIOJ G. L. — Kriptografa aparato ebliganta la plej profundan sekreton.

13/14 CIFEROJ LUGAGNE. — Permesas anstataŭi 13 ĝis 14 ciferoj per elparolebla vorto de 10 literoj.

12 CIFEROJ LUGAGNE. — Permesas anstataŭi 12 ciferojn per elparolebla vorto de 10 literoj.

SPECIALECO DE PRIVATAJ KODOJ

Multaj atestoj de la plej gravaj francaj kaj fremdaj firmoj. Teknikistaj inspektistoj estas al la dispono de la klientoj en ĉiuj urboj. Ĉiuj sludoj kaj projektoj estas volonte liverataj.

Agentejoj kaj teknikaj oficejoj en la tuta mondo.

Emil MÖLLER

Fabriko de Telefoniloj

HORSSENS ↔ DANUJO

ĈEBANKO ESPERANTISTA

Merton Abbey, London S.-W.

estas la sola banko en la mondo, kies kontuloj detruinte la barojn de la diversmoneco, povas internacie pagi kaj elŝanĝi monon

SEN KURZA PERDO

kaj

SEN TRANSENDA KOSTO

kiom ajn malproksima estas la lando kaj kiom ajn granda aŭ malgranda la sumo.

Esperantistaj kontuloj (pli ol 400 en aŭgusto 1912) nun ekzistas en pli ol 40 ŝtatoj tra la tuta mondo, inter ili la ĉefaj eldonistoj kaj vendistoj de esperantaĵoj. Ĉiu Esperantisto devus posedi konton.

Petu la regularon.

VETURANTE DE
ANGLUJO al la **KONTINENTO**, aŭ returne

VETURU PER LA

RAPID
RROYAL tra **FLUSHING** **R**APIDA
RROUTE **R**EGÂ

Plej Grandaj Trans-Markolaj Vaporŝipoj **LINIO**

Taglumaj Vojaĝoj tra Queenboro. Nokta vojaĝo tra Folkestone
Du vojaĝoj ĉiutage laŭ ambaŭ direktoj

Por detaloj sin turnu al :

LA ZEELAND STEAMSHIP Co, Flushing (Holando)

aŭ al la LONDONAJ AGENTOJ :

H.-S. ALTER, Electra House, Finsbury Pavement, E. C.
G.-H. RAVELLI, 33, Cockspur Street, S. W.

LIBERTEMPEJO

tre konata kaj multevizitata estas
la ĝardenurbeto apud kolonio
GODESBERG-AM-RHEIN

Nomata de la Esperantistoj : **Rejna Esperanto-Kolonio.**

1912 inter la gastoj : Prof^r BOURLET, Abato RICHARDSON.

Esperantistaj pensioejoj rekomendataj :

Concordia de F^{ino} Kürten, Kronprinzenstrasse ;

Feldhaus de F^{ino} Feldhaus, Goebenstrasse.

Informojn (kontraŭ respondkupono) per la Esperanto-Oficejo.

ASOCIO DE LA INTERNACIA GAZETARO

ĜENERALA SEKRETARIEJO :

Rue de l'Arquebuse; 24, rue du Stand, GENÈVE

Universala Societo de verkistoj kaj ĵurnalistoj dezirantaj ekster ĉiu tendenco politika, religia aŭ financa pligrandigi la objektecon, dignecon kaj aŭtoritatecon de la Gazetaro, batalante kontraŭ la malĝustaj informoj de la sensacia Gazetaro kaj kreante centron de zorga dokumentado al la dispo de ĉiuj kaj laborante por la universala konkordo per la malarmado de la spiritoj.

La nekontestbla utileco de tiu Asocio alportis al ĝi la aprobon de multaj ĉiulandaj eminentuloj, kiuj bonvolis ĝin patronadi kaj akcepti ĝian honoran membrecon. Sekve de deziresprimo de multnombraj ŝtatelegitoj ĉe la dua paca konferenco en Hago la Asocio kreis en Genevo la internacian Oficejon de la Gazetaro. Tiu Oficejo jam ricevas multnombrajn gazetojn, kiuj apogis ĝin kaj interŝanĝe profitas de la propagando farata por ili. La Oficejo plezure akceptos ĉiujn Esperantajn kaj ne-Esperantajn Gazetojn por sia dokumentado.

HEJME kaj ĈIE **TRINKU**

ANTAŬ LA MANGĜOJ : la plej bonan el la malsatigiloj

kvaronon da botelo **CHATEAU-MOTTE**
naturan aŭ citronumitan

DUM LA MANGĜOJ :

Mineralan akvon el *Château de la Motte*.

POST LA MANGĜOJ :

bongustan digestigan limonadon

SODA - MARQUISE

— *Viaj organoj resaniĝos* —

SOURCES D'EAUX MINÉRALES du CHATEAU de la MOTTE

Anonima Societo je la Kapitalo da 500,000 frankoj

CUSSET apud **VICHY** (Franclando)



Per Esperanto -- Por Esperanto !!

S^{RO} Alex. TEODORESCU, Advokato

sin rekomendas al la tutmondaj Esperantistoj kaj komercaj firmoj por ĉiuj juristaj aferoj en la tuta Rumanujo (precipe en komerca fako).

AKURATA kaj KONSCIA SERVO

Samideanoj, rekomendu min al viaj konatulej !

Adreso : *Strato Traian, 114*, BUKUREȘTI (Rumanujo)

KORESPONDAS ESPERANTE, FRANCE

Vⁿ PARTO

TURISMAJ INFORMOJ

ĜENERALAJ RIMARKOJ

La sperto montris, ke multaj el niaj vojaĝantaj membroj ŝatas ricevi adresojn de bonaj kaj fidindaj hoteloj, sed, pro la malgranda nombro kaj tre diversaj prezoj de la ĝisnunaj Esperantaj hoteloj, oni devis por la plimultaj urboj speciale korespondi kun la Delegito, kio kaŭzis mon- kaj tempoperdon por ambaŭ.

Ni do decidis organizi la servon de la Esperantaj hoteloj laŭ tute alia bazo: en ĉiu granda aŭ mezgranda urbo la Delegitoj elektis mezgradan hotelon kun prezo fiksita de ni inter certaj limoj. La hotelisto pagas nenion, kaj la Delegito promesas nenion alian ol rekomendi ĝin al ĉiuj Esperantianoj. Tio efikas, ke la plimulto de la Esperantianoj, sen speciala korespondado, trovos taŭgan hotelon kaj ke la hotelisto vidos la komercan valoron de U. E. A.

Principe ni celas: la unuecon de komforto en ĉiuj niaj hoteloj, la unuecon de la prezoj interne de unu lando, kaj internacian unuecon, koncerne la forigon de la malagrablaj flankaj devigoj altrudataj al la hotela gasto, kiel trinkmonoj, mendo de manĝaĵoj aŭ trinkaĵoj, specialaj pagoj por lumigado, k. t. p. Enketo farita de ni montris la malfacilecon de l'tasko, sed samtempe ankaŭ la grandan meriton, kiun U. E. A. povas akiri, se ĝi serioze okupiĝas pri tiu problemo. Konforme al niaj principoj ni komencis modeste, nin okupante tiun jaron ĉefe pri la elekto de taŭgaj hoteloj, kaj provizore akceptante inter certaj limoj la diversecon de la prezoj kaj aliaj kondiĉoj, eĉ en la sama lando. Ni esperas, ke la spertoj el tiu ne perfekta sistemo, aranĝotaj diskutoj pri la ĝene-

ralaj demandoj, raportoj kaj enketoj kolektotaj ĉe aliaj gravaj asocioj, k. t. p., donos al ni kun la tempo la necesan forton kaj aŭtoritaton por ke ni povu krei modelan servon adaptitan al la deziroj de l'internacia vojaĝantaro.

Por la elekto de la hotelo la Delegitoj ricevis la jenajn instrukciojn :

1^o Ĝi estu proksime de l'ĉefa stacidomo aŭ de l'centro de l'urbo. Ĝi estu pura kaj ĉiurilate rekomendinda.

2^o La prezo valoru por unu persono dum unu nokto kaj rajtigu al plena uzo de la ĉambro sen hejtado.

3^o La ĉambro estu el la bonaj de l'hotelo : la fenestro rigardu al strato, ĝardeno aŭ granda korto tiel ke oni havu sufiĉe da lumo kaj aero ; kiel mebloj troviĝu en ili almenaŭ lito, noktotablo, lavtablo, seĝo, kaldrono por la malpura akvo kaj spegulo, ĉio estu pura. Hotelo kun banĉambro, elektra lumo, skriboĉambro kaj lifto estas preferata.

Nedevido al matenmanĝo estas dezirinda, precipe por vojaĝantoj, aŭ en landoj kie la matenmanĝo estas pli malmultekosta en kafejo ol en hotelo. Tamen, ĉar la ricevitaj respondoj montras tre grandan diversecon, ni estis devigitaj fiksi la jenajn regulojn :

En Granda Britujo, Hispanujo, Portugalujo, Grekujo oni citis la prezon kun la matenmanĝo. En la listo tio estas montrata per la vorteto *Mat.* metita antaŭ la prezo.

En la aliaj eŭropaj landoj, precipe la centre lokitaj, ni citis unue la prezon de l'ĉambro sen matenmanĝo, kaj la prezon kun matenmanĝo nur se : a) estas nekutime aliloke matenmanĝi kaj se do mankas kafejoj por tio ; b) se la ĉambro ne estas havebla sen tio ; c) Se la ĉambra prezo por nematenmanĝanto estas plialtigata, ĉar la hotelisto alkalkulas la ne faritan gajnon. Laŭeble ni cetere evitis tiajn hotelojn.

Por kelkaj lokoj konataj kiel restadejoj aŭ libertempejoj ni ankaŭ indikis la prezon de la ĉambro *kun* pensio kaj poŝto (*Pens.*).

La hoteloj, kie oni parolas Esperanton, estas montrataj per *Esp.* En la aliaj, Esperanto *ne* estas parolata.

En kelkaj hoteloj la mastro bonvolis konsenti rabaton al niaj membroj, kvankam ni ĝenerale ne petis similan favoron. En tiuj okazoj la rabato estas montrata inter krampoj, post la prezo.

Al la adresoj de la hoteloj ni aldonis — kie tio estis ebla — la adresojn de la senalkoholaj aŭ vegetaraj restoracioj, kiuj utilos al niaj abstinentaj aŭ vegetaranaj membroj aŭ simple al tiuj personoj, kiuj ilin preferas pro iliaj higienaj profitoj. Ofte la senalkoholaj restoracioj estas malfacile troveblaj, dum la alkoholaj estas multaj. En niaj listoj la vorteto *Rest.* montras senalkoholan restoracion ; la vorteto *Veg.* montras, ke ĝi estas nur vegetara, t. e. ne vendas viandon. Se en sama urbo, estas kelkaj tiaj restoracioj apartenantaj al sama kompanio ni citis nur la kompanion (*Ekz. Lloyds Company* en Anglujo), kondiĉe ke tio sufiĉos por trovi iun pere de urbano.

Krom la adresoj de la hoteloj, ni redaktigis pri ĉiu lando artikolon, kiu enhavas praktikajn informojn speciale utilajn al la vojaĝantoj. La artikoloj estas verkitaj laŭ sama plano kaj enhavas la jenajn rubrikojn : Surfaco, Loĝantoj, Lingvoj, Religioj, Registaro, Armeo, Instruado, Ekonomio, Monsistemo, Mezuroj, Poŝto, Fervojoj, Navigado, Dogano, Turismo, Hoteloj. Eĉ la nevojaĝantoj kun utileco povos tralegi la diritajn artikolojn, kiuj enhavas en facila formo informojn alie malfacile troveblajn.

Por 1913 ni povis organizi la hotelan servon *nur por Eŭropo*. La venontan jaron ni sisteme prilaboros la ekster-eŭropajn landojn.

Por ĉiu lando ni citis ĉiujn iom gravajn urbojn.

El kelkaj ni ĝis nun ne ricevis respondon de nia Delegito pri elekto de hotelo. En aliaj ni ne ankoraŭ havas Delegiton.

Tamen, por ke niaj listoj estu kompletaj ni por tiuj lokoj provizore *citis sen respondeco* la hotelojn speciale rekomendatajn de Turing-Klubo kaj respondantajn al niaj kondiĉoj. En la listo tiuj hoteloj estas montrataj per la signo *.

Ni tre petas ĉiujn niajn membrojn, ke ili bonvolu :

1^e Kiel eble plej multe viziti la Esperantiajn hotelojn dum vojaĝo ;

2^e Konigi al la mastroj de tiuj hoteloj, ke ili alvenis dank'al la enskribo en nia Jarlibro ;

3^e Informi la Delegiton aŭ la Centran Oficejon de U. E. A. pri ĉiuj malkorektaĵoj okazintaj dum la restado aŭ pri ĉiuj eraroj trovitaj en niaj listoj.

Nur dank'al la kunlaborado de niaj membroj, ni povos atingi iom-post-ioman pliboniĝon de nia hotela servo kaj ĝian adaptiĝon al la deziroj de la plimulto el la Esperantianoj.

MALLONGIGOJ

ĉ.	= ĉambro.	min.	= minimumo.
EE.	= Esperantia Entrepeno.	n.	= naskiĝis.
gf.	= gvidfolio.	pens.	= pensiono.
int.	= internacia.	pk.	= poŝtkartoj.
j.	= jaro.	pres.	= presajtoj.
kl.	= klaso.	rest.	= restoracio senalkohola.
let.	= leteroj.	t.	= tuno.
maks.	= maksimumo.	veg.	= vegetara.
mat.	= kun matenmanĝo.	Esp.	= Esperanto parolata.

AŬSTRIO-HUNGARIO

Surfaco. — *Tuta Imperio* : 676.000 km². *Aŭstrio* : 300.000 km² (Galicio, 78.532 ; Bohemujo, 51.967 ; Moravio, 22.231). *Hungario* : 32.5000 km² (Kroatio-Slavonio, 42.534). *Bosnio-Hercegovino* : 51.000.000 km².

Loĝantoj. — *Tuta Imperio* : 51.390.000 (76 po km²). *Aŭstrio* : 28.570.000 (Galicio, 8.026.000 ; Bohemujo, 6.770.000 ; Moravio 6.222.000). *Hungario* : 20.886.000 (Kroatio-Slavonio, 2.622.000). *Bosnio-Hercegovino* : 1.898.000.

Lingvoj. — *Aŭstrio* : Slavaj, 60% (ĉeĥa, 23% ; pola, 16% ; rutena, 13% ; slovena, 4% ; serbo-kroata, 3% ; germana, 35% ; itala, 3% ; rumana, 1%. *Hungario* : magiara, 47% ; slavaj, 26% (serbo-kroata, 15% ; slovaka, 10% ; rutena, 2%) ; rumana, 15% ; germana, 10%. *Bosnio-Hercegovino* : Slava (serbo-kroata), 66% ; turka, 32%.

Religioj. — *Aŭstrio* : Rom-katolikoj, 91% ; hebreoj, 4% ; grek-katolikoj, 2% ; protestantoj, 2%. *Hungario* : Rom-kat., 51% ; prot., 19% ; ortodoks., 15% ; grek-kat., 10% ; hebreoj, 4%. *Bosnio-Hercegovino* : ortodoks (serboj), 43% ; mahomedanoj (turkoj), 32% ; kat. (kroatoj), 23%.

Registaro. — *Tuta imperio* : Aŭstrio-Hungario konsistas el la ŝtatoj aŭstria kaj hungara, kunigitaj per la persono de la monarko kaj 3 komunaj ministroj (eksterlandaj, militaj, financaj). Imperiestro-reĝo : Francisko-Jozefo I^a (n. 1830, r. 1847). La komunajn aferojn ĉiujare pritraktas Delegacio (120 anoj, elektataj 1/2 de la aŭstria, 1/2 de la hungaria parlamentoj). *Aŭstrio* : Parlamento : ĉ. de Sinjoroj (anoj dumvive elektataj de Imperiestro) ; ĉ. de Deputatoj (516 anoj, universala baloto, 6 j.). *Hungario* : Parlamento : ĉ. de Magnatoj (nun 400 anoj, rajtigataj laŭ naskiĝo kaj reĝa elekto) ; ĉ. de Deputatoj (453 anoj, 5 j.). Ambaŭ ŝtatoj konsistas el landoj (ekz. Bohemujo, Galicio, Kroatio) havantaj propran parlamenton. *Bosnio-Hercegovino* estas administrata de la financa ministerio kaj havas reprezentantaron.

Armeo. — *Tera* : Dum paco : 385.000. Dum milito : 1.872.000. Militoservo parte 2 j., parte ankoraŭ 3 j. Absolventoj de mezaj lernejoj 1 j. *Mara* : 1.330 kanonoj, 15.000 homoj. *Aera* : 2 aerŝipoj.

Instruado. — 8 universitatoj en Aŭstrio (5 germanaj, 2 polaj, 1 bohema), 3 en Hungario (2 magiaraj, 1 kroata), 7 teknikaj lernejoj (4 ger-

manaj, 2 bohemiaj, 1 pola), multaj mezlernejoj (gimnazioj, realaj lernejoj kaj realaj gimnazioj), pedagogioj, juristaj akademioj (en Hungarujo), akademioj de belartoj (en Wien, Praha, Krakow), agrikultura (Wien), 3 veterinaraĵoj (Wien, Lwow, Budapest), minakademioj, milita akademio, milita mar-akademio, altaj lernejoj komercaj (en Hungario), komercaj akademioj, multaj lernejoj industriaj, komercaj, metiaj kaj aliaj fakoj. — Universitata gf. en Innsbruck.

Ekonomio. — Aŭstrio-Hungario estas lando plejparte agrikultura (tritiko precipe en Hungario). Brutedukado en Hungario (porkoj, ĉevaloj, kortbirdoj). Industrio ĉefe nordokcidente en bohemiaj landoj, pro natura riĉeco (karbo, mineraloj) kaj kulturado de industriaj vegetaloj (sukerbeto, lupolo, hordeo). Fero (Bohem., Stirio), petrolo (Galicio). Industrio: sukero, biero (Bohem.), alkoholo (Galicio), muelejo (Hungar.). Vitro, porcelano (de Karlsbad), mebloj (Hungar., Moravio), muzikiloj, ledajoj (Wien), k. t. p.

Monistemo. — Monunuo : 1 krono (41 Sd) = 100 heleroj. Bilettoj : 10, 20, 50, 100, 1.000 k. Oraj moneroj : 10, 20 k. Arĝentaj : 1, 2, 5 k. Nikelaj : 10, 20 heleroj. Bronzaj : 1, 2 hel. Mezuroj laŭ metra sistemo.

Poŝto. — Interna afranko : let. kaj leterkartoj 10 h. ĝis 20 gr., p. k. 5 h., pres. 3 h. ĝis 50 gr., 5 h. ĝis 100 gr., 10 h. ĝis 250 gr., 20 h. ĝis 500 gr., 30 h. ĝis 1.000 gr. — Telefono : por 3 min. 20 h. en pli grandaj urboj, inter urboj, 60 h. ĝis 3 k. — Telegrafo : 6 h. por vorto min. 60 h. Poŝtmandatoj pageblaj hejme, int. mandatoj kaj respondkuponoj. Ŝparkaso (interezo 3 %). spezoj en ĉiu poŝtoficejo. Antaŭpeto necesa por depreno de mono). Markoj aĉeteblaj en laŭvola kvanto ĉe ŝtataj tabakvendejoj.

Fervojoj. — 47.000 km. En Aŭstrio duone, en Hungario 5/6 ŝtataj. Prezo po km. sur ŝtataj linioj : de 1-400 km., 1^a kl., 9 hel.; 2^a kl. 5 hel.; 3^a kl. 3,5 hel.; de 401-600 km. 8,5 ; 5 ; 3 ; post 600 km. 4,5 ; 4 ; 2. Ir-reiraj biletoj, nenia rabato, valoras 3 tagojn. Ĉe somerekursoj por ekskursaj lokoj ir-reiraj biletoj, daŭro 24-48 horojn, rabato sufiĉe grava. Plia alpago por rapid-vagonaro. Specialaj biletoj : a) kombinitaj int. kuponoj laŭ kontrakto kun aliaj ŝtatoj ; b) abonoj por 1 aŭ pli da ŝtatervojaĵoj direktoj, min. 250 kr., 150 kr., 100 kr. ; c) 15-30 tagaj abonoj por la ĉirkaŭaĵo de Wien, Salzkammergut-, Tauern-, Sudalpoj, nordokcid. kaj nordorient. Bohemujo, Elbe-, Iser-, Riesen-montaro, Sudetoj, Okcid-Orient-Galicio. Prezo : 15 tagoj, 1^a kl. 62 kr., 2^a kl. 43 kr., 3^a kl. 24 kr. ; 30-tagoj, 93, 62, 38 kr. ; d) speciala takso por socioj (20 % por pli ol 30 personoj, 50 % por pli ol 100), laboristoj veturantaj al laboreceto aŭ reen, flusistoj, lernantoj, soldatoj kongresoj, k. t. p. Infanoj ĝis 4^a j. ne

pagas, de 4 ĝis 8^a j. la duonon. Interrompo de l'vojaĝo ebla 1 fojon. Kontrolo de la biletoj je la en-kaj eliro, kaj en la vagono. Eniro sur la kajojn sen vojaĝbileto 20 h. Senpage estas kunprenebla manpakaĵo ; la resto iras en la pakvagonon, 3,50 kr. por 100 kgr. po km. Bicikloj (neenpakitaj) pagas 8 hel. po 10 kgr. Pakajrestejo 10 h. po tago kaj pakaĵo. 3^a kl. ĝenerale rekomendinda sed ne rajtigas al manĝovagono ; diversaj rapidvagonaroj ne havas ĝin.

Ŝtataj veturiloj en ĉiuj regionoj ne atingebaj per vagonaro. Ŝtataj poŝtomnibusoj, aŭtomobiloj, ĉefe en Tirolo (Dolomitoj).

Navigado. — Vaporŝipoj sur Danubo, sur la aliaj ĉefaj riveroj kaj sur la lago Balaton. Ĉefaj marhavenoj Trieste, Fiume (ĉefa linio Trieste-Brindisi-Aleksandrio). Komerca ŝiparo : 1.800 ŝipoj kun 400.000 t.

Dogano. — Severa pri valizoj ; persona traserĉado preskaŭ neniam okazas, krom ĉe personoj suspektindaj. Permesite havi por propra bezono aŭ 10 cigarojn aŭ 25 cigaredojn aŭ 35 gr. da fumtabako aŭ ĉion kune, ĉiu portas kvanton por si mem, kvalito konforma al la personeco. Plue tolerataj estas manĝaĵoj kaj kuraciloj bezonataj dum la vojaĝo kaj ĉio alia ĝis 25 gr. aŭ en kvanto al kiu respondas la imposto malpli granda ol 10 h. Bicikloj venantaj el eksterlando pagas po 60 k. aŭtomobiloj laŭ pezo ; mono ricevebla ĉe eliro. Membroj de certaj socioj rajtas liberan eniron Tiuokaze estas necesa legitimaĵo, priskribo de la maŝino kaj plumba marko.

Turismo. — Somera sezono de junio ĝis septembro. Vintraj sportoj kaj turismo en Tirolo, Semmering, Sudetoj, Karpatoj, Tatra. Marbancoj ĉe Adriatiko. Famaj kuraĉlokoj. Multaj turistoficejoj donas informojn kaj eldonis diverslingvajn gvidlibrojn. Fotografado en muzeoj ne permesata. Vojoj bonaj por cikloj kaj aŭtomobiloj. Multaj vojmonitroj de turistaj kluboj. — Esp. gf. en ĉ. Budejovice, Praha, Prostejov. Esp. gvidlibroj : Pejzaĝoj Aŭstria kaj Novaj fervojoj tra Aŭstrio (eldonitaj de la aŭstria ministerio por fervojoj), Bosnio-Hercegovino, Budapest, Krakow, Praha.

Hoteloj. — Komfortaj kaj ĝenerale puraj se la prezo superas 2,50 kr. por ĉambro. Elektra lumo ĉefe en urboj. Veturiloj apud la stacidomoj escepte en la urbejoj. Matenmanĝo neenkalkulata en la prezo de la ĉambro. Prezoj de l'manĝoj enhavas nek prezon de trinkaĵoj nek panon. En kelkaj lokoj oni postulas almenaŭ unufoje manĝi en la hotelo. En ĉiu granda hotelo oni parolas fremdajn lingvojn. En urboj reprezentantinoj de socioj por protektado de junulinoj. Post ĉiu elspezo trinkmono da 5-10 %. Ne estas kutimo doni en la hotelo al la mastro mem por la tuta servistaro ; sufiĉas doni al botpurigisto 20 h. kaj ankaŭ al ĉambristino. En la urboj oni kutime fermas je 10 h. vesp. ; post tiu tempo oni pagu al

la pordisto 10-20 h. por la malfermo. En la ĉefaj hoteloj oni ĝenerale parolas germane, krom la enlandaj lingvoj, kaj kelkfoje ankaŭ france. — R. HRŔMADA, Praha; Sos, Del. Wien; S. RUDNICKI, Del. Krakow; A. de ZSIGMOND, Del. Sopron.

Esperantiaj hoteloj

- Bozen-Gries. — Hot. Walther von der Vogelweide, Waltherplatz. — 2,50 kr.
- Brünn (*Brno*). — Hot. Slavia, Salzamtsgasse. — 2 Kr.
— Rest. Vegetarisches Speischaus, « Freya », Ferdinandsgasse 28.
- Budapest. — Pensiono Wüsztner, IV. Váci utca 40. — Esp.
— Rest. Alkoholmentes és Vegetarianus Ethezde, IV. Kiraly utca, 35-37. — Veg.
- Debreczen. — Hot. Angol Királynő, Kossuth. — 3 Kr.
- Dubrovnik (*Ragusa*). — Hôtel de la Ville, Gundulicev trg. — 3,50 Kr.
- Eger. — Kaszinó szálloda, Széchenyi utca. — 2,50 Kr.
- Graz. — Hot. Kaiserkrone. — 2,50 Kr.
- Innsbruck. — Hot. Habsburger Hof, Museumstr. — 3 Kr.
- Kolomea. — Bahra Hotel Bristol, Jagiellonska, 3. — 2,25 Kr.
— Rest. Danylo Šluzar, Narodnyj Dim. — Lakt.
- Kolozsvár. — Hot. « New-York » szálloda, Jókai utca, 1. — 3 Kr.
- Krakow. — Hot. Belvedere, Basztowa, 27. — 3 kr. — Mat. 3,60 Kr.
— Rest. Vegetara « Przyroda », Krzyzia, 7. — Veg.
- Linz. — Hot. Erzherzog Karl. — 2 Kr.
- Lwów (*Lemberg*). — Hot. Sans-Souci, ul. Szajnocky, 3. — 3 Kr.
— Rest. de « Schweitzer », ul. Carneckiego, 4. — Veg.
- Meran. — Hot. de l'Europe, Habsburgerstr. — 2 Kr.
- Pozsony (*Presburg*). — Hot. Deak, Stefania str., 7. — 3 Kr.
- Praha. — Hot. Viktorie, Jungmannova, 18. — 2,50 Kr.
— Rest. Hedvika Burešova, Konviktska, 15. — Veg.
- Prostejov. — Grand Hotel, Palackého str. — 2,50 Kr.
- Salzburg. — Hot. Krone, Getreidegasse, 8. — 2 Kr.
— Milch Trinkhalle, Marktgasse, 3. — Lakt.
- Sopron. — Pannonia, Várkerület. — 3,50 Kr.
- Spalato. — Hot. Bellevue, Piazzale Marmont. — 4 Kr.
- Trieste. — Hot. Metropole, via San Nicolo, 22. — 3,50 Kr.
- Wärnsdorf. — Hot. Börse, Marktplatz. — 2 Kr.
— Rest. Reformspeisehaus, Humboldtgasse. — Veg. Esp.
- Wien. — Hot. Wandl, I Am Peter, 9. — 3 Kr.
— Vegetarisches Speischaus, I Judenplatz. — Veg.
- Zara (*Zadar*). — Grand Hotel. — 3 Kr.

BELGUJO

Surfaco. — 29.455 km² (kulturebla 92 %). 9 provincoj kun 41 distriktoj. Kolonioj : 2.382.800 km².

Loĝantoj. — 7.516.739 (255 po km²). Kolonioj : 15.000.000.

Lingvoj. — Duone franca, duone flandra.

Religioj. — Katolika; 50.000 protestantoj, 15.000 hebreoj.

Registaro. — Konstitucia monarkio. Reĝo : Alberto I^a (n. 1875, r. 1908). 10 respondaj ministroj. Parlamento : Ĉ. de la reprezentantoj (166 anoj senpere elektataj, 4 j.); Senato (110 anoj, 8 j.). Ĉefurbo : Bruselo.

Armeo. — Dum paco : 43.000. Dum milito : 152.000. Unu filo po familio estas devige soldato. Ĉiuj viroj inter 20 kaj 40 j. formas burĝan gardion (46.000 aktiva, 137.000 neaktiva).

Instruado. — 5 Universitatoj en Bruselo, Liège, Louvain, Gent (Gand), Mons. Multaj ŝtataj, urbaj kaj privataj lernejoj.

Ekonomio. — Tre riĉa industrio. Karbminejoj. Fero, ŝtalo, papero, vitraĵoj. Gravaj teksejoj. Prospera agrikulturo. Bredado. Importo, 3.428.000.000 ; eksporto, 3.428.000.000. Komerca ŝiparo : 104 ŝipoj kun 191.000 t.

Monsistemo. — Laŭ latina unuigo (1 franko [40 sd.] = 100 centimoj). Biletot de la nacia banko : 20, 50, 100, 500, 1.000 fr. Oraĵ moneroj : 10, 20 fr. Argentaj : 50 cm., 1, 2 fr. Nikelaj : 5, 10, 25 cm. (truitaj). — Mezuroj laŭ metra sistemo.

Poŝto. — Oficejoj en ĉiuj vilaĝoj ; servo de poŝtmandatoj sen aŭ kun alporto de l'mono hejmen ; pagigo de kvitancoj aŭ tratoj. Pagoj en kontoj ĉe la nacia banko. Int. poŝtmandatoj, respondkuponoj. Interna afranko : let. 40 cm. po 20 gr. ; pk. 5 cm. ; pres. 1 cm. ĝis 25 gr. ; 2 cm. ĝis 50 gr. kaj 2 cm. po ĉiu 50 gr. plie. — Telefono. Oficejoj en ĉiuj iom gravaj vilaĝoj. Komunikado en urbo aŭ kun ĉirkaŭaĵoj : 25 cm. po 5 minutoj. Inter malproksimaj urboj : 1 fr. po 5 min. — Telegrafo. 15 vortoj maks., 50 cm. ; ĉiuj 5 vortoj plie, 10 cm., ĝis 50 vortoj ; ĉiuj 10 vortoj plie, 10 cm.

Fervojoj. — La plej densa fervojarono en la mondo : 4.600 km. kun normala larĝo, preskaŭ tute apartenas al la ŝtato ; 2.250 km. mallarĝaj linioj. Tre malkaraj. 100 km. 1^a kl., 9,40 fr. ; 2^a kl., 6,40 fr. ; 3^a kl., 3,80 fr. ; ir-reiraj biletoj, 15,10 fr., 10,30 fr., 6,05 fr. (valoras 2 labortagojn). — Specialaj biletoj : a) kombineblaj int. kuponaroj laŭ kontraktoj kun aliaj ŝtatoj ; b) kuponaroj por difinitaj rondvojaĝoj ; c) ĝeneralaj abonoj kiuj rajtigas al nelimigata uzado de ĉiuj linioj. Prezoj por la 3^a kl. : 5-tagaj, 35, 23, 13 fr. ; 15-tagaj, 61,50,

41, 23,50 fr. ; garantismo da 5 fr. estu aldonata. Ĝi estas ricevata se-ĝustatempe oni redonas la uzitan abonkarton. Tiuj abonkartoj estas haveblaj post 1 horo en ĉiu stacidomo, ekz. ĉe la landlimo. Ankaŭ mendebla letere. Nur fotografajo da 4×6 cm. estu aldonata; d) ĝeneralaj abonoj dum 3, 6, 9 aŭ 12 monatoj sur ĉiuj linioj aŭ nur inter 2 difinitaj urboj; e) semajnaj rabatprezaj abonoj por gelaboristoj; f) societoj da min. 20 personoj aŭ lernantoj (min. 10) pagas nur simplan bileton por iri kaj reveni. Okaze de festoj kaj somere inter la plej gravaj urboj kaj la banlokoj specialaj vagonaroj tre malkaraj. Infanoj pagas nenion ĝis 3^a j., la duonon ĝis 8^a j. La biletoj taŭgas sen plia alpago por ĉiuj vagonaroj. Por simplaj aŭ ir-reiraj biletoj interrompo de vojaĝo neebla. Biletoj kontrolataj ĉiam je la enirejo kaj plej ofte ankaŭ en la vagonoj. Eniro sur la kajoj sen vojaĝbileto, 10 cm. Senpage estas kunpreneblaj 25 kg. da pakajoj. 3^a kl. rekomendinda sur ĉiuj iom gravaj linioj kaj ebla en preskaŭ ĉiuj rapidaj vagonaroj.

Navigado. — Antverpeno estas la dua marhaveno de la kontinento; 60 regulaj ŝiplinioj kunigas ĝin al la plej diversaj partoj de la mondo. Rapida transŝipiĝo al Anglujo tra Ostende-Dover trifoje tage. Komerca ŝiparo: 104 ŝipoj kun 191.000 t.

Turismo. — Ĉiujare, precipe somere multnombraj fremduloj. Banurboj famaj laŭlonge de la Norda Maro. Kuracurbo Spa. Bordo de la riverego Meuse (Maas) kaj de ĝiaj alfluaj riveroj. Interesaj malnovaj urboj (Bruselo, Antverpeno, Gento, Bruĝo). Doganvizitado en la vagonaroj. Neuzitaj vestaĵoj aŭ nur grandaj kvantoj da tabako aŭ likvoroj pagas impostojn. Turing-Klubo: rue Royale, Bruselo. — Esp. gf. en Spa.

Hoteloj. — La mezprezaj estas tre komfortaj kaj puraj. La loĝado kostas ordinare inter 2 kaj 4 fr. Trinkmono: 10 %. Por restado ekzistas rabatoj: loĝado kaj 3 manĝoj 6 ĝis 10 fr. Vegetaraj kaj senalkoholaj restoracioj en la gravaj urboj. En preskaŭ ĉiuj hoteloj oni parolas france, flandre, germane kaj angle.

Esperantiaj hoteloj.

Antverpeno (Anvers). — *Hôt. de la Paix*, rue des Menuisiers. — 3,50 fr.
Bruges. — *Hôt. du Panier-d'Or*, Grand'Place. — 3 fr.
Bruxelles. — *Hôt. du Moulin-d'Or*, rue d'Assaut. — Mat., 3 fr.
 — Rest. végétarien, rue de l'Esplanade. — Veg.
Charleroy. — *Hôt. de l'Espérance*, place de la Station. — 2,50 fr.
Courtrai. — *Hôt. Royal.* — 2 fr.
Gent (Gand). — *Hôt. Ganda*, rue de Brabant. — 3 fr.; mat. 4 fr.
Huy. — *Hôt. de l'Aigle-Noir.* — 2,50 fr.
Liège. — *Hôt. d'Angleterre*, rue des Dominicains, 2. — 3 fr.

Louvain. — *Hôt. de Suède*, rue Vital-Decoster, 3. — 2,50 fr.
Malines. — *Hôt. de la Station*, pl. de la Station, 16. — 3 fr.
Mons. — *Hôt. de l'Espérance.* — 2,50 fr.
Namur. — *Hôt. de Hollande*, pl. de la Station. — 2,50 fr.
Ostende. — *Hôt. de la Couronne*, quai de l'Empereur, 14. — 3,50 fr.
Tournai. — *Hôt. de l'Impératrice*, rue de Meaux, 12. — 2,50 fr.
Verviers. — *Hôt. Saint-Jean*, rue Xhavée, 1. — 2-3 fr.; mat. 2,75, 3,75 fr.

BRITUJO

(Anglujo, Irlando, Kimrujo, Skotlando).

Surfaco. — 314.333 km². (Anglujo kaj Kimrujo: 151.098, Skotlando: 77.169, Irlando: 81.858). Kulturebla: 81 %_o. 129 graflandoj (Anglujo: 62, Skotujo: 33, Irlando: 34). — Kolonioj kaj protektoratoj: 29.817.514 km².

Loĝantoj. — 45.200.000 (Anglujo kaj Kimrujo: 36.000.000; Skotlando: 4.800.000; Irlando: 4.400.000). Kolonioj kaj protektoratoj: 375.838.000.

Lingvoj. — Angla precipe. En partoj de Kimrujo, kimra lingvo, en okcidenta Skotlando skota, en Irlando (krom la Nord-Orienta) irlandaj, kaj en la « Channels Islands » (Markolaj Insuloj) franca.

Religio. — Anglujo: anglikanoj 72 %_o, aliaj protestantoj 24 %_o, katolikoj 4 %_o. Irlando: kat. 75 %_o, anglik. 13 %_o, aliaj prot. 12 %_o. Skotujo: prot. 88 %_o, kat. 10 %_o.

Registaro — Konstitucia monarkio. Reĝo: George V^a (n. 1865, r. 1910). Respondaj ministroj. Parlamento: Ĉ. de Nobeluloj (House of Lords, 632 anoj plejparte heredaj), Ĉ. de Deputatoj (House of Commons, 670 anoj elektataj de la popolo por 7 j.). Ĉefurbo: Londono. Kolonioj havas apartan registaron.

Armeo. — *Tera* — Nedeviga. Konsistas el « Regulars » (profesiaj soldatoj), rezervanoj, kaj « Territorials » (volontuloj). Dum paco: 250.000. Dum milito: 800.000. — *Maro*: 556 ŝipoj kun 2.500 kanonoj. — *Aera*: 2 aerŝipoj.

Instruado. — Elementa instruado deviga kaj senpaga. Multaj altgradaj lernejoj (gimnazioj), kaj 12 Universitatoj en Anglujo kaj Kimrujo, 4 en Skotlando, 3 en Irlando. La plej famaj estas Oxford, Cambridge, London, Kimra, Aberdeen, Edinburgh kaj Dublin-Universitatoj. Multe da kolegioj kiuj preparas studentojn por la universitatoj, la plej famaj Eton, Harrow kaj Rugby-Kolegioj.

Ekonomio. — En nord-okcidenta Anglujo, la ĉefa industrio estas la kotonaja fabrikado. En Nord-Orienta Anglujo, ŝipkonstruado, fero kaj karbo. En mezlanda Anglujo, oni precipe faras poŝtojn, kaj agrikulturas; en suda Anglujo, agrikulturo estas la ĉefa okupo. En Skotlando, la norda parto estas ĉefe paŝtista; en la sud-okcidento, ŝipkonstruado, fabrikado de nemiaĵoj; en la sud-oriento diversaj fabrikadoj. En Irlando: nord-oriento, plejparte ŝipkonstruado kaj tolaĵoj. En la cetero de Irlando, agrikulturo. En Kimrujo, suda parto, multe da karbminejoj, en la cetero agrikulturo.

Eksporto (1910): £ 534,145,817; importo: £ 678,257,024.

Monŝistemo. — Funto sterlinga [£] (10 Sm.) = 20 ŝilingoj. 1 ŝilingo (50 sd.) = 12 pencej. Bankbiletoj: 5, 10, 20 £. Oraj moneroj: 1/2, 1 £. (Ĉe specialaj okazoj oni eldonas orajn monerojn da 2 kaj 5 £). Argentaj: 5 ŝilingoj (Crown), 4 s. (Double-Florin), 2 s. 6 p. (Half-Crown), 2 s. (Florin), 1 s. (Shilling), 6 p. (sixpence), 3 p. (threepence). Kupraj: 1 penco (Penny), 1/2 p. (halfpenny) kaj 1/4 p. (Farthing).

Mezuroj. — Mezuroj tre komplikaj. Diversaj specoj de objektoj estas pesataj kaj mezurataj laŭ malsimilaj normoj.

Longeco. — 1 jardo (0,914 m.) = 3 futoj. 1 futo (0,304 m.) = 12 coloj. 1 mejlo (1,610 m.) = 1,760 jardoj. — **Pezo.** — 1 funto (453 gr.) = 16 uncoj. 1 tuno (ĉirkaŭ 1,000 kgr.) = 2.240 funtoj. — **Enhavenco.** — Por likvidoj, grenoj, k. t. p. 1 galonio = 4 kvartoj = 8 pajntoj = ĉirkaŭ 4 litroj. — Estas aliaj mezuroj por apotekistoj, juvelistoj, konstruistoj, lignajistoj, k. t. p.

Poŝto. — Poŝtoŝticejo en ĉiu urbeto, multe da subŝticejoj en la pligrandaj urboj. Interna afranko: Let. 4 uncoj por 1 penco; pk, 1/2 p.; pres. 2 uncoj por 1/2 p. same kun kolonioj. — **Telegrafo:** 1/2 penco por vorto, min. 6 p. — **Telefono (publika),** po 3 min., 2 p. **Poŝtmandatoj,** enlandaj kaj alilandaj; respondkuponoj. Ŝparkaso, interezo 2 1/2 %.

Fervojoj. — 37.580 km. Diversaj fervojoj posedataj de publikaj kompanioj; la ĉefaj estas: En *Anglujo* (komercante de Londono): London kaj North Western; Midland; Great Northern; Great Central; Great Western; Great Eastern; London kaj South Western; London, Brighton kaj South Coast; South Eastern kaj Chatham; London, Tilbury kaj Southend; en *Nord-Anglujo*: Lancashire kaj Yorkshire; en *Kimrujo*: Cambrian Railway; en *Skotlando*: Glasgow kaj South Western; Caledonian; North British; Great North of Scotland; kaj Highland; en *Irlando*: Great Northern of Ireland; Great Southern kaj Western; Midland Great Western; Dublin kaj South Eastern; Northern Counties of Ireland Railway. Estas ankaŭ multe da lokaj fervojoj, en diversaj partoj, kaj en la

grandaj urboj, ekz., en Londono, la North London; Metropolitan, District, Underground. — **Fervojoj.** Ĉiu havas sian propran tarifon, sed ofte oni povas veturi sur du linioj aŭ pli per unu bileto. Ordinare estas rabato por ir-reira bileto, dum la somero specialaj ekskursaj kaj libertempaj biletoj je malalta prezo. Oni povas ankaŭ aĉeti « sezon-bileton », t. e. bileto kiu rajtigas al la uzo de la fervojo inter du difinitaj stacidomoj dum 1, 2, 3 aŭ pli da monatoj. Estas ordinare tri klasoj por lokaj vagonaroj, sed lastatempe preskaŭ ĉiuj fervojoj jam forigis la 2^{an} kl. por longaj distancoj. 3^a kl. en longdistancaj vagonaroj ordinare tre komforta, sed por lokaj (speciale en Londono), ofte male. Enportado de pakajo senpage.

Navigado. — Multaj linioj al ĉiuj partoj de la mondo. Ĉefaj havejoj al la Kontinento: Dover, Folkestone, Queenborough, Harwich, Newhaven. Al Nord-Ameriko: Londono, Liverpool, Southampton, Glasgow, Manchester, Avonmouth, Dover. Al Kap-Lando, Oriento kaj Australazio: Londono, Liverpool, Plymouth, Middlesboro, Southampton. Al Centra- kaj Sud-Ameriko: Bristol, Manchester, Southampton, Liverpool. La ĉefaj linioj estas: al Ameriko, Cunard; White Star; American; Hamburg-Amerika; N. D. L.; Allan; Royal Mail Steam Packet; Leyland; Booth; Pacific Steam Navigation, ktp. Al la Kontinento, Wilson; General Steam Navigation; Batavier; Flushing, ktp. Al Australazio kaj Hindujo, tra Suez, P. & O.; Orient; Bibby; Ellerman; N. D. L., ktp. Al Sud-Afriko kaj Australazio, Union Castle; New Zealand Shipping; Shaw Savill, ktp. Komerca ŝiparo (1911): 957 velŝipoj, 750,000 t.; 8,460 vaporŝipoj, 17,000,000 t.

Dogano. — Granda Britujo estas « Free Trade » lando, t. e., oni povas importi ĉion sendogane, escepte la jenaj objektoj: alkoholaĵoj, vinoj, kelkaj ĥemiaĵoj, tabako, kafo, kakao, teo, sukeraĵoj, konfitaĵaj fruktaĵoj, ludkartoj. Oni ne estas devigata pagi doganon se oni portas pakajon da tabako, cigaroj, aŭ cigaredoj, jam parte elĉerpitan. Tio tute dependas de la doganisto mem.

Turismo. — Britujo prezentas nekompareblan kampon por turismo, La ĉefaj distriktoj estas la Montoj kaj Lagoj de Skotlando, la Montoj de Kimrujo, la Lag-Distrikto de Cumberland kaj Westmoreland, la malebena marborda pejzaĝo de Devonshire kaj Cornwall, kaj la nord-orianta marbordo de Anglujo kaj la marbordoj de Skotlando. La marbordoj kaj sabloj de la suda kaj orienta marbordoj de Irlando, la malebena pejzaĝo de la norda kaj okcidenta marbordoj de la belegaj lagoj de Killarney. La firmo de Thos. Cook kaj Filo (Esperantia Entrepreno), la pioniroj de Plezuraj Vojaĝoj kaj Ekskursoj (fondita 1841) havas sistemon kiu funkcias tra ĉiuj partoj de Britujo, kaj enhavas ĉiujn specojn de vojaĝado, malkarajn ekskur-

sojn, aŭ rektajn vojaĝadojn kaj rondajn vojaĝojn. — Esp. gf. en Bath, Cheltenham, Cromer, Gibraltar, Liverpool Portsmouth. Esp. gvidlibroj en London, Edinburgh, Rothesay, Southport.

Hoteloj. — La hoteloj ne estas perfektaj, speciale en la malproksimaj kamparaj distriktoj, sed dum la lastaj jaroj ili multe pliboniĝis; bonaj loĝejoj de 6 ŝ. 6 p. ĝis 30 ŝ. (po tago) estas haveblaj. Tre detala hotelisto de iu oficejo de la turistagentoj Cook. Turisma sezono ordinare de majo ĝis septembro, skota sezono ĉirkaŭ la fino de junio. En la grandaj urboj, multaj luksaj kaj neluksaj hoteloj. Ankaŭ por alilanduloj estas alilandaj hoteloj, ekz.: en Londono, en la kvartalo Soho, estas multe da francaj, italaj kaj hispanaj hoteloj. Ordinare oni luas ĉambron kun matenmanĝo, kaj prenas aliajn manĝojn ekstere. Multaj personoj preferas pensionojn, kie oni havas ĉiujn manĝojn. En grandaj urboj estas restoracioj, kafejoj, tejoj, ktp. Trinkmono: ĉirkaŭ 5% — 10%; en kafejoj, kaj tejoj, posedataj de grandaj kompanioj, ekz., Lyon's, Aerated Bread Company (A. B. C.), Slaters, John Pearce, trinkmono malpermesata. Ordinara bona manĝo kostas ĉirkaŭ 2 ŝ. 6 p., sed oni povas havi tre bonan malpezan lunĉon po 1 ŝ. Matenmanĝo (kutime kun ovoĵ, fiŝoj aŭ viando) ĉirkaŭ 8-9 h.; lunĉo. 12-1 h.; posttagmeza temanĝo, 4-5 h.; vespermanĝo, ĉirkaŭ 6-7 h. — H.-A. EPSTEIN, Det Londono.

Esperantiaj hoteloj.

(La prezoj estas notataj per ŝilingoj kaj pencoj.
Ekz.: 4/6 = 4 ŝilingoj 6 pencoj (2,24 Sm.).

Aberdeen. — Rest. Waverley Hot., Abbey Rd.
Barrow-in-Furness. — Imperial Hot., Corwallis Str. — 4/.
Bath (Somerset). — Fernley Hot., North Parade. — 4/. — Mat. 5/.
— Rest. Shapland's, 17 Stall Str.
Belfast. — Imperial Hot., Donegall Pl. — 3/.
Birmingham. — Grand Hot., Colmore Row. — Mat. 4/6.
— Rest. The Pitman., Corporation Str.
Bradford. — Royal Hot., Darley Str. — Mat. 5/6.
— Rest. Beanstalk, 33, Charles Str. — Veg.
Brighton. — Gloucester Hot., Gloucester Pl. — 3/6.
Bristol. — Dolphin Restaurant, 42, High Str. — 2/6.
— Rest. Lyons, 46, Wine Str.
Cambridge. — Bird Bolt Hot., Regent Str. — Mat. 4/.
— Rest. Livingstone Hot., Petty Cury.
Cardiff. — Barrys Hot., St. Mary Str. — Mat. 5/6.
— Rest. R. E. Jones's Central Hot., St. Mary Str.
Chester. — Rest. The Manchester, 43, City Road. — Mat. 3-3/6.

Chorley. — Royal Oak Hot., Market Str.
Coventry. — Rest. Victoria Temperance Hot., Warwick Row.
Derby. — Clarendon, Midland Road. — 3/6.
— Rest. Ramsdem, St. Peters Str.
Dover. — Kings Head Hot., Clarence Place. — Mat. 3/4/. — Sez. (Jul.-Sept.).
Dublin. — Hot. Standard, Harcourt Str.
Dundee. — Lamb's Hot., 64, Reforme Str. — Mat. 4/3-4/9.
— Rest. Lamb's Hot., sama adreso.
Edinburgh. — Palace Hot., 1, Castle Str. — Mat. 5/. — Sez. (Jul.-Sept.).
— Rest. Patrick Thomson, North Bridge.
Folkestone. — Catalpha Pension, 7, Marine Parade. — Pens. 30/ (semajne). — Sez. (Jul.-Sept.). 40/ (semajne).
Glasgow. — Hot. Alexandra, 148, Bath Street. — Mat. 4/6. — Esp.
— Rest. Stuart Cranston's Tea-Rooms, Limited (multaj filioj).
— Lakt.
Gloucester. — The Royal Hot., Station Road. — Mat. 4/6.
— Rest. J. Page, The Jood Reform Depôt, College Str. — Veg.
Gourock. — Ashton Hot. — Mat. 6/.
Rest. Columbia. — Mat. 5/.
Halifax. — Mand's Temperance Hot., Broad Str. — 2-2/6. — Mat. 3/5-4/.
Hamilton. — Royal Hot. — 3/. — Mat 5/.
Helensburgh. — Imperial Hot. — Mat. 5/6.
Huddersfield. — The Queen Hot., Market Str. — Mat. 5/.
— Rest. Collinson's Cafe, New Street. — Lakt.
Hull. — The York Commercial Hot., Aulaby Road. — 2/. — Mat. 3/6-4/.
— Rest. Jeffersons Vegetarian Caf , 11, Savile Str. — Veg.
Kilwinning. — The Winton Arms. — Mat. 3/6.
Kilmarnock. — Ossington Hot., John Finnie Str. — 3/6.
Leeds. — The Hotel de Ville, King Str. — 4/. — Mat. 5/.
Letchworth. — Garden City Hot., Station Road. — 2/6. — Mat. 4/.
— Rest. The Skittles Inn, Nevelle Road. — Veg.
Liverpool. — Hunt's Hot, Mount Pleasant, 52. — 4/6.
— Rest. Cottle aŭ Lyons. — Multaj filioj.
— Veg. Castle's Veg. Restaurant, 24, Dale Str.
London. — Strand Palace Hot., Strand W. C. — Mat. (bano, nenia trinkmono) 5/6.
— Imperial Hot., Russell Square, W. C. (same).
— Hotel Brice, Old Compton Str., W. C. — 3/. — Esp.
— Milton Temperance Hot., Featherstone Buildings, High Holborn, W. C. — 2/3/. — Mat. 3/5/. — E. E.
— The Buckingham Temperance Hot., 40, West Strand, eniro: 28, Buckingham Str. — Mat. 5/.

- London. — Internacia Klubo por Sinjorinoj, 7-9, Millman Str., Bloomsbury, W. C. — Pens. 15/ po semajno. — E. E.
— Pensiono O'Connor, St. Stephen's Square, 17, Bayswater, W. — Mat. 2/6. — Pens. 25/ po semajno. — Esp. — E. E.
— Pensiono Blaise « La Espero », 3, Lynette Avenue, Clapham Common, S. W. — Esp. — E. E.
— Rest. Lyon's Restaurant. — Multaj filioj.
— Rest. A. B. C. (Aerated Bread Company) (same).
— Rest. Eustace Miles Restaurant, 30, Chaudos Str., W. C. — Veg.
— Rest. Food Reform Restaurant, Furnival Str., Holborn. — Veg.
— Rest. The Home Restaurant, 31, Friday Str., E. C. — Veg.
- Manchester. — * Deansgate Hot., Deansgate Str. — Mat. 4/6.
- Newcastle-on-Tyne. — Tyne Temperance Hot., Hood Str. — Mat. 4/6.
- Norwich. — Cafe-Rest., Prince of Wales Road, 78. — Mat. 4/.
— Rest. Savoy, Wheeler Gate. — Veg.
- Nottingham. — Gresham Hot., Carrington Str. — Mat. 4/6.
- Paisley. — George Temperance Hot., 2, Old Smithills. — Mat. 4/. — Pens. po semajno 30/.
- Rest. Gipson's Tea and Lunch Rooms, 98, Hight Street.
- Perth. — Royal George Hot., George Street. — Mat. 5/.
- Plymouth. — The Westminster Hot., The Crescent, Millbay Road. — Mat. 3/6.
— Rest. Plymouth Dairy Co. Ltd., Union Str., Bedford Str. — Veg. Lakt.
- Rochdale. — Wellington Hot., Broadway. — Mat. 5/.
— Rest. Crescent Hot., Drake Str.
- Rotheray. — Venetia Boarding House. — Pens. 5/ (tage). — 1 £ (semajne).
- Sheffield. — Rest. Albany Hot., Fargate. — Mat. 5/.
— Rest. Lyon's Cafe, Fargate.
- Stockton-on-Tees. — Trévelyan Hot., Paradise Row. — Mat. 5/.
— Rest. The Cafe, Dovecot Str., 42.
- Wigans. — Victoria Hot., Wallgate. — Mat. 5/6.
— Rest. Marsden's Cafe, Market Str. — 3/.
- York. — Young's Hot., Petergate. — Mat. 3/6.

BULGARUJO

Pro la Balkana milito la priskriba artikolo ne povis esti verkata ĝustatempe.

Esperantia hotelo.

Sofia. — Lege Palas, Lege, 1. — 2,50 fr.
— Rest. Šveĵcaria, bulv. Dondukov.

DANUJO

Surfaco. — 38.969 km²., 18 distriktoj krom Kopenhago. — Islando kaj kolonioj : 194.644 km².

Loĝantoj. — 2.757.000 (71 po km.). Islando kaj kolonioj : 145.000.

Lingvo. — Dana.

Religioj. — 99 % protestantoj.

Registaro. — Konstitucia monarkio. Reĝo : Christian X (n. 1870, r. 1912). 10 respondaj ministroj. Parlamento : Landsting (66 anoj parte elektataj de la reĝo dumvive, parte pere por 8 j.). Folkething (114 anoj senpere elektataj por 3 j.). Ĉefurbo : Kopenhago. Islando havas apartan konstitucion.

Armeo. — *Tera* : Dum paco : 14.000. Dum milito : 85.000. Deviga militservo meze 1 j. *Mara* : 46 kanonoj, 1.400 homoj.

Instruado. — Universitato kaj diversaj altaj lernejoj en Kopenhago. Dum la lastaj generacioj la 80 populuniversitatoj havis grandan signifon por la edukado. La lando havas altrangan popol-kaj privatlernejan sistemon.

Ekonomio. — Tre prospera agrikulturo ĉefe eksporto de butero, porkaĵo, ovoj, lakto, kornbestoj. Bona industrio ; eksportado de maŝinoj por buterfarejoj, cemento, ktp. Komerca ŝiparo : 4.340 ŝipoj kun 547.000 t

Monsistemo. — Laŭ skandinava unuigo (1 kron [55 sd] = 100 oere). Biletoj nur de la nacia banko : 5, 10, 50, 100, 500 Kr. Oraĵ moneroj : 10, 20 Kr. Arĝentaj : 10, 25 oere, 1, 2 Kr. Kupraj : 1, 2, 5 oere. Norvega kaj sveda mono sen kurzperdo. — Mezuroj laŭ metra sistemo.

Poŝto. — Oficejoj en ĉiu urbeto. Poŝtmandatoj ŝanĝeblaj en al oficejoj aŭ krediteblaj je la bankoj; int. respondkuponoj. Interna afranko: let. 10 oere (enurbe 5); pk. 5 (enurbe 3); pres. 4 (enurbe 2). — Telegrafo: 3 ĝis 6 oere po vorto.

Fervojoj. — 3.651 km. ĝenerale ŝtataj. Por distancoj ĝis 169 km. la prezoj po km. sur la ŝtataj linioj estas: 1 kl. 7,5 oere, 2 kl. 4,75 oere, 3 kl. 2,75 oere. Por pli grandaj distancoj la prezo kalkuliĝas laŭ 15 zonoj. Por rapidaj vagonaroj oni devas pagi plie: 1 kl. 130 oere, 2 kl. 80 oere, 3 kl. 50 oere. Ir-reiraj biletoj nur por distancoj ĝis 30 km.; rabato sensignifa. — Specialaj biletoj: a) kombineblaj int. kuponaroj laŭ kontraktoj kum aliaj ŝtatoj; b) kombineblaj kuponaroj por rondvojaĝoj en la lando; c) ĝeneralaj abonoj, kiuj rajtigas al nelimigita uzo de ĉiuj ŝtataj linioj. Speciale profitaj por turistoj estas la abonoj por 8 tagoj (nur 3^a kl.) prezo: 22 kr., por 14 tagoj, 1 kl. 80 kr., 2 kl. 50 kr., 3 kl. 30 kr.; rabato por pli longa tempo; d) rabaĵoj al societoj kaj lernejoj por min. 30 personoj, nur en la 3^a kl. kaj ne sur la linio Kopenhago-Helsingor. Favor-kondiĉoj por festotagoj, vizito de banlokoj, kongresoj, k. t. p., ne kutimaj. Infanoj nenion pagas ĝis 4^a j.; la duonon de 4^a ĝis 10^a j.; ne valoras por ili la ĝeneralaj abonoj. Interrompo de l'vojaĝo ne permesata. Kontrolo de la biletoj, en la stacidomoj kaj en la vagono. Senpage estas kunprenebla 25 kg. da pakajoj (enskribpago 25 oere). La 3^a kl. estas rekomendinda; ĝi estas pura kaj troviĝas en ĉiuj rapidvagonaroj; la kondiĉoj sur la kompaniaj fervojoj iom diferencas. Dormovagonoj sed ne manĝovagonoj. Inter la diversaj insuloj transporto per ŝtataj pramegoj; la pasaĝeroj de 1^a kaj 2^a kl. ordinare restas en la vagonoj.

Navigado. — Inter diversaj danaj urboj kiel ankaŭ inter Kopenhago kaj diversaj fremdaj urboj oftaj ŝipveturoj por vojaĝantoj, ĝenerale pli malkaraj sed pli longaj.

Turismo. — Sezono de junio ĝis septembro. La ĉefurbo kun siaj multaj vidindaĵoj kaj la bela ĉirkaŭaĵo estas dum julio kaj aŭgusto pleniĝata de eksterlandaj turistoj. Ankaŭ aliaj partoj de la lando (ekz. la insuloj Moen kaj Bornholm kaj la jutlandaj lagoj) meritas viziton. La plej preferinda tempo estas junio kaj la komenco de julio pro la beleco de la helaj noktoj. — Dogano nesevera (cigaroj, 2,20 kr. po kgr. Kutime oni ne pagas se oni havas nur malpli ol 50 cigaroj). — Esp. gf. kaj gvidlibro en Kopenhago

Hoteloj. — Ĝenerale komfortaj kaj puraj. Se la prezo por nokto estas pli alta ol 1,50 Kr. en la provincoj, iom pli en la ĉefurbo oni povas atendi ĉiujn kontentigojn. En ĉiuj urboj ekzistas kristanaj hoteloj. Ĝenerale oni parolas germane kaj ofte angle, en la gravaj ankaŭ france. — B. HANSEN, Del. Kopenhago.

Esperantiaj hoteloj.

Aarhus. — Hot. Royal, Store Torv. — 2-4 Kr.
— Pens. vegetera, Fiskergade, 26. — Veg.
Kopenhago. — Savoy Hot., Vesterbrogade, 35. — 2 Kr.
Odense — Fyens Forsamlinghus, Dronningensgade. — 1,50 Kr. —
Mat. — 2,15 Kr.

FRANCUJO

Surfaco. — 536.000 km². (kulturebla 82 %). 86 departementoj dividitaj en arondismentoj, kantonoj kaj komunumoj. Kolonioj kaj protektoratoj: 10.000.000 km².

Loĝantoj. — 39.601.000 (73 po km²). Kolonioj kaj protektoratoj 51.000.000.

Lingvoj. — Franca. Diversaj dialektoj en la kamparo, ĉefe en Suda Francujo kaj Bretonujo.

Religioj. — Plejparte katolika. 600.000 protestantoj ĉefe en Sudo (Nimes); 100.000 hebreoj.

Registaro. — Parlamenta respubliko. Prezidanto: Raymond Poincaré (r. 1913), elektita de la du ĉambroj por 7 j. 13 respondaj ministroj. Parlamento: Senato (300 anoj, duagrada baloto, 9 j.); Ĉ de la Deputatoj (597 anoj, universala baloto, 4 j.). Ĉefurbo: Parizo.

Armeo. — *Tera*: Dum paco: 608.000; dum milito: 4.370.000. Dujara servado sen esceptoj. — *Mara*: 450 ŝipoj kun 2.800 kanonoj. — *Aera*: 12 aersipoj, 300 aeroplanoj.

Instruado. — 16 Universitatoj. Normala Supera Lernejo, Politeknika Lernejo, Mina Lernejo, Centra Lernejo por Inĝenieroj, k. c., en Parizo. Multaj teknikaj lernejoj en St.-Etienne (minejoj), Grenoble, Lille, Nancy. Milita Mara Lernejo de Brest. Speciala Milita Lernejo en St.-Cyr apud Parizo. Duagrada lernejoj: 20 liceoj en Parizo kaj ordinare 1 en ĉiu departemento; kolegioj (komunumaj) ĝenerale en ĉiu ĉefurbo de arondismento.

Fremdaj studentoj estas multaj, ĉefe en Parizo, Grenoble, Lyon, Montpellier, Nancy, Dijon, Poitiers. Specialaj kursoj por lerni la francan lingvon dum libertempo. — Esp. Universitataj gf. en Dijon, Grenoble, Nancy.

Ekonomio. — Pro sia situacio Francujo rikoltas ĉiujn Eŭropajn kaj Mediteraneajn produktaĵojn, ĉefe vinojn (Burgonjo, Bordeaux,

Ĉampano), kaj tritikon. Industrio tre prospera ĉefe nordoriente de linio strekata de Le Havre ĝis Cette, pro karbminejoj, akvoforto kaj ferminejoj. La ĉefaj fabrikoj estas lan- kaj silkteksaĵoj, luksaj objektoj kaj oleomotormaŝinoj, kiel aŭtomobiloj, cikloj kaj aeroplanoj. Importo : 6.759 milionoj ; eksporto : 6 005 milionoj.

Monsistemo. — Laŭ latina unuigo (1 fr. [40 Sd.] = 100 centimoj). Biletoj : 5, 10, 500, 1.000 fr. Oraĵ moneroj : 10, 20 fr. Arĝentaĵ : 50 et., 1, 2, 5 fr. Nikelaĵ : 25 et. Kupraj : 5 (nomata *sou*), 10 et.

Mezuroj. — Laŭ metra sistemo. En la komuna lingvo oni uzas la vortojn *lieue* (mejlo) = 4 km., *livre* (funtlo) = kgr. 0,500, *pièce* (en Burgonjo barelo da 228 l.) kaj *barrigue* (Bordeaux-lando) barelo da 225 l. La vinbotolejoj entenas proksimume 75 cl.

Poŝto. — Oficejoj en ĉiuj vilaĝoj. Interna afranko : let., 10 et. ĝis 20 gr. ; pk. kaj leterkurtoj, 10 et. ; pres., 5 et. po 100 gr. — Telegrafo : 5 et. po vorto, min., 50 et. — Telefono, po 3 min., 15 et. en Parizo, 10 et. en aliaj urboj, 25 et. por malpli ol 25 km., 40 et. interne de departemento, de 40 et. ĝis 3 fr. inter malsamaj departementoj laŭ distancoj. Poŝtmandatoj, kart kaj letermandatoj pageblaj hejme ; int. mandatoj kaj respondkuponoj. Ŝparkaso ; interezo 2,50 % ; spezoj en ĉiu poŝtoicejo ; antaŭpeto necesa por depreno de mono. Markoj aĉeteblaj izole aŭ dudekare nur en poŝtoicejoj kaj ŝtataj tabakvendejoj.

Fervojoj. — 59.000 km., 5 grandaj kompanioj : *Nord, Est, Ouest-Etat* (ŝtata), *Paris-Lyon-Méditerranée* (P.-L.-M.), *Midi* ; ĉiuj escepte *Midi* havas stacidomon en Parizo. Multaj malgrandaj kompanioj por lokaj fervojoj. Tarifejoj kaj regularoj preskaŭ samaj por tuta Francujo. Prezoj po km. : 1^a kl. 11 et. ; 2^a kl. 7 et. ; 3^a kl. 5 et. Ir-reiraj biletoj : 25 % da rabato en 1^a kaj 2^a kl., 20 % en 3^a, daŭro laŭ distanco, poduone daŭrigeblaj dufoje apalgante 10 %. Specialaj biletoj : a) kombineblaj kuponoj por rondvojaĝoj interne aŭ eksterlande : rabato laŭ distanco, sed kelkaj neoportunaj trudataj kondiĉoj ; b) familibiletoj : rabato por ir-reiraj biletoj por pli ol 3 personoj samfamiliaj ; c) abonoj por difinita vojo ; d) kartoj por someraj ekskursoj : rajtigas liberan vojaĝadon en difinitaj regionoj ; e) duontarifaj kartoj : ĵara antaŭpago laŭ la regiono ; f) rabato por almenaŭ 12 samsocietanoj (ekz. membroj de U. E. A.), are vojaĝantaj kun insigno kaj membrokarto ; la plimulto de la kompanioj konsentas rabaton ĝis 50 % je la ir-reiraj biletoj ; g) diversaj favor-kondiĉoj por festoj, vizito de banlokoj, kongresoj, k. c. En multajn ekspresojn oni rajtas eniri nur se oni vojaĝas sufiĉe longan distancon, varieblan laŭ la klaso, aŭ iafoje, se oni devas uzi alian korespondan vagonaron. Ĉiokaze oni informiĝu en la stacidomo. Surgenuaj infanoj ĝis 3^a j. ne pagas, de 3^a ĝis 7 j. la duonon. Interrompo de

vojaĝo neebla sen speciala permeso. Eniro sur la kajojn sen vojaĝ-biletoj 10 et. Kontrolo de la biletoj je la en-kaj eliro, ofte ankaŭ en la vagono. Senpage 30 kgr. da pakajoj en la pakvagono po bileto. Por ĉiu kgr. super 30, fr. 0,005 po km. ĝis 40 kgr. da superpezo. Pakajrestejo en ĉiu stacidomo, 5 et. po tago kaj pakajo ; super 3 tagoj pli kare. 3^a kl. bona sur grandaj linioj ; sur aliaj ofte mal-komforta. Mangovagonoj nur en kelkaj ekspresoj.

Navigado. — Vaporŝipoj sur riveroj estas malmultaj (Chalon-sur-Saône-Lyon ; Rouen-Le Havre ; Bordeaux-Royan ; Saint-Malo-Dinard ; Nantes-Saint-Nazaire). Ĉefaj havenoj : al Anglujo de Calais, Boulogne, Dieppe (franca ŝtata ŝipo), Le Havre, Cherbourg, Saint-Brieuc. Al Algerio de Marseille, Cette kaj Port-Vendres. Al insulo Corse de Marseille kaj Nice. Al Nord-Ameriko de Le Havre kaj Cherbourg. Al Centra-Ameriko de Saint-Nazaire. Al Sud-Ameriko de Bordeaux kaj Marseille. Al Ekstremoriento de Marseille. Komerca ŝiparo : 16.000 velsipoj kun 600.000 t., 1.600 vaporŝipoj kun 800.000 t.

Dogano. — Tre severa. Praktike oni toleras 10 cigarojn, 20 cigaredojn aŭ 40 gr. de fumtabako ; kunigo neebla kaj ne por sinjorinoj ; 250 gr. da nekuirita kafo kaj ĉirkaŭ 500 gr. de ĉokolado. Sed tio varias laŭ la doganoficejoj ĉar oficiale nenio estas permesata. Se oni enportas pli ol estas tolerata oni devas pagi por la tuto aŭ lasi la tuton al la dogano. Tabako 75 fr. po 1 kgr. Aŭtomobiloj kaj bicikloj el eksterlando pagas la doganimposton sed povas per iaj formalajoj rerievi la monon elirante. Por bicikloj membroj de societoj ne pagas kondiĉe ke ili havu sian membrokarton kun fotografo aŭ laŭleĝa kontrola subskribo kaj priskribo de la maŝino.

Turismo. — Monta turismo en Alpoj, Ĵuraso, Pireneoj, Centra Montaro. Vintraj sportoj. Marborda sezono, en somero de Bordeaux ĝis Brest kaj Boulogne, en vintro Biarritz kaj Mediteraneo. Multaj Iniciajaj Sindikatoj donas informojn kaj eldonas senpagajn gvidlibrojn (sin turni al niaj Del.). Turing-Klubo : Avenue de la Grande-Armée, Paris ; kaj Alpa Klubo (nur por montara turismo). Fotografado ne permesata interne de publikaj monumentoj, muzeoj, ĝardenoj, k. c. Bonega geografia karto : Staba karto 1/80.000 ; 12 Sd. po 1 folio en ĉiuj librejoj. Stratoj bonaj por cikloj kaj aŭtomobiloj. Multaj vojmontriloj de Turing-Klubo kaj Alpa Klubo.

Esp. gf. en Beaune, Bordeaux, Calais, Dijon, Grenoble, La Rochelle, Le Creusot, Le Mans, Louhans, Lyon, Moulins, Poitiers, Pont-de-Vaux, Tours, Vienne. — Esp. gvidlibroj : Fervojo Orléans, Bourg, Chalon-sur-Saône, Condé, Rouen, Sens, Saint-Etienne, Vichy.

Hoteloj. — Komfortaj kaj ĝenerale puraj se la prezo superas 1 Sm. por ĉambro. Elektra lumo ĉefe en urboj kaj montaro. Veturiloj ĉe

la stacidomoj escepte en urbegoj. Matenmanĝo malkara kaj negrava; neniam enkalkulata en la prezo de l'ĉambro. Prezoj de l'manĝoj enkalkulas trinkaĵojn (blankan aŭ ruĝan vinon, aŭ pomvinon en okcid. Franc.) kaj panon laŭvole. Oni ne estas devigata manĝi en la hoteloj. Vespermanĝo ĝenerale pli kara ol tagmanĝo (ekz. 3 fr. anstataŭ 2,50). Pli malkara oni manĝas en la restoracioj de 1,50 ĝis 3 fr. aŭ laŭkarte. Sufiĉe komforta manĝo en la bufedoj po 1,50 fr. En negrandaj hoteloj oni malofte parolas fremdajn lingvojn. Trinkmono: 5 ĝis 10 %/o. En la hoteloj oni prefere donu al la mastro mem por la tuta servistaro. — TH. ROUSSEAU, Del. Dijon.

Esperantiaj hoteloj

Aix-les-Bains. — Hôt. de Genève. — 3 fr.; pens., 8-10 fr.
Ajaccio. — Hôt. de France, place du Diamant. — 3 fr.
Amiens. — Hôt. de Belfort, rue de Noyon. — 3 fr.
Angers. — Hôt. de France, place de la Gare, 8. — 3 fr.
Angoulême. — Hôt. de France, place des Halles. — 3 fr.
Arles. — Hôt. du Forum. — 3 fr.
Avignon. — Hôt. Terminus, cours de la République. — 2,50 fr.
Bayonne. — Hôt. du Monde. — 2,50 fr.
Beaune. — Hôt. de la Poste, boulevard Bretonnière. — 3 fr. — Esp.
Belfort. — Hôt. de l'Ancienne-Poste. — 2,50 fr.
Besançon. — Hôt. de l'Europe, rue de la République, 11-15. — 2 fr.
Béziers. — Hôt. de la Paix, allées Paul-Riquet. — 2,50 fr.
Bordeaux. — Regina-Hôtel, r. Saint-Vincent-de-Paul, 45. — 3 fr. (15%
— Hôt. Gobineau, place de la Comédie. — 3 fr.
Boulogne-sur-Mer. — Hôt. Castiglione, rue du Moulin-à-Vapeur, 8. — 2,50-3 fr. — Esp.
— Hôt. Herdier, rue Faidherbe, 161. — 2-3 fr. — Esp.
Bourges. — Hôt. de la Boule-d'Or, place Gardaine. — 3 fr.
Brest. — Hôt. des Voyageurs, rue de Siam, 16. — 3 fr.
Caen. — Hôt. de France, rue de la Gare, 6. — 2,50 fr.
Calais. — Hôt. du Commerce, rue Royale, 51. — 2,50 fr.
Cannes. — Hôt. des Colonies, en face de la gare. — 3 fr.
Chalon-sur-Saône. — Grand-Hôtel, rue du Port-Villiers, 8. — 3 fr.
Châlons-sur-Marne. — Hôt. du Renard, pl. de la République. — 3 fr.
Chambéry. — Hôt. du Commerce, rue Vieille-Monnaie. — 2 fr.
Chamonix. — Hôt. de la Poste. — 2,50 fr.
Cherbourg. — Hôt. de France, rue du Bassin. — 3 fr.
Clermont-Ferrand. — Hôt. de Lyon, place de Jaude. — 3 fr.
Dieppe. — Hôt. Terminus. — 3 fr.; pens., 7,50-9 fr.
Dijon. — Hôt. Morot, avenue de la Gare. — 2,50 fr.

Douai. — Hôt. du Grand-Cerf et du Commerce, rue Saint-Jacques, 20. — 3,50 fr.
Dunkerque. — Hôt. de Flandre, rue Alexandre-III, 18. — 2,50 fr.
Enghien-les-Bains. — Hôt. de la Terrasse, rue du Départ. — 4 fr. — Sez. (jun.-sept.), pens. 8 fr.
Evian-les-Bains. — Hôt. Continental. — 2,50 fr.; pens., 8 fr.
Grenoble. — Hôt. Central, rue Montorge, 7. — 3 fr.
Hyères. — Hôt. Terminus, place de la Gare. — 2,50 fr.
La Rochelle. — Hôt. de la Paix, rue Gargoulleau. — 2 fr.; mat., 2,75 fr.
Laval. — Hôt. de Paris, rue de la Paix, 22. — 3 fr.
Le Creusot. — Hôt. du Coq-d'Or, rue d'Autun. — 2,50 fr.
Le Havre. — Hôt. d'Angleterre, rue de Paris, 126. — 3 fr.
Le Mans. — Hôt. de Paris, avenue Thiers, 14. — 3 fr.
Lille. — Hôt. de Paris, place de la Gare. — 2,50-3 fr.
Limoges. — Hôt. de Bordeaux et Terminus, en face la gare des Bénédictins. — 2,50 fr.
Lorient. — Hôt. des Voyageurs, rue Fénelon, 17. — 2,50 fr.
Lourdes. — Hôt. du Commerce. — 2,50 fr.; pens., 8 fr.
Lyon. — Hot. de l'Univers et de l'Automobilisme, Cours du Midi, 27 (ap. stacio Perrache). — 3-3,50 fr.
— Hôt. de Russie, rue Gasparin, 6. — 3 fr.
Marseille. — Hôt. Beau-Site, boulevard d'Athènes, 38, rue du Muguet, 26. — 2 fr.
Montauban. — Hôt. Terminus, avenue Mayenne. — 2,50 fr.
Montpellier. — Hôt. Maguelone, rue Maguelone, 5. — 2,50 fr.
Nancy. — Hôt. de l'Univers et du Commerce, rue des Carmes. — 3 fr.
Nantes. — Hôt. des Trois-Marchands, pl. de l'Hôtel-de-Ville. — 2,50 fr.
Nevers. — Hôt. de la Paix, avenue de la Gare. — 3 fr.
Nice. — Hôt. Raimboldi, boulevard Raimboldi. — 2 fr.; pens., 6 fr. — Sez. (nov.-apr.), 3 fr.; pens., 8 fr.
— Pension végétarienne, avenue Villermont.
Nîmes. — Hôt. de l'Univers, place des Arènes. — 2,50 fr.
Orléans. — Hôt. du Berry, en face de la gare. — 2,50 fr.
Paris. — Hôt. de l'Europe (ap. stacidomo Est), boulevard de Strasbourg, 74. — 4-7 fr.
— Hot. Terminus-Est, rue de Strasbourg, 5. — 3-8 fr.
— Hot. Cailleux (ap. stacidomo Nord), rue de Saint-Quentin, 17. — 3-8 fr.
— Hot. de la Gare du Nord, rue de Saint-Quentin, 21. — 3-8 fr.
— Hot. de Londres et de New-York (ap. stacidomo Saint-Lazare), place du Havre, 19. — 4 fr.
— Hot. du Mans (ap. stacidomo Montparnasse), rue de Rennes, 159. — 3-6 fr.

- Paris. — Palais d'Orsay, stacidomo quai d'Orsay. — 5 fr
 — Hot. Massilia (ap. stacidomo *Lyon*), boulevard Diderot, 13. — 4-6 fr.
- Pau. — Hôt. de la Maison-Dorée, rue Latapie, 9. — 2,50 fr.
- Périgueux. — Hôt. du Commerce et des Postes, place du Quatre-Septembre. — 2,50 fr.
- Perpignan. — Hôt. de la Poste, rue Fabrique-Nabot. — 2,50 fr.
- Poitiers. — Hôt. de France, rue Carnot, 28. — 3 fr.
- Reims. — Hôt. Continental, place Drouet-d'Erlon. — 3-5 fr.
- Rennes. — Hôt. Lemoine et de l'Univers, rue Lanjuinas. — 3-4 fr.
- Roanne. — Hôt. Moderne (Terminus), cours de la République, 13. — 2,50 fr.
 — Hôt. du Commerce, place du Marché. — 2,50 fr.
- Rochefort. — Hôt. de France. — 2,50 fr.
- Rouen. — Hôt. du Vieux-Palais, place Henri-IV, 145. — 2,50 fr.
- Saint-Etienne. — Hôt. Moderne, avenue Président-Faure. — 3-3,50 fr.
- Saint-Quentin. — Hôt. de France et d'Angleterre, r. St-Martin. — 3 fr.
- Toulon. — Hôt. de la Poste, r. Hippolyte-Duprat, 8. — 2,50-3 fr. — Esp.
- Toulouse. — Hôt. Capoul, place Lafayette. — 2,50 fr.
- Tours. — Hôt. de l'Europe, place de la Gare, 12. — 2,50-3,50 fr.
- Troyes. — Hôt. des Courriers, rue de l'Hôtel-de-Ville. — 3,50 fr.
- Versailles. — Hôt. de France, rue Colbert, 5. — 2,50 fr.
- Vichy. — Hôt. du Globe, rue de Paris. — 3 fr.
 — Hôt. des Célestins, rue des Célestins. — Pens. 8 fr.
 — Villa des Eaux, rue de Nîmes. — Pens. 7 fr.

GERMANUJO

Surfaco. — 540.857 km². (Prusujo : 348.702 ; Bavarujo : 75.870 ; Vurtembergo : 19.511 ; Badeno : 15.251 ; Saksujo : 14.992). Kolonioj kaj protektoratoj : 2.660.000 km².

Loĝantoj. — 64.925.000 (120 po km.). (Prusujo : 40.165.000 ; Bavarujo : 6.887.000 ; Saksujo : 4.807.000 ; Vurtembergo : 2.438.000 ; Badeno : 2.143.000). Kolonioj kaj protektoratoj : 14.000.000.

Lingvoj. — Plejparte germana ; pola : 3.087.000 ; franca : 212.000 ; dana : 141.000.

Religioj. — 62 % protestanta ; 36 % katolika ; 1 % hebrea ; 1 % diversaj.

Registaro. — Imperio, al kiu apartenas 25 ŝtatoj : 4 reĝlandoj, 6 grandduklandoj, 5 duklandoj, 7 princlandoj, 3 liberaj urboj, krom tio la provinco Elsaco-Lotaringio kaj la insulo Helgoland. Imperia registaro en Berlino. Imperiestro (samtempe Reĝo de Prusujo) : Vilhelmo II^a (n. 1859, r. 1888). Sola imperia ministro estas la imperia kanceliero ; sub lia gvidado laboras 8 imperiaj oficejoj prezidataj de ŝtasekretarioj. Bundesrat (58 reprezentantoj de ĉiuj ŝtataj registaroj). Reichstag (397 anoj, popola baloto, 5 j.). Ĉefurbo : Berlino. Imperia tribunalo en Leipzig. La diversaj ŝtatoj administras siajn internajn aferojn tute memstare, havas proprajn ministrojn kaj parlamentojn.

Armeo. — *Tera* : Dum paco : 656.000. Dum milito : 5.000.000 Dujara deviga servado ĉe la infanterio, trijara ĉe la aliaj trupoj. Kiu per speciala ekzameno provas sciencan edukon servas nur 1 j. — *Mara* : 130 ŝipoj kun 61.000 homoj.

Instruado. — 23 universitatoj (Berlin [2], Bonn, Breŝlau, Göttingen, Greifewald, Halle, Kiel, Königsberg, Marburg, Münster, Braunsberg, Posen, München, Würzburg, Erlangen, Leipzig, Tübingen, Heidelberg, Freiburg-im-Br., Giessen, Jena, Rostock, Strassburg). 11 superaj teknikaj lernejoj, 3 akademioj por sup. minejoficiistoj, 4 akademioj por superaj arbaristoj, 4 terkulturaj, 5 veterinaraj kaj 6 komercaj superaj lernejoj, 16 artakademioj, 11 publikaj muzikakademioj. La gimnazioj, instruistaj seminarioj kaj reallernejoj estas ŝtataj aŭ urbaj, la popollernejoj estas ĉie sub urba aŭ komunuma administrado kaj ŝtata kontrolo. Multaj diversaj faklernejoj, privataj lernejoj, specialaj edukejoj publikaj aŭ privataj por blinduloj, surdmutuloj kaj kripluloj ĉiuspecaj. Ritma edukejo de Jacques Dalcroze en la ĝardenurbo Hellerau apud Dresden.

Ekonomio. — Agrikulturo grava en la nordaj provincoj kaj en Bavarujo ; ĝarden- kaj fruktokulturo ĉefe en Saksujo kaj Turingujo, vino apud Rhein kaj Main, Mosel kaj Saar. Bestkulturo : ĉevaloj en Orienta-Prusujo, ŝafoj en meza Germanujo, bovoj en bavaraĵ Alpoj. Minejoj riĉaj je karbo, fero kaj salo en Rejnlando, Vestfalio, Lotaringio, Silezio kaj Saksujo. Industrio gravega kaj ĉiuspeca, speciale citindaj : teksaĵoj el plej diversaj materialoj, labormasinoj, lokomotivoj (Chemnitz kaj München), vagonoj, aŭtomobiloj, bicikloj, kudo- kaj skribaĵoj, armiloj (Essen), mekanikaj kaj optikaj instrumentoj (Jena), foto-aparatoj kaj paperoj, horloĝoj, juvelaĵoj, porcelano, vitro, ĥemiaj produktadoj, kraĵonoj (Nürnberg), ludiloj (Nürnberg), paperoj, cigaroj kaj cigaredoj, parfumo, ĉokolado (Dresden), sukero, biero (München). Importo : 9.706 milionoj ; eksporto : 8.106 milionoj. — Marhavenoj : ĉe Norda Maro Hamburg kaj Bremen, ĉe Balta maro Stettin, Danzig, Lübeck. 4.700 komercaj ŝipoj kun 4.712.000 br. reg.-t.

Monsistemo. — 1 mark (50 Sd.) = 100 pfenigoj. Oraj moneroj : 10, 20 M.; argentaj : 1/2, 1, 2, 3, 5; nikelaj : 5, 10, 25 pf.; kupraj : 1, 2 pf. Biletoj : 5, 10, 20, 50, 100, 500, 1.000 m. — Mezuroj laŭ metra sistemo.

Poŝto — Oficejoj en ĉiu loko. Interna afranko : let. ĝis 20 gr. 10 pf., de 20 ĝis 250 gr. 20 pf. (enurbe ĝis 250 gr. 5 pf.); pk. 5 pf., pres. ĝis 50 gr. 3 pf., ĝis 100 gr. 5 pf., ĝis 250 gr. 10 pf. k. t. p. Poŝtmandatoj pageblaj hejme, int. mandatoj, respondkuponoj. Poŝtaj kontoj por ĉeko kaj ĝiro. Markoj ĉie aĉeteblaj. — Telegrafo : 5 pf. po vorto, min. 50 pf., enurbe 3 pf., min. 30 pf. — Telefono : en kaj inter ĉiuj iom gravaj lokoj. Publikaj telefonoj en poŝtejoj, stacidomoj, k. t. p., por 3 min. en la loko 10 pf., al proksimaj lokoj 20 pf. kaj al pli malproksimaj lokoj ĝis 25 km. 20 pf., ĝis 50 km. 25 pf., ĝis 100 km. 50 pf., ĝis 500 km. 1 m., ĝis 1.000 km. 1 50 m., al lokoj pli ol 1.000 km. 2 m.

Fervojoj. — 59.000 km. kun normala larĝo (55.385 km. ŝtataj), 2.178 km. mallarĝaj, 14.868 km. tramoj kaj transimilaj fervojoj. Fervoja prezo ĉe « Personen » (omnibusaj- kaj « Eil » (rapid)-vagonaroj po km. en 1^a kl. 7 pf., 2^a kl. 4,5 pf., 3^a kl. 3 pf., 4^a kl., 2 pf., krom tio (esepte ĉe biletoj por la 4^a kl. kaj ĉe biletoj malplikostaj ol 60 pf.) nealta imperia biletimposto. Por « Schnell » (rapidegaj)-vagonaroj, en la tarife speciale signitaj, plialtiĝas la ordinara prezoj : de 1 ĝis 75 km. (1^a zono) : 0,50 m. en 1^a kaj 2^a, 0,25 m. en 3^a kl.; de 76 ĝis 150 km. (2^a zono) : 1 m. en 1^a kaj 2^a, 0,50 m. en 3^a kl.; ĉe pli ol 150 km. (3^a zono) : 2 m. en 1^a kaj 2^a, 1 m. en 3^a kl. Por la luksaj vagonaroj la prezo plialtiĝas de la rapidegaj vagonaroj je ĉirkaŭ 25 %.

Ir-reiraj biletoj ne ekzistas; tamen oni povas aĉeti samtempe 2 kartojn por la sama vojo, kies unu ricevas la stampon « por la reiro ». Oni povas interrompi ĉiun vojon unufoje sen iu formalajo, kompreneble nur en la tempo, por kiu valoras la bileto, t. e. ĝenerale 4 tagoj. Infanoj pagas nenion ĝis 4^a j., la duonon de 5 ĝis 10^a j. Bileto, por eniri la peronon sen vojaĝbileto, kostas 10 pf. Kombineblaj biletaroj (por rondvojaĝoj, sed ankaŭ por vojaĝoj, kiuj ne rekondukas al la forirstacio) valoras 60 tagojn ĉe vojaĝoj de 600 ĝis 3.000 km., 90 tagojn ĉe vojaĝoj de 3.001 ĝis 5.000 km. kaj 120 tagojn ĉe vojaĝoj de pli ol 5.000 km. Monataj biletoj por plenaĝaj personoj, por lernantoj : se kelkaj personoj el unu familio aĉetas monatajn biletojn nur la unua pagas la plenan prezon, la aliaj ricevas rabaton. Biletoj por laboristoj estas eldonataj po semajno. Rabato por societaj vojaĝoj nur ĉe partopreno de tre multaj personoj kaj ĉe sufiĉe frua anonco. Manpakajon oni povas kunpreni en la vagonon, la alian oni donas en la pakvagonon kaj pagas laŭ

tarifo diferenca laŭ pezo, zonoj kaj la nombro de la biletoj, al kies posedantoj apartenas la pakajoj. Entute la kostoj de la pakajtransporto ne estas altaj. Neenpakitaj bicikloj estas ĉe vojaĝoj ĝis 100 km transportataj por specialaj « bicikletbiletoj » po 20 pf., alie kiel pakajo por min. 30 pf. 3^a klaso rekomendinda, troviĝas en preskaŭ ĉiuj rapidegaj vagonaroj kaj rajtiĝas al vizito de la mango-vagono. Sur ĉefaj linioj dormovagonoj. Enurbaj tramoj preskaŭ ĉie laŭ la 10 pfeniga tarifo. Turistaj fervojoj al montoj havas specialajn tarifojn. — *Vaporŝipoj.* Sur la ĉefaj riveroj kaj lagoj veturas parte tre elegantaj vaporŝipoj je modestaj prezoj. — *Aŭtomobilinioj* ekzistas en multaj turiste tre vizitataj regionoj, en Bavarujo sub administro de la reĝa poŝto. Tarifo, same kiel preskaŭ ĉie por la ĉevalveturiloj lueblaj, de la registaro aŭ de la magistrato fiksita; ĉe la enurbaj fiakroj per taksimetro kontroleblaj.

Navigado. — Al ĉiuj mondpartoj poŝt- kaj rapidegaj vaporŝip-linioj de la « Hamburg-Amerika-Linie » (Hamburg), de « Norddeutscher Lloyd » (Bremen); specialaj linioj : al orienta Afriko « Deutsche-Ostafrika-Linie » (Hamburg); al norda kaj okcidenta Afriko « Woermann-Linie » kaj « Hamburg-Bremen-Afrika-Linie » (Hamburg); al Sudameriko « Hamburg-Südamerika-Dampfschiffahrts-Gesellschaft », « Deutsche-Dampfschiffahrtsgesellschaft Kosmos » (Hamburg) kaj « Roland-Linie » (Bremen); al la Karolinen-, Marianen-, Marŝal- kaj Palaŭ-insuloj : « Jaluit-Gesellschaft » (Hamburg).

Dogano. — La doganistoj prizorgas sian devon konsciencie, ofte tre severe, sed sen ĉikanoj. Kelkaj cigaroj, cigaredoj kaj iom da tabako, same kelkaj mangaj- kaj trinkajprovizoj por la daŭro de la vojaĝo estas tolerataj. Aŭtomobiloj kaj bicikloj devas pagi la imposton, sed ricevas la sumon ĉe la rea trapasado de la limo, se estas plenumataj la leĝaj postuloj. Por bicikloj oni ne bezonas pagi, se oni estas membro de sportaj societoj kaj pravas tion per la necesaj dokumentoj kiuj devas enhavi foton de l'membro kaj pri skribon de la maŝino.

Turismo. — Krom Berlino multaj el la ŝtataj ĉefurboj kaj ankaŭ urboj de la provinco estas vizitindaj pro siaj vidindaĵoj antikvaj kaj modernaj, pro muzeoj kaj teatroj (ekz., Dresden, München, Köln, Hamburg, Bremen, Hannover, Leipzig, Weimar, k. t. p.). Inter la multaj turiste gravaj regionoj de Germanujo speciale citindaj estas la Bavaraj Alpoj, la « Schwarzwald », la Haremontoj, « Thüringer Wald », la Saksa « Erzgebirge » kaj « Saksa Svisujo », la « Riesengebirge ». Tre belaj estas la valoj de Rhein kaj Donau, de Neckar kaj Main, la regionoj de Bodensee kaj la Bavaraj lagoj. En ĉiuj cititaj regionoj rekomendindaj somerrestadejoj kaj famaj

kuraĉlokoj por ĉiuj malsanoj, en ili kaj ankaŭ en la multaj banklokoj apud la norda kaj la Balta maro la sezono daŭras de majo ĝis septembro, la ĉefa sezono (kun pli altaj prezoj) de julio ĝis aŭgusto. En ĉiuj montaroj vintraj sportoj. Por informoj oni sin turnu al la senpagaj oficejoj de la « Fremdenverkehrsvereine », en ĉiuj grandurboj kaj en ĉiuj lokoj de turisma graveco. Gvidlibroj ofte diverslingvaj; oni postulu ilin ankaŭ en Esperanto. — Esp. gf. en Ansbach, Bamberg, Barmen, Berlin, Breslau, Dresden, Elberfeld, Hannover, Kiel, Krefeld, Merseburg, München, Rostock, Stuttgart, Weinböhla, Wörishofen. — Esp. gvidlibroj en Augsburg, Bad-Reichenhall, Danzig, Essen, Lübeck, Magdeburg, Wernigerode.

Hoteloj. — La hoteloj tre diferencas laŭ la regionoj kaj lokoj, en kiuj ili troviĝas, laŭ komforto kaj kompreneble ankaŭ laŭ prezoj. Tamen ĉiu vojaĝanto trovos ĉiuloke hotelon konvenan al siaj postuloj kaj al sia monujo. Preskaŭ ĉiuj hoteloj (kun nur tre malmultaj kaj baldaŭ ekkoneblaj esceptoj) estas puraj kaj komfortaj, ĉiuj iom pli bonaj en grandaj kaj mezgrandaj urboj havas elektran aŭ gaslumon, centran hejtadon kaj lifton. Pordisto kaj ofte ankaŭ hotelveturilo atendas ĉe la stacidomo. Kun la plej multaj hoteloj estas ligitaj restoracioj, la hotelmastroj deziras, ke oni prenu ĉiujn manĝojn en la hotela restoracio, tamen la plej multaj vojaĝantoj sin liberigas de tio kaj nur prenas la unuan matenmanĝon en la hotelo. Generale 10 ĝis 15 % kiel trinkmono al la pordisto, krome ion por eblaj specialaj servoj al ĉambristino kaj domservisto. Por pli longa restado oni preferu la « pensionojn » kie oni pli malmultekoste loĝas kaj ankaŭ prenas ĉiujn manĝojn, havante kvazaŭ familian vivon. En multaj urboj kristanaj hoteloj (Hospize), rekomendindaj al virinoj sole vojaĝantaj. En la stacidomoj de grandurboj reprezentativoj de societoj por protektado de junulinoj. En preskaŭ ĉiuj hoteloj de grandurboj kaj pli gravaj turistaj lokoj oni parolas angle, france kaj ofte itale, hispane, pole kaj ruse. — *Restoracioj.* En ĉiuj lokoj iom gravaj bonaj bier- kaj vinrestoracioj kun manĝoj laŭ karto dum preskaŭ la tuta tago; en grandurboj por manĝetoj « aŭtomataj restoracioj » Senalkoholaj kaj vegetaraj restoracioj en ĉiuj urboj, ankaŭ vendejoj de fakto, ktp., en butikoj sur la stratoj. — Johannes KARSCH, Del. Dresden.

Esperantiaj hoteloj.

Aachen. — Hot. Zu den vier Jahreszeiten. — 2 M.
Augsburg. — Hot. Kaiserhof, Königsplatz (proksime de la stacidomo). — 2,50 M.
 — Rest. Ceres, Fuggerstr. — Veg.

Bamberg. — Liebs Hot. National, Luitpoldstr. — 2 M.
Barmen. — Vereinshaus (kontraŭ la stacidomo). — 2,50-3 M.
Bayreuth. — Grand Hot., Bahnhofplatz. — 3 M. — Mat. 4 M. — Sez. (Wagner-festludoj) pli altaj prezoj.
Berlin. — Hot. Atlas, Friedrichstr., 305. — 3 M.
Bochum. — Hot. Berliner Hof, Marienplatz, 2. — 2 M. — Mat. 2,50 M. — Rest. Blaues Kreuz, Marienstr.
Bonn-am-Rhein. — Hot. zum Goldenen Stern, Marktpl., 8. — 2,50 M.
Borbeck. — Hot. Beckmann, Gerichtsstr. — 2,50 M. — Mat. 3 M.
Braunschweig. — Parkhotel, Steinweg. — 3 M. — Mat. 4,25 M. — Rest. Café Union, Schützenstr.
Bremen. — Hot. Schaper und Siedenburg, Bahnhofstr., 34. — 2,50 M. — Mat. 3,50 M. — Rest. Vegetarisches Restaurant, Faulenstr.-Kaiserstr. — Veg.
Breslau. — Hot. Vier Jahreszeiten, Gartenstr., 66-70. — 4 M. — Mat. 5,25 M.
Breslau. — Hot. Hansa, Teichstr., 11. — 3 M. — Mat. 3,60 M. — Rest. Pomona, Albrechtstr., 43-45. — Veg. E. E.
Bromberg. — Hot. Gelhorn, Bahnhofstr. — 2,50-3,50 M.
Chemnitz. — Hot. Stadt Nürnberg, Museumstr. 7. — 1,50 M. — Mat. 2,25 M.
 — Hot. Stadt Gotha, Friedrich Auguststr., 8. — 2,50 M. — Mat. 3,50 M.
Danzig. — Hot. Norddeutscher Hof, Stadtgraben, 11. — 2-2,50 M. — Mat. 3,50-4 M.
Darmstadt. — Darmstädter Hof, Grafenstr., 2,50 M.
Dresden. — Hot. Herzogin Garten, Ostraallee, 15. — Mat. 2,50-3,25 M. — Pensiono Seidel, Lüttichaust., 30. — E. E. — Rest. Vegetara kafejo kaj restoracio Esperanto, Wettinerstr.
Düsseldorf. — Düsseldorf Hof, Bahnhofplatz. — 2,50 m. — Mat. 3 M. — Rest. Quisisana, Kaiser Wilhelmstr., 44-a. — Veg.
Duisburg. — Hot. Monopol, Mühleimerstr., 54. — 2,50-3,50 M. — Rest. Christliches Hospiz, Gutenbergstr., 7.
Elberfeld. — Rheinischer Hof, Hofane, 52. — 2,75 M.
Elbing. — Central Hot., Innerer Mühlendamm, 21. — 3,25 M. — Rest. Molkerei H. Schweter, Ausserer Mühlendamm, 97. — Lakt.
Ems (Bad.). — Hot. Weisses Ross, Lahnstr. — 2-3 M. — Mat. 3-4 M. — Sez. (15 apr.-1 okt.). — Rest. Milkur Sanitas, Wilhelmallee. — Lakt.
Erfurt. — Hot. Reichshof, Bahnhofstr., 27-28. — 1,75-3 M. — Mat. 2,25-3,50 M. — Rest. W. Hering, Trommsdorfstr., 4. — Veg.-Lakt.
Essen-Ruhr. — Hot. Vereinshaus, Bachstr. — Mat. 3,50 M.

- Essen-Rhur. — Rest. Reform-Restaurant B. Hilgers, Bornstr., 16. — Veg.
- Esslingen-am-Neckar. — Hot. Krone, Neckarstr. — 2 M. — Mat. 3 M.
- Hot. Württemberger Hof, Neckarstr. — 2 m. — Mat. 2,60 M.
- Frankfurt-am-M. — Basler Hof, Wiesenbüttenplatz. — 2-5 M.
- Freiburg. — Hot. Salmen, Bertholdstr., 50. — 3 M.
- Fürth. — Hot. National, Friedrichstr. — 2,50-3,50 M.
- Gera. — Hot. Schwarzer Bär, Schlossstr. — 2-2,50 M. — Mat. 2,75-3,25 M.
- Rest. Sanitas, Schulstr., 16. — Veg.
- Godesberg (Bad.). — Rheinischer Hof, Coblenzerstr. — 1,50 M. — Mat. 2,50 M.
- Görlitz. — Hot. Stadt Johannesburg, Salomonstr. — 1-2 M. — Mat. 1,50-2,50 M.
- Hamburg. — * Bartels Hot, Steintorwall, 5 (ap. stacidomo) — 3 M. — Mat. 4 M.
- Rest. Schubarth, Neuerwall, 13, eniro Alsterarkaden Passage. — Veg.
- Hannover. — Hot. Bayrischer Hof, Luisenstr., 10. — 3-3,50 M.
- Rest. Schellwald-Appenrodt, Braunschweigerstr., 11. — Veg.
- Heidelberg. — Hot. Roter Hahn, Hauptstr., 44. — 2,50 M.
- Hildesheim. — Hot. Weisser Schwan, Schuhstr., 22. — 1,75 M. — Mat. 2,25 M.
- Rest. (la sama).
- Karlsruhe. — Hot. Victoria, kontraŭ la stacidomo. — 2,50 M.
- Koblenz. — Hot. zum Anker. — 2,50 M.
- Köln. — Hot. Bayrischer Hof, An der Rechtschule, 6 — 2,50-3 M. — Mat. 3-3,50 M.
- Rest. Quisisana, Schildergasse-Neumarkt. — Veg.
- Königsberg. — British Hot., Bergplatz. — 2 M. — Mat. 2,50 M.
- Rest. Guttemplerhaus, Lindenstr., 28/9. — Veg.
- Kiel. — Hot. Muhls Hot, Klinke, 24. — 2,50 M. — Mat. 3,50 (Kiel'a semajno junio 50 pf. pli)
- Rest. Abstinenzhotel, Koernerstr., 7
- Rest. Vegetarisches Speischaus, Gasstr. — Veg.
- Krefeld. — Hot. Stadt München, Hochstr., 43-45. — 2,50 M. — Mat. 3 M.
- Leipzig. — Bayerscher Hof (G. Herbold), Wintergartenstr. 13. — 2 M. — Mat. 3 M. — Sez. (foŭro) 5 M. — Mat. 6 M.
- Rest. Pomona, Kurprinzstr. 3., — Veg.
- Lübeck. — Spethmanns Hot., Braustr., 27; Untertrave, 110. — 2 M. — Mat. 2,50 M.
- Rest. Abstinenz-Café, Untertrave, 100 — Lakt.
- Magdeburg. — Hot. Grüner Baum, Wilhelmstr. — 2 M. — Mat. 2,50 M.
- Rest. Alkoholfreies Rest., Grosse Münzstr.
- Rest. Vegetarisches Speischaus u. Reform-Café, Alte Markt. — Veg.

- Mainz. — Hot. Mainzer Hof, Ecke Parkus kaj Bahnhofstr. — 2,50 M. — Mat. 3,50 M.
- Rest. Reform-Rest. Freja, Schusterstr. — Depost 1 aprilo 13 : Flachsmarktstr. — Veg.
- Mannheim. — Hot. National, L. 15, 17, Bahnhofsplatz. — 2,50-3 M. — Mat. 3,50-4 M.
- Rest. Ceres, C. 1. — Veg.
- Mühlhausen-im-E. — Hot. zum Europäischen Hof. — 2,20 M. — Mat. 2,40 M. — Rest. Volkswohl, Zeughausstr.
- München. — Hot. Reichshof, Sonnenstr., 15. — 3 M. — E. E.
- Hot. Peterhof, Marienplatz, 26. — 2,50 M.
- Hot. Terminus, Bayerstr., 43. — Mat. 4,30 M.
- Rest. Ceres, Löwengrube, 8. — Veg.
- Rest. Thalysid, Schommerstr. — Veg.
- Münster. — Hot. Germania, Herwarthstr., 9. — Mat. 3 M.
- Rest. Alkoholfreies Restaurant, Tibustr., 14.
- Nürnberg. — Hot. Maximilian, Lorenzerstr. — 3 M. — Mat. 3,50 M. — E. E.
- Potsdam. — Eisenbahn Hot., Sarmunderstr., 1/2. — 2-2,50 M.
- Regensburg. — Hot. Bischofshof, Krautereermarkt. — 1,50-2 M.
- Rostock. — Hot. de Russie, Neuer Markt, 9-10. — 3 M. — Mat. 4 M.
- Rest. Abstinenzheim, Schnieckmannstr., 10. — Veg.
- Schweidnitz. — Hot. Thamm, Am Hauptbahnhof (Oberstadt). — 2-3 M.
- Strassburg. — Hot. Union, quai Kellermann. — 2,50 M.
- Stuttgart. — Bahnhof Hot. — 2,50 M.
- Hot. Dierlamm. — 2 M.
- Central Hot. — 1,80 M.
- Thorn. — Hot. Drei Kronen, Altstadtischer Markt, 19. — 2,50 M.
- Tilsit. — Bahnhofs-Hot., Bahnhofstr., 8. — 2,50 M. — Mat. 3,50 M.
- Wernigerode. — Hot. Gothisches Haus, Markt. — Mat. 3 M. — E. E.
- Pensiono: Vila'o « Esperanto », Bismarkstr., 24. — Mat. 2,50 M. pens. 4-4,50 m. — Esp. — E. E. (vidu la anoncojn!).
- Wiesbaden. — Hot. Frankfurter Hof, Webergasse, 37. — 2,50-3,50 M. — Mat. 3,50-4,50 M.
- Rest. Vegetarisches Kurrestaurant Häuser, Taunsstr., 13 — Veg.
- Hot. Adler Badhaus (Ban-Hot.), Langgasse, 42. — Mat. (kafano) 3,25-4,50 M. (dum jan.-mart., nov., dec.), 4,50-6,50 M. (dum apr.-jun.), 4,25-4,50 M. (dum jul.-okt.).
- Worms-am-Rh. — Bahnhof Hot., Bahnhofstr. — 2,25 M. — Mat. 2,50 M.
- Zittau. — Hot. Goldener Stern, Neustadt. — 1,50 M.

GREKUJO

(Pro la Balkana milito la priskriba artikolo ne povis esti ĝustalempa verkata).

Esperantiaj hoteloj.

Ateno. — Hot. Hermes, Bulv. de l'Académie. — 4-6 dr.
 Patras. — Grand Hot. d'Angleterre. — 4-6 dr.

HISPANUJO

Surfaco. — 507.036 km², kun Balearoj kaj Kanarioj (kulturita : 58 %). 49 provincoj, 9.266 komunumoj.

